HUNGARA VIVO

1968

2

HUNGARA VIVO

Kvaronjara revuo de Hungara Esperanto-Asocio
Budapest VIII., Kenyérmező utca 6.

☆

1938, VIII-a jaro, 2-a n-ro

Sur la frontpaĝo:
Adamo Mány ki (1673—1766): Francisko Rákóczi la II-a

Sándor Illés: Sescent-jara estas la urbo de la esperoj: Kecskemét Trad. *Tibor Ujlaky-Nagy* 1
L. Kökény: Petőfi 4
Sándor Petőfi: Poemoj. Trad. *K. Kalocsay* . 6
D-ro J. Mátéffy: Baroko en Hungarlando .. 7
D-ro F. Jáki: Esperanto kaj mondliteraturo 8
El nia vivo kaj kulturo 3, 11
Frigyes Karinthy: En la mondon venis nova sento. Trad. *L. Tárkony* 14
Frigyes Karinthy: La cirko. Trad. *S. Szathmári* 16
Sinofera morto 18
Jenő Heltai: La hundo de la morto. Trad. *Lenke Kun* 19
Mihaelo Gergely: Babela aventuro 20
La esperantistaro funebras Ferenc Szilágyi .. 20
William Auld: Memore al Ferenc Szilágyi .. 21
S. Szathmári: Nigraj okuloj 21
Ernő Farkas: Mia renkontiĝo kun sekretario de Leo Tolstoj 22
V. Toldi Sarolta: Magyar László. Trad. *d-ro J. Mátéffy* 24
Gvidlibro por Supera Ekzameno n-ro II..... 25
Eĥo — Reeĥo 26
György Szépe: La 10a internacia kongreso de lingvistoj. Trad. *I. Botos* 27
Imre Zoltán: Prospektarkivo 28
JUNULARO .....
P. Balkányi: La ĉioscia princino 29
Attila József: La maljuna ŝuisto. Trad. *Márta Vári* 30
P. Balkányi: Nia hundo 30
Ridetu! Ridu! Ridegu! 31
Lajos Lesznai: La hungara muzikhistorio sur diskoj 31
Paĝo Ludas Matyi 32
Korespondi deziras 32
Ilustrajoj de *Ágnes Lukács* 19, 29, 30

Ĉefredaktoro: Ludoviko Kökény
Responda redaktoro: d-ro Jozefo Mátéffy
Redakta Komitato:
Szilárd Bálint, Imre Botos, Lajos Lesznai, Andreo Szabó kaj Tibor Ujlaky-Nagy
Ĉefkunlaborantoj:
Paŭlo Balkányi, Kolomano Kalocsay
Sándor Szathmári kaj Lajos Tárkony
Arta ĉefkunlaboranto: Ágnes Lukács
Eldonas: „Népszava" Gazeteldona Entrepreno, Budapest, VII., Rákóczi út 54.
Telefono: 224—819
Responda eldonisto: Márton Gábor direktoro
Disvastigas la Hungara Poŝto. Abonebla en ĉiuj poŝtoficejoj, ĉe la gazetkolportistoj en la Centra Gazetoficejo de la Poŝto)K. H. I., Budapest, V. József nádor tér 1.) senpere, aŭ per ĉekenpagilo, por individuaj abonantoj la ĉeknumero estas 61 280, por neindividuaj 61 066.
La jara abono estas por jaro Ft 32.-, al eksterlando krome Ft 6.-40 poŝtelspezo.

68.65373 Akadémiai Nyomda, Budapest
Responda gvidanto: György Bernát
Indexszám: 25377

Johano Kupeczky (1661—1740): „Tárogató" — blovisto

Gvidlibro por Supera Ekzameno

Hungara Esperanto-Asocio plenumis gravan servon por la kulturo de Esperanto, eldoninte tiun ĉi skizon de Historio kaj literaturo de Esperanto. Apartaj ĉapitroj enhavas la vivon de Zamenhof, la unuan jardekon de Esperanto, la evoluon ĝis la unua mondmilito, la novan epokon post la dua mondmilito ktp. Sur paĝoj ni povas studi la historion de la E-movado en Hungario. La plej grandan interesiĝon povas veki la Skizo de Esperanta Literaturhistorio — el plumo de K. Kalocsay, sur 77 paĝoj. Detalaj indeksoj, suplemento kaj bibliografio faciligas la uzeblon de la libro. La redaktoro de la Gvidlibro por Superaj Ekzamenoj prof. Alfonso Pechan — ankaŭ verkinto de pluraj ĉapitroj — faris tre bonan laboron. Kunlaboris ankoraŭ: P. Balkányi, L. Kökény, d-ro S. Szerdahelyi kaj H. Vatré. Lektoris Emilia Radvánszky. Ĉar tiu ĉi ekzamena materialo, resp. „baza kono por estontaj kaj praktikantaj lingvoinstruistoj" estas la unua en sia speco, ĝi povas esperi ankaŭ eksterlandan sukceson. Amplekso: 190 paĝoj, prezo: 20 forintoj. Mendebla ĉe Hungara Esperanto-Asocio, Budapest, VIII. Kenyérmező utca 2.

Sescent-jara estas la urbo de la esperoj:

KECSKEMÉT

La hodiaŭa nomo de la urbo aperas la unuan fojon en 1353, sed menciate tiam ankoraŭ kiel nomo de bieno. Sur dokumentoj el 1368 ĝi aperas jam — kune kun Nagykőrös — kiel nomo de komunumo. Kecskemét nun preparas sin por festi tiun ĉi sescentjaran datrevenon.

Tiuj sescent jaroj pasis en konstantaj luktoj por la transvivado, por la pli bela, pli libera homa vivo. Kaj tio ne estis facila luktado, ĉar la prauloj de la urbanoj devis batali ne nur kontraŭ la malamiko, sed krome ankaŭ kontraŭ la malfavoraj naturcirkonstancoj, nome kontraŭ la marĉoj, sovaĝakvoj kaj la sablo. La historio de tiuj sescent jaroj estas grandioza epopeo, skribita ne nur per sango, sed ankaŭ per ŝvito.

La ĉefplaco de Kecskemét

SANGOVERŜOJ KAJ SUFEROJ

Ĝi similas varian, rapide ruliĝantan filmon plenan de surprizoj. Jen koncizege: En la 14a jc. la urbo estas jam grava nodpunkto, jam konstruiĝas eĉ ĝia preĝejo. Borbála Cilley nomas ĝin jam urbo. Poste ĝi venas en la posedon de imperiestro Sigismundo, kiu plurajn fojojn lombardigas ĝin. Ankaŭ János Pero posedas ĝin, kaj poste aneksas ĝin la familio Hunyadi, eĉ reĝo László la 5a restadis inter ĝiaj muroj. (Antaŭ ĝia pordego li ĵuris ne venĝi al la filoj de János Hunyadi, la mondfama armeestro. Sed li rompis sian ĵuron.)

La urbon prirabis la „nigra armeo" (la armeo de reĝo Matiaso, sed tio okazis post lia morto. — Rim. de la trad.), atakis la turkoj, posedis la familio Rákóczi, pagigis per ĝi kontribucion krozantaj hordoj, la homojn murdis la armeoj de la aŭstra imperiestro kaj fremdaj solduloj, dekumis ilin la pesto kaj incendio forbruligis plurajn fojojn iliajn domojn. Konstanta timego estis la vivo de la urbo travivanta multajn terurajn jarojn de la suferado kaj sangoverŝado, sed en maniero preskaŭ mirakla tamen konstante ĝi plifortiĝis kaj pliriĉiĝis.

Bertrandon de la Brocquière vizitis Hungarlandon en 1433 kaj skribas pri Kecskemét: „Mia vojo kondukis tra bela ebenaĵo, kie la ĉevaloj — simile al sovaĝbestoj — vivas tute libere, ĉevalaro sekvis ĉevalaron, ne grandan distancon unu de la alia."

Jam en unu el la dokumentoj de reĝo Géza la 1-a ni trovas la postsignojn de ankaŭ la vinbero kaj frukto. Laŭ sciigoj el la 16a kaj 17a jarcentoj la urbon ĉirkaŭzonis vitejoj en formo de duoncirklo, kaj ĝian ruĝan vinon oni liveris al landoj malproksimaj. De ĉi tie oni portis fruktarbojn por la fruktoĝardeno de la belga reĝa kortego.

Evlia Ĉelebi, la turka vojaĝisto kaj sciencisto vizitis Kecskemét-on en 1660, kaj raportas jam pri pli ol mil kantegmentaj domoj, tri preĝejoj kaj butikoj. „La Kecskemét-anoj havas belajn hungarajn knabinojn kaj famajn ĝardenojn" — li skribas.

SEN FEŬDESTROJ

Oni sekigis la marĉojn, ekstermis la kanaron, grundfiksis la flugsablon. Kaj kiam la malamiko detruis la florantajn ĝardenojn — ho, kiom multfoje ĝi faris tion — ili rekomencis denove la laboron, la plantadon. Kun pioĉo en unu mano, kun armilo en la alia ... Eble la ventoblovita stepo, la vasta, senbara horizonto inokulis al ili tiel profunde la amon por la libereco. Ĉi tion pruvas, ke cent jarojn ili antaŭiris la estiĝon de tiu leĝo, kiu ebligas elaĉeti la rajtojn de la feŭdestro. En la periferio de la urbo ne kuŝis biene-

La Teatro Katona József

toj de vasaloj, kaj en la urbo nur tiu povis havi oficon, kiu abdikis pri siaj nobelaj privilegioj.

Incitajn parolojn de agitantoj ili ne atentis, sed la vortoj de Kossuth ekardigis ilin, kaj ili anoncis sin por servi en lia armeo. Ili soifis la liberecon kiel la sablo la pluvon. Tiu neestingebla amo por la libereco, la diligento kaj laboro, jen kiuj kunforĝis ĝian loĝantaron. Por la intereso de la progreso kunlaboris ĉiam la tuta urbo, kaj produktis tian burĝaron, kiu havis apartan inklinon al la aŭtonomio. Oni povas konstati la efikon de ties spirita elradiado ankaŭ en la evoluo de la urbo, kiun karakterizis specifa civitana demokratio.

Altlernejon ĝi jam havis komence de la 17a jc. En ĝia pli malfrue malfermita jura fakultato finis siajn studojn Mór Jókai. En 1833 konstruiĝis ĝia teatro, en kiu rolis ankaŭ Petőfi.

Multe ĝi oferis por la kleriĝo. En la jaroj post la repaciĝo inter la nacio kaj dinastio malfermis la pordojn la supera reallernejo, poste la agrarlernejo, kaj pli poste oni establis lernejon por la vinkelistoj. En tiu tempo la frukto kaj vinbero estis jam ĉies favoratoj, kaj la gvidantoj de la urbo bone sciis, ke ili povos sekvi la evoluon nur, se ili ankaŭ profitigos la rezultatojn de la scienco.

Tiu ĉiam pli disvastiĝanta vito- kaj fruktokulturo, kiu ankaŭ transformis la regionon, havis tutlande, eĉ Eŭrope famajn apostolojn, kiuj ĉiuj kreis daŭran kaj vere grandan verkon sur la malsovaĝigita sablo de Kecskemét. Ĉi tie laboris Zsigmond Katona, János Mathiász, Zsigmond Hankovszky kaj Pál Kocsis. Sed ankoraŭ pli fieraj estas la Kecskemét-anoj pri József Katona, la verkinto de opero „Bánk bán" kaj pri Zoltán Kodály, la mondfama komponisto.

LA TRIA KECSKEMÉT

La flugsablo, el kiu la diligento sorĉis oran sablon, la fajna



La Urbodomo. Arkitekto: Ödön Lechner

gusto de la abrikoto, la incita fajro de la vinoj, ĉiuj ĉi iĝis famaj eĉ en landoj malproksimaj. Jen, kial ricevis Kecskemét kune kun la romantikaj stepoj ĝin ĉirkaŭantaj la epiteton „Urbo Fama".

Ferenc Erdei skribas inter la du mondmilitoj en sia libro „Flugsablo": du Kecskemét-oj ekzistas! La unua estas la Kecskemét de la famo, la „Urbo Fama", la alia estas la urbo de la sablo, la vera Kecskemét. La Urbo Fama estas ornamata per koloroj kaj gustoj, sed tio ne estas la vera Kecskemét. Ĉar la vera estas pli modesta, kaj havas nur unu ornamon: la esperon.

Hodiaŭ ni jam povas paroli ankaŭ pri tria Kecskemét, pri la urbo de la realiĝintaj esperoj. Ĉar kio estis ĝis nun espero, tio fariĝis jam realo. Vere, ke la malnova giganto jam ne ekzistas: ĝian iaman teritorion de 110 000 hektaroj oni distondadis, el la multaj grupoj de kampokortoj evoluis memstaraj vilaĝoj. Por ĝi restis nur 27 000 hektaroj da tero, el kiu sur ĉ. 4700 hektaroj troviĝas vitejoj kaj fruktoĝardenoj. 11 agraraj kooperativoj kaj 5 fakaj kooperativoj posedas sume 17 000 hektarojn da ora sablo.

De post la liberiĝo de la lando Kecskemét faris eksterordinare grandan progreson. El la granda urbo vaste sterniĝanta sur la ebenaĵo evoluis urbo moderna. Ĉesis ĝia agrara karaktero, ja el ĝiaj 75 mil loĝantoj 20 mil laboras jam en la industrio. Ĝia plej granda fabriko estas la konservaĵfabriko. Krome ĝi havas modernan kortbird-prilaborejon kaj por la rekonstruo de la malmoderniĝinta Fabriko de Emajlaĵoj en la lastaj tempoj oni elspezis 350 milionojn da forintoj. En la urbon oni transloĝigis fabrikon de radioteknikaĵoj, kaj jam funkcias la fabriko de raspiloj, la fabriko de fajn-mekanikaĵoj kaj la fabriko de pneŭmatikaj aparatoj. Samtempe kun rezultato produktas jam la entrepreno de la metallaboristoj,

Parto de la Ĉefplaco

kaj baldaŭ transloĝiĝos al Kecskemét ankaŭ la Fabriko de Laboriloj kaj Maŝinelementoj.

Ĉi tiu vilaĝmiena loksidejo, sur kies peticio, petanta la privilegion de „libera reĝa urbo", la palatino (vic-reĝo) Jozefo notis siatempe: „la via ne havas urban fizionomion", hodiaŭ estas jam transformita en veran urbon ankaŭ en sia ekstera aspekto. Ĝian kaprice ornamitan urbodomon, projektitan de la fama arkitekto Ödön Lechner, kaj kelkajn aliajn palacojn kaj turojn (pri kiu Ferenc Erdei skribas, ke la spektanto ne scias, ĉu trovi ilin belaj aŭ groteskaj) naskis la stepa fantazio. Sed ĝia nova loĝkvartalo estas lokita jam laŭ la principoj de la moderna urbaranĝo. Sur la loko de la malnovaj teretaĝaj domoj konstruiĝas la kvartalo Lenin kun 1400 loĝejoj kun plej modernaj ekipaĵoj. Malantaŭ la Grandpreĝejo nun estas elformata la urbocentro. Tien oni konstruos plurajn komunajn konstruaĵojn, kulturdomon, grandvendejon kaj kontor-domon. Estas jam projektita ankaŭ la dua granda loĝkvartalo konstruota en la urboparto Széchenyi, kie oni konstruos 3000 novajn loĝejojn en la sekvonta kvinjara plano.



La hotelo „Aranyhomok" (Ora sablo)

LA HOMO!

Kecskemét, la ĉefurbo de la ebenaĵa sablolando festos per tuta serio de solenaĵoj la 600-jaran datrevenon de sia fondo. Tiun serion malfermis la 3-an de februaro la „semajno de la agrikultura libro", kaj ĝin sekvos multaj aliaj tradiciaj aranĝaĵoj, komence de la paradmarŝo kun torĉoj la 4-an de aprilo ĝis la vinrikolta amuzo.

En la mezon de la solenaĵoj estas starigita la venkinto de la plurjarcenta batalo kontraŭ la flugsablo: la homo. Tiu, kiu laboris kun sango kaj ŝvito, kun diligento kaj senlimaj fortostreĉoj, ĉiam plena de espero, por krei florantan kulturon sur tiu ĉi malmilda regiono. La solenaĵoj de la datreveno proklamas la sukceson, la malproksimen radiantan forton de la oferplena homa laboro.

Kaj, se Kecskemét bezonus standardon por la plua vojo, por la estonteco, tiam sur tiu standardo oni devus skribi la liniojn de la poeto Endre Ady, por ke ankaŭ la nova generacio ĉerpu forton el la ŝtormoj de la pasintaj sescent jaroj: „Grandaj faroj nur tiam naskiĝas, se la farintoj estis kuraĝaj".

Trad.: *Tibor Ujlaky-Nagy*

EL NIA VIVO KAJ KULTURO

Leo Frankel hejme, *En la fama Pariza tombejo Père-Lachaise — apud honorprezento de la Parizaj hungaroj — oni elfosis la restaĵojn de Leo Frankel, eminenta figuro de la hungara kaj internacia laborista movado. Post mallonga honorigo antaŭ la muro de l' Komunardoj la ĉerkon oni transportis en la krematorion de la tombejo, de kie la cindrojn de Leo Frankel oni portis en lian naskurbon Budapeŝto, por definitive meti ilin en la Maŭzoleon de la herooj de la hungara laborista movado.*

*

Estis longa vojo ekde la Budapeŝta III-distrikta naskiĝdomo — kies strato jam de post dudek jaroj portas la nomon de Leo Frankel, ĝis Parizo. Frankel en 1871 fariĝis unu el la gvidantoj de la Komuno, en la bataloj li vundiĝis sur bordo de Sejno. Post falo de la Komuno li estis mortkondamnata, sed li sukcesis elmigri en Londonon. Tie Frankel laboris apud Marx, poste apud Engels, kaj dume dufoje li vizitis Hungarion.

Sinceran dankon al la Urba Magistrato de Parizo, *ĉar Leo Frankel, nia eminenta patrioto ricevis honoran lokon post lia morto en 1896 en la tombejo Père-Lachaise, kaj lia tombo estis ĝis nun zorge vartita. Apartan dankon al la Pariza Urba Magistrato, ĉar la tombon de Leo Frankel, kiel de „eminenta mortinto de la Franca Respubliko" ankaŭ estonte oni rezervos kaj gardos. Via nobla ago pliigos la respekton por la belega franca ĉefurbo.*

*

„Al la libero kaj belo kondukis la vojo, sur kiu Debussy ekiris" — skribis Zoltán Kodály pri la eminenta franca komponisto okaze de la kvindeka jarreveno de lia morto. Jes, pri Debussy rememoras ankaŭ nun la hungara muzika vivo. Por niaj majstroj Béla Bartók kaj Zoltán Kodály la franca samtempulo Debussy estis federulo en la luktado kontraŭ la unuflanka germana influo. Bartók kaj Kodály, kiuj efektive malkovris la hungaran popolkanton, en la muziko de Debussy trovis kaj taksis la klopodojn similajn al siaj celadoj. Kaj ni trovas ankaŭ hungarecajn motivojn en la melodi-mondo de Debussy. Honoron kaj respekton al li!

PETŐFI

Sándor Petőfi (1823—1849) estas la plej granda hungara poeto. Lia nomo signas riĉegan vivoverkon de radike popoleca poezio. Kaj certe ne nur la kono de liaj tradukitaj poemoj, sed ankaŭ lia ege rava, heroe unusenca vivovojo motivas, ke Petőfi estas konata en la tuta mondo kiel eminenta poeto de la hungaroj, kaj en anglaj, francaj, germanaj kaj alilingvaj literaturhistorioj ni trovas la nomon de Petőfi apud tiu de Homeros kaj Horatius, Petrarca, Byron kaj Heine.

Petőfi naskiĝis en la ebenaĵa urbeto Kiskőrös el etburĝa familio. Jam ekde sia dekkvina jaro li verkis poemetojn. Tiutempe li jam malzorgis sian lernejan studadon. ĉefe pro teatraĵoj de migrantaj aktoroj. Poste li soldatiĝas, sed pro malsano eksiĝas.

La unua poemo de Petőfi aperis en 1842. En 1843 li jam verkis bonegajn poemojn, kiuj atestas pri tio, ke li ne sekvis la laŭmodan versadon de sia epoko, kiu preferis la palan lirikon de la memorlibroj, tiom ŝatataj en nobelaj salonoj. Petőfi prenas siajn temojn el vivo de l' popolo, ricevas teman kaj forman inspiron de la popolkantoj. Tio signifis vere artan revolucion en nia poezio.

Komence de Julio 1844 Petőfi fariĝas helpredaktoro de la „Peŝta Modgazeto". Malantaŭ la 21-jara, jam tutlande konata poeto estas varia vivovojo. Precipe la longaj vojoj trairitaj piede kaj per primitivaj veturiloj, la ekloĝoj en ĉardoj plivastigas lian horizonton. Grava stacio de lia poezia evoluo estas „Johano la Brava" (János vitéz), kiu ankaŭ en Esperanta kaj en alilingvaj tradukaĵoj, krome en opereta

Sendube aŭtentika portreto de Petőfi, restaŭrita per ĉiuj majstraĵoj kaj fortostreĉoj de la fotoarto laŭ la originala dagerotipo. Károly Escher

tralaboraĵo rikoltas sukcesojn ankaŭ nuntempe. Ĝi estas popola rakonta poezio, verdire poezia manifestado por leviĝo de la popolo. „Johano la brava" ja prezentas al ni Feolandon, sed la tempo ne estas malproksime, kiam el la fabelo fariĝos vero.

Inter la poemoj — presitaj en nia nuna numero — troviĝas du ĉarmaj mallongaj pecoj, en kiuj la poeto adiaŭas de la 15-jara knabino Etelke Csapó. „La infano de blondaj bukloj, la knabino, pura kaj senkulpa, infana animo, kiu nutras sin nur per mildaj suspiroj, ne konas la krudaĵojn de la tera ekzistado kaj de la tera amo. Etelke estas tiome milda, ke ŝi mortos, antaŭ ol la poeto havus tempon ŝin ekami." (Antal Szerb.) Jen tiaj estis la amaj poemoj de Petőfi en la unuaj jaroj, sed ankaŭ poste ili havis ian viran hontemon.

En la liriko de Petőfi havas elstaran lokon la poezio de la pejzaĝo. La rivero Tisza, la Ebenaĵo aperas en liaj poemoj kiel partoj de la amata patrujo, kaj la amo al la regiono aŭ pejzaĝo vastiĝas al amo de la tuta patrujo.

Ĉiam pli ofte aperadas en la verkoj de Petőfi ankaŭ iaspeca kritiko de la sociaj cirkonstancoj. Tiu kritiko fariĝos ĉiam pli akra, senindulga kaj celkonscia. Helpis en tio ankaŭ la kritiko de la reakciuloj, kiuj cetere fartas ĉiam malbone, se temas pri efektiva popolamo, pri energia postulo de sociaj reformoj, eĉ — ho ve! — pri vera revolucio.

La duan etapon de la vivovojo de Petőfi karakterizas elvolviĝo de la revolucia poeto. Li manifestis en siaj poemoj kaj ankaŭ

Julia Szendrey, edzino de Petőfi.

en siaj agoj la principojn de la maturiĝinta popola (se pli plaĉas: plebeja) radikalismo. La ĉefa temo de lia poezio en tiuj jaroj estas la antaŭpreparo de la revolucio. En 1846 li verkis la poemon „Miaj kantoj", en kiu li ekkrias: „Kial toleras popol' de malliber'?" Tiam li verkis la poemeton „La popolo", kie li prave konstatas, ke „Patrujo estas nur kie ankaŭ rajto estas — kaj la popolo rajton ne posedas".

En la sama jaro en sia arda poemo „Ho teda pens"' Petőfi antaŭvidas sian heroan morton kaj entuziasmigas por la mondlibereco.

Jes, proksimiĝas la revoluciaj tempoj en Eŭropo. En 1847 liaj poemoj fariĝas eĉ pli akraj, akuzaj kaj kuraĝigaj. Tiam li verkis du kontrastajn poemojn: „Kanto de l' hundoj" kaj „Kanto de l' lupoj" — kies deklamadon la „antaŭvidema" polico de Budapeŝto ne permesis en 1929 dum la Esperanto-Mondkongreso en la ĉambrego de la Ferlaborista Sindikato. Kaj ankaŭ en 1847 Petőfi verkis la grandefikan poemon. „La poetoj de la XIX-a jarcento", kies instigoj, admonoj, urĝoj, eĉ vergofrapoj estas validaj ankaŭ en nia jarcento. En 1847 Petőfi jam estis en intima amikeco kun la popoldevena granda poeto János Arany, kaj al ties fileto Petőfi verkis poemon — legeblan ankaŭ post nia artikolo. Se vi ŝatas la saltadon de ŝercaj, humuraj versoj — legu la poemon volonte.

Petőfi sur ĉiu tereno de sia vivo fariĝis revoluciulo. La poemoj skribitaj al la amataj gepatroj, liaj verkistaj konfesoj kaj amikaj leteroj estas plenaj de politikaj aludoj.

En Aŭgusto 1847 Petőfi fariĝis feliĉa fianĉo kaj en Septembro eĉ pli feliĉa edzo. En la unuaj semajnoj de la geedziĝo Petőfi verkis unu el la plej belaj amaj poemoj de la mondliteraturo „Fine de Septembro". Kiel ni povas legi en „Taglibro" de la edzino Julia Szendrey, la bildoj de aŭtuno rememorigis la poeton je la forpaso. La junaj geedzoj ofte babiladis pri la belaĵoj de la foriranta somero, pri la unuaj signoj de la proksimiĝanta aŭtuno kaj pri la daŭro aŭ pasemo de la sentoj. El tiuj ĉi komunaj travivaĵoj naskiĝis la belega poemo, tradukita al Esperanto same de Kalocsay.

En 1848—49 ni vidas Petőfi kiel poeton kaj politikiston ĉe pinto de la revoluciaj movadoj.



La titolpaĝo de la unua eldono de „Johano la brava"

En sia potenca rakonta poemo „La apostolo" li pasie atakas la tiranojn kaj ankaŭ la — servisto-animojn. Petőfi — kiu en sia poemo „sonĝis pri sangaj tagoj" — ne povis stari flanke, kiam la revolucio evoluis al liberecmilito. Li mortis sur la batalkampo la 31-an de Julio 1849. Per sia homa kaj poeta grandiozeco kaj konsekvenca revoluciemo li eniris por eterne en la koron de la hungara popolo.

Petőfi ankaŭ en la 20-a jarcento vivas, instruas kaj kuraĝigas la fortojn de la progreso kaj ribeligas kontraŭ ĉiuspeca tiranismo. Lia influo ne perdis el sia efikeco dum paso de cent dudek jaroj. Kiel la nomo de Petőfi estis standardo en la batalo kontraŭ la Habsburgoj, liaj ideoj mobilizis la Hungaran Sendependan Movadon ankaŭ kontraŭ la faŝismo.

Mondhistoria okazaĵo estas, ke en la jaroj de la Granda Patrujdefenda Milito oni kolektis la kontraŭ-tiranismajn poemojn de Petőfi en aparta volumo. Tiu ĉi ruslingva libro estis eldonita en Sovetunio por la soldatoj de la Ruĝa Armeo por instigi al entuziasma kontraŭstaro al tiuj potencoj, kiuj endanĝerigis ne nur la homan kulturon, sed ankaŭ ĉiujn homajn sentojn kaj klopodojn.

Kaj kiam la profesoro de la Universitato de Toulouse, André Le Bois en 1963 faris prelegon en Budapeŝto pri „Petőfi kaj la nuntempaj francaj poetoj", li esprimis la amon kaj respekton de multaj francaj poetoj al Petőfi — kiu mem havis parancecon en multaj rilatoj kun la franca klasikulo Victor Hugo.

„Per kio Petőfi atingis ĉi tiun efekton, popularecon, amon? Per sia poezio kaj per sia vivo. Per siaj popolkantoj. per sia ampoezio, per tio, ke lia tuta vivo trafluis en liajn poemojn per la sincero kaj vero de sia vivo kaj verko, per sia fantazio, kiu precipe en liaj priskribaj poemoj, kvazaŭ lia animo havus prismon, dismetas la videblojn tiel, ke la simpla bildo, kie apenaŭ eblis ion percepti, fariĝas bunta kun vivo, movo, koloro — kaj ĉion ĉi la poeto transdonas al la eterno."

Ni citis tiujn trafajn resumajn frazojn el artikolo de Kalocsay (H. V. 1961/1.), nepre kompetenta juĝi pri Petőfi. Jes, la du grandaj nomoj baldaŭ estos legeblaj sur titolpaĝo de nova, grava kaj interesa libro „Elektitaj Poemoj de S. Petőfi — tradukitaj de K. Kalocsay. Jen estas la poemaro, kiu post la idilia „Johano la brava" kaj post multegaj poemoj, tradukitaj de Kalocsay kaj aperintaj dise en Esperanto-revuoj prezentas la vivantan Petőfi por ĉiuj esperantistoj. Do mi petas vin, studu pacience, kaj poste legu ĝue la poemojn de la plej granda hungara poeto Petőfi — en traduko de Kalocsay, samranga literaturisto de Esperanto.

Ludoviko Kökény

POEMOJ DE PETŐFI

El la hungara
K. KALOCSAY

EN LA MEMORLIBRON DE ETELKE

Se ĉi literoj nigraj, kiujn mi nun enskribas,
estus la sombra sorto, kiu vin eble plagus,
mi ĵetus for la plumon, kaj plu ne skribus, kvankam
por ĉiu streko oni po unu mondon pagus.

AL ETELKE

Ĉu vidas vi, trezor', Danubon,
kaj la insulon meze?
Mi tiel tenas vian bildon
en mia kor' karese.

De la insulo verda branĉo
trempiĝas en rivero,
se en mia kor' vi tiel trempus
la verdon de l'espero!

FINE DE SEPTEMBRO

Jen floras ankoraŭ la kampo de valo
kaj verdas ankoraŭ la poplo ĉe font',
sed jam tie, vidu, sub vintra vualo,
sub neĝo kaŝiĝas la supro de mont'.
Jen, en mia koro sub flama radio
de l'suno paradas printempo de jun',
sed griza jam iĝis ĉe mia tempio
la nigra hararo: ĝin prujnis aŭtun'.

La floro defalas, la viv' de ni kuras . . .
Ho, al mia sino, edzin', mia am'!
Ĉu eble vi, kiun nun bruste mi lulas
vin morgaŭ ne ĵetos al tomb' mia jam?
Ho diru, se morto min antaŭ vi prenos,
ĉu min do vi gardos en larma memor',
aŭ am' de junulo vin foje katenos
ke ĵetu vi nomon mian de vi for'?

Se l'vidvovualon de l'frunt' vi deŝiros,
pendigu ĝin al mi sur tomba kolon'
je flago funebra. Mi por ĝi eliros
noktmeze, ĝin porti al mortregion',
por viŝ' de vizaĝo humida de ploro
pri via facile forgesa anim',
por vindo de vundo dolora de koro
eĉ tiam amanta, eĉ tie, sen lim'.

LA POETOJ DE LA XIX. CENTJARO

Facilanime sin neniu
dediĉu al surkorda lud':
tre gravan taskon entreprenas
kiu nun tuŝas al liut'.
Se vi kapablas sole kanti
pri l'propraj ĝojo kaj dolor',
ja vin la mondo ne bezonas,
la sanktan lignon metu for.

Ni migras en dezerto, kiel
la judoj laŭ la voj-preskrib'
de l' flamkolono, kiun Dio
alsendis por la vaga trib'.
Nuntempe kiel flamkolonojn
poetojn donis Dia man',
ke tiuj gvidu la popolon
el la dezert' al Kanaan'.

Poetoj, do tra fajro, akvo
ek por popolo, ek por ver'!
Malben' al ĉiu forĵetinta
standardon de l'popol-liber'!
Malben' al ĉiu postrestanta
pro pigro aŭ pro malkuraĝ',
ke, dum aliaj luktas, ŝvitas,
li mem ripozu sub ombraĵ'!

Estas profetoj falsaj, kiuj
malice trompas per malver',
dirante: Haltu, ĉar ni staras
jam sur la promesita ter'.
Mensog', mensog' impertinenta!
Jen milionoj por refut',
kiuj malsate, malespere
sin trenas sub la ŝarĝ' de brut'.

Se preni el abundo-korbo
egale ĉiuj povos jam,
se lokon ĉe la rajto-tablo
egale ĉiuj trovos jam,
se lumo de spirit' briligos
ĉiun fenestron de kaban',
tiam mi povos diri: Haltu,
jen estas jam la Kanaan'.

Sed plu ĝis tiam, plu senhalte,
ni penu, luktu plu sen ĉes'!
Se l' vivo eble la klopodojn
pripagos per nenia prez',
la mort' okulojn niajn fermos
per milda kiso, dolĉa rav',
sur silk-kuseno, per florĉeno
sublasos nin al tomba kav'.

POR LAĈJO ARANY

Laĉjo, nu
venu! Ĉu
aŭdas vi?
Tien ĉi!
Venu nun do,
mord' de hundo!
Sidu en la sin' ĉi tie,
ne moviĝu, ĉar alie
sekvos pinĉ' por venĝi.
Jen ĝi!
Ĉu ne, ve?

Do ne kriu, he,
fermu buŝon mute
kaj malfermu tute
la orelojn, estu pretaj
tiuj viaj pordoj etaj.
Tuj vi vidos,
ke rapidos
tra ili kolora
papili' petola.
Fabeleto, papili',
enkapiĝu do al li!

Estis homo longliphara,
iris al la put' kampara.
Mankis akvo en sitelo,
vidu do, kun kia celo
li ĝin trempis plena?
Ĉu por bed' ĝardena
estus do bezone?
Aŭ li trinkus? Ho ne!
La sitelon plenan prenas,
al la kampo li promenas,
haltas, staras kvazaŭ garde.
Kion fiksas li rigarde?
Ĉu l'fatamorganon brilan?
Li ja vidis jam similan.
Ĉu l'najbar-vilaĝan turon?
Ne tro donas ĝi plezuron.
Aŭ ĉu tiun knabon,
kiu la kanabon
en la akvo sternas?
Ĝi lin ne koncernas.
Ej, do kio?
Hundlegio!
Nu, mi fine tamen diras,
kial li la kampon iras,
kial al li la sitel':
por elverŝo de zizel'.
Ho, ĉiel'!
Jen ĝi sidas,
hop, rapidas
kiel vento,
post momento
ne vidiĝas plu,
estas jam en tru'.
Nia homo ne dormetas,
sed ekkure sin alĵetas,
en la truon
dikan fluon
verŝas de l'sitelo;
truo de l'zizelo
iĝis plena kiel puto;
ĝi toleris dum minuto,
poste ĝi elrampis grize,
malsekiĝis ĝisĉemize.
Kaptis kole ĝin la homo,
portis ĝin al sia domo.
Nun jen ĝi,
tie ĉi,
en mia mano tikla,
ĉar la zizelo vigla
estas, Laĉjo, vi, jes, vi.

Jozefo MÁTÉFFY:

BAROKO EN HUNGARLANDO

Baroka preĝejo S-ta Ignaco en Győr (1633)

Dum sia evoluo la homa socio post plurmiljara sklaveco atingis la epokon de la feŭdalismo, kiu daŭris proksimume 600 jarojn en Eŭropo. Sed alvenis ankaŭ tiu tempo, kiam la feŭda sistemo ne povis jam kontentigi la konstante kreskantajn materialajn bezonojn de la homoj. Ne mirinde do, ke — depende de la lokaj kondiĉoj — jam en la 17—18aj jarcentoj frapas la pordon la heroldoj de la pli progresema, komenctempa kapitalismo. Glatigas la vojon por tiu metamorfozo de la Eŭropa socio la progresemaj sciencoj kaj literaturo, kreante al ĝi ekonomian bazon la ĉiam pli kaj pli ampleksiĝanta komerco kaj financmastrumado.

La aŭroro de la novaj tendencoj ne lasis indiferentaj la malnovajn fortojn. La feŭdala absolutismo timis pro malfortiĝo de sia potenco, aliparte la katolika eklezio—fidela aliancano de la feŭdalaj monarĥoj — klopodas plifirmigi sian pozicion per intensa rekatolikigo de la kreduloj, kiujn ĝi perdis dum la reformacio. Por pli profunde efiki al la homoj, ambaŭ potencoj uzas plej variajn rimedojn. Ili helpvokas ankaŭ la diversajn artojn: arkitekturon, pentro- kaj skulptarton, muzikon, oratoran arton kc.

La stilo de la tiama arto estas nomata *baroko*, kaj pro la menciitaj kaŭzoj la baroko fariĝis stilo de la dekadencperiodo de la feŭdalismo.

La barokon karakterizas potencigita movriĉeco, impona monumenteco, pitoreskaj lumefikoj, fascina pompo, kiuj kune strebas efiki al la homoj nekontraŭstareble. Tio manifestiĝas unuavice ĉe la grandiozaj konstruaĵoj ĉu ekleziaj, ĉu profanaj (preĝejoj, kasteloj, palacoj). La baroko preferas fleksitajn liniojn, ebenojn al la rektaj linioj, ebenoj. Anstataŭ geometrie simplaj formoj la baroko uzas pli komplikajn elementojn, ekzemple kapricajn tegmentoformojn, dekoracie akcentitan ĉefpordon, elipsoformon anstataŭ cirklo, ondlinian kornicon anstataŭ rektlinia. Ankaŭ la skulptaĵoj kaj pentraĵoj reprezentas pompon kaj viglan movon.

Naskiĝlando de la baroko — simile al tiu de la renesanco — estas Italujo. De tie disvolviĝis poste tiu nova art-



Sopron. Domo Eggenberg.

stilo en Eŭropo. Ĝi alvenis ankaŭ nian landon, sed ĉi tie ĝi trovis specialan situacion. Nome la hungara tero estis tripecigita, kiam la baroko ekfloris en la okcidenta kulturmondo.

Dum la turka subpremo (1541—1686) la tiama meza parto de Hungarlando ne partoprenis en la vivo de la kulturmondo. La mahometanoj ne permesis konstruadon, la arta vivo stagnis. Urboj kaj vilaĝoj senpopoliĝis, la homamasoj vivis en mizera sorto. Mankis do ankaŭ la materialaj rimedoj al civilizita vivo. Ne mirinde do, ke la baroka arto komenciĝis ĉi tie nur en la 18a jarcento, post la liberiĝo el sub la turka jugo.

En la orienta landparto (Transsilvanio, nuna Rumanujo) ankoraŭ vivis kaj longe daŭris la renesanco. Nur malfrue anoncis sin ĉi tie la barokaj elementoj.

La okcidenta parto, najbara al Austrio kaj apartenanta al la Habsburga dinastio, estis la unua teritorio, kie la katolika eklezio kaj kelkaj riĉaj magnatoj, fidelaj al la aŭstra imperiestra domo komencis konstruigi en baroka stilo. Tiu landparto iĝis tiel la ekskluziva scenejo de la frua baroko kaj restis tia dum okdek jaroj (1630—1711), ĝis falo de la liberecbatalo de Francisko Rákóczi la IIa.

En la komenca periodo de la baroko havas pli da signifo la eklezia konstruarto ol la profana. Gravan rolon ludas la Jezuitoj, kiuj estas la plej batalemaj soldatoj de la kontraŭreformacio. Tio klarigas, ke ilia ĉefpreĝejo — Il Gesù en Romo — servas modelo ĉe la konstruado de la novaj preĝejoj. Pliigas la efikon se la predikisto kaj la kreduloj reciproke vidas unu la alian, kaj se la medio de la ceremonioj estas parada. La baroka preĝejo plenumas tiujn kondiĉojn. En ĝi ne estas flankaj navoj, mezaj kolonoj, nur vico da kapeloj kaj la larĝdimensia, majeste efikanta, grandioza halo ebligas per unu rigardo vidi la oratoron kaj la abunde riĉajn ornamaĵojn de la preĝejinterno.

El tiu frua epoko devenas la preĝejoj en la urboj Nagyszombat (1626), Kassa (1671), Eperjes (1709) hodiaŭ Trnava, Košice, Presov en Ĉeĥoslovakio. Plej signifa estas inter ili la ĉefepiskopa preĝejo en Trnava. Tuj sekvas ĝin laŭvalore la preĝejo de sankta Ignaco (1633) en la hungara urbo Győr. Ĝia plano imitas iom simpligite tiun de ĝia modelo Il Gesù. La preĝejo havas imponan internon kvazaŭ solenan halon kun belegaj plafonfreskoj de Paŭlo Troger. El tiu periodo devenas ankaŭ la preĝejo de sankta Georgo en urbo Sopron.

Koncerne la profanajn konstruaĵojn ni mencias la hungaran urbon Sopron, kie eĉ hodiaŭ estas videblaj

Eger: La Minorita preĝejo.



Eger: Liceo de Jakobo Fellner (1722—1780). Biblioteko kun murpentraĵo pri la sinodo de Trident.



Fertőd, Baroka pordego de iama princa kastelo Eszterházy



Jakobo Bogdány (1660—1724): Ekzotikaj birdoj



Budapest. Baroka preĝejo S-ta Anna. Internaĵo.

en harmonia tuto la tiamaj modestaj barokaj palacoj kaj domoj. Pro incendio okazinta en 1676 la urbo preskaŭ neniiĝis. Tiam oni rekonstruis ĝin kaj laŭlonge de la mezepokaj kurbaj stratoj oni levis plej parte unuetaĝajn domojn, palacojn en baroka stilo kun pitoreskaj duonkolonoj (rizalitoj), elstaraj balkonoj. Frontonoj kun specifaj pordegoj kaj fenestrobrovoj, arkadaj kortoj donas veran ĝuon al homoj, kiujn plezurigas la arto de la pasintaj tempoj. La bildo montras arkadan korton de la domo Eggenberg en la strato s-ta Georgo. La ŝtonbalkoneto ne estas nura ornamaĵo. Tie predikis la luterana pastro al siaj kreduloj en la tempo de la religipersekutado.

La dua periodo, samtempe la kulmino de la matura baroko en la tuta lando sekvas en la 18a jarcento (1711—1760). Plej belaj pecoj de la tiama eklezia arkitekturo estas en urbo Pest la nuna universitata preĝejo de Andreo Mayerhoffer (1690—1771), en Buda la preĝejo de s-ta Anna (vidu 2/1961. H. V.), la Minorita preĝejo en Eger de Matiaso Gerl (1758—1773), la preĝejo de la Karmelanoj en urbo Győr de Marteno Witwer (1721).

Ankaŭ la profana arkitekturo sekvas la barokan stilon. Aristokratoj, meznobeloj kaj riĉaj burĝoj konstruigas en tiu stilo. La kastelo de Eszterházy en Fertőd, tiu de Eŭgeno de Savoya en komunumo Ráczkeve, la sole restinta baroka domo de la ĉefjuĝisto Péterfy en la Pest-a flanko, kelkaj detalaĵoj kiel la arta pordego el fero de Henriko Fassola en Eger (2/1964. HV.), taŭgas pruvi la altan valoron de la baroka arto.

Multloke en nia lando leviĝas pli-malpli grandaj preĝejoj konstruitaj en baroka stilo. Kompreneble en la vilaĝoj ĉi tiuj temploj estas simplaj, la stilo miksiĝas kun lokaj trajtoj, tamen ili estas por ni valoraj

Budapest. Internurba preĝejo. S-ta Floriano.

kiel siatempaj memoraĵoj. Simile estas karaj por ni la hungaraj barokaj urboj, ekz. Sopron, Győr, Eger kaj la Burgmonto en Budapest.

La karakterizaĵoj de la baroko troviĝas ankaŭ en la aliaj artoj. Temoj de la pentraĵoj estas krom la portreto, ankaŭ la faŭno, pejzaĝo, muta naturo. Elstara pentroartisto estis Adamo Mányoki (1673—1756) kies bildo pri Francisko Rákóczi estas por ni ankaŭ historia memoraĵo. Alia majstro estis Jakobo Bogdány (1660—1724) kies prezentitan pentraĵon gardas la Belarta Muzeo en Budapest.



Baroka palaco en la V-a distrikto de Budapeŝto

La fino de la 18a jarcento estas jam transira periodo de la baroko al la klasikismo. La baroko mildiĝas, perdas sian dinamismon, la aspekto estas trankvila kaj komencas aperi kelkaj klasikaj trajtoj. Tiu stilo de la malfrua baroko prenis sian nomon de la tiama imperiestro Jozefo la IIa (arto Jozefismo), sed estas nomata ankaŭ „copf"-(kapvosto)stilo pro la orname aplikitaj girlandoj. Ĉefverko de Jakobo Fellner (1722—1780) la Pedagoga Ĉeflernejo en Eger (1785) estas eminenta modelo de tiu stilo.

Kune kun la 18a jarcento pasis ankaŭ la baroko, ke ĝi transdonu sian lokon al la artoj de la sekvanta jarcento.

Esperanto kaj la mondliteraturo

La germana kulturo interalie pro du kaŭzoj estas pli feliĉa, ol la ceteraj kulturoj. Unue: tiu ĉi kulturo donis al la mondo la plej universalan individuon de la mondliteraturo: *Goethe*, kiu sen troigo estas „la unua inter la egalaj", due: ĝuste Goethe konstruis la vorton: „mondliteraturo", kaj eksplikis la esencon de tiu ĉi nocio. La mondliteraturo, per kies ideo Goethe genie antaŭis sian epokon, en nia erao alvenis al la sojlo de la realiĝo.

Leonid *Martinov*, la konata soveta tradukisto en la poezie inspirita antaŭparolo de sia verko, en ekstaza vizio alvokas la poetojn, inter kiuj venas Villon, Verlaine, Rimbaud. Sed la vojo, — sur kiu marŝas ne nur tiuj tri —, pro multo de la poetoj estas tiel plenŝtopita, ke Martinov ne povas superrigardi ilin. Unuj venis el la Infero, aliaj el la Paradizo. — „Kion vi volas?" — demandas la miranta poeto. — „Traduku nin!" — sonadas la respondoj ... Poetoj de grandaj kaj malgrandaj popoloj marŝas tra la vojo de la mondliteraturo kaj ĉiuj rajte pretendas: traduki ilin!

Hodiaŭ jam por ĉiuj naciaj literaturoj estas vivkondiĉo, ke ili leviĝu al mondliteratura nivelo, sed tute same ankaŭ por la mondliteraturo estas vivkondiĉo, ke ĝi entenu la kreaĵojn ankaŭ de la plej malgrandaj lingvoj.

Kion diris ĉi-rilate en sia artikolo William *Auld*, aperigita en la „Memorlibro pri la Zamenhof-jaro"? (1960.) „La interkompreniĝo de la popoloj devas okazi grandparte per la interŝanĝo kaj reciproka ekkono de la kulturaj valoroj kreitaj de tiuj popoloj. Kaj tamen tiu interŝanĝo estis ĝis nun neebla pro la lingva diverseco de la homaro. Pere de la literaturo de iu popolo, tiuj, kiuj kapablas ĝin legi, povas konstati ne nur la supraĵajn apartaĵojn de tiu popolo, sed ankaŭ, pli grave, ĝian fundamentan homecon kaj similecon al la aliaj popoloj. Ne pro sia grekeco Odiseo fariĝis universala simbolo, ne pro sia angleco Hamleto, nek pro sia hispaneco Don Kihoto, sed ĉiuj universaliĝis pro la fundamenta homeco de sia karaktero. Tamen nur malmulte ili fariĝis konataj tra la tuta mondo en sia nacilingva vestaĵo, sed ĉefe per transvestiĝo en alilingvajn tradukojn. Sen tia tradukado ili restus nekonataj al la pliparto de la mondo ...

Nun ni vidu kia estas la situacio en la realo koncerne la tradukaĵojn el la malgrandaj lingvoj en la grandajn? — ekzemple en la anglan lingvon en 1957. La indikojn ni prenis el la jara eldonaĵo „Index Translationum" de Unesko. Estis eldonitaj en Britujo 353 literaturaj tradukoj en la angla ligvo. El tiuj tradukoj: 153 estis el la franca, 65 el la germana, 24 el la itala, 17 el la rusa, 10,5 el la greka (antikva kaj moderna), 9,5 el la latina, po 9 el la dana kaj hispana, po 6 el la nederlanda, portugala kaj sveda, 5 el la norvega, 4 el la ĉina, po 3 el la finna kaj japana, po 2 el la ĉeĥa, islanda, jida, pola kaj ukraina, kaj fine: po 1 el 13 aliaj lingvoj (inter ili el hungara kaj urdua — jen la mondliteratura egaleco!), do el 33 lingvoj. Tio signifas, ke 43,3% de la tradukoj estas el la franca lingvo, 18,5 el la germana; kune 61,8% el tiuj ĉi du lingvoj, kaj sekve 38,2% el 31 aliaj lingvoj, kaj tiu ĉi numero inklu-

zivas ankaŭ plurajn „gravajn kulturlingvojn": nome la italan (6,8%), la rusan (4,8%), la hispanan (2,6%), kaj la japanan (0,8%) ...

Ni citas nun nian *Majstron*. „Kiom da tempo, laboroj kaj materialaj rimedoj estas perdataj por tio, ke la produktoj de unu literaturo estu aligitaj al ĉiuj aliaj literaturoj, kaj en la fino ĉiu el ni povas per tradukoj konatiĝi nur kun la plej sensignifa parto de la fremdaj literaturoj." (Fund. Kr. 241—42. 1939.)

Se la fundamento de la konigo de diverslingvaj literaturaĵoj estas la traduko, nepre ni devas iom klarigi ankaŭ tiun ĉi nocion kaj speciale la signifon de tiu ĉi nocio en Esperanto. Por la klarigo mi pruntepreneas la vorton el la muzika terminaro. Traduko estas transponado. Transponado de diraĵo aŭ skribaĵo el iu lingvo en alian lingvon. Arttraduko aŭ tradukarto estas arta transponado de literaturaĵo el iu lingvo en alian lingvon. Kiel difinis la tradukarton nia hungara poeto kaj tradukisto, Dezső *Kosztolányi?!* „La tradukarto estas verkado, ne kopiado. La arttradukaĵo ne tiel rilatas al la originalo, kiel la kopio de iu pentraĵo al la originala pentraĵo, sed kiel la originala pentraĵo rilatas al tiu objekto, kiun la pentristo pentris. Mi sentas tiel — skribas Kosztolányi —, ke la pentraĵo estas pli fidela, pli lojala kaj pli vera, ol la fotografaĵo." La germana *Erich Weis*, prelegante en Lahti (Finnlando) dum la konferenco de arttradukado, donis jenan trafan titolon por sia prelego: „La laboro de la tradukisto estas profesio". Tiu ĉi profesio aŭ vivdestino estas vera arto, kiu postulas talenton, nome plej ofte poetan talenton precipe por la poezio, sed ankaŭ por la prozaĵoj.

Kio estas la tasko de la tradukarto por la lingvo Esperanto, kaj kio estas la tasko de Esperanto por la tradukarto? Kiu kaj kiel kutimas traduki? La tradukisto ĝenerale tradukas el iu fremda lingvo en sian propran lingvon. Tiun ĉi agon mi nomas import-traduko. Se iu tradukisto tradukas el sia propra lingvo en fremdan lingvon, tiun ĉi agon mi nomas eksport-traduko. Sed povas okazi, ke la tradukisto el fremda lingvo tradukas en alian fremdan lingvon. Ekzemple Zamenhof, kiu estis pola, tradukis el la greka, angla, rusa, germana, franca kaj hebrea — en Esperanton. Tiuspeca tradukarto estas samtempe importa kaj eksporta, ĉar li importis por Esperanto kaj eksportis per Esperanto por Esperantujo. Ĉu ni povas laŭdi tiujn Esperantistajn tradukistojn, kiuj uzas sian talenton por import-eksporta tradukado? Ĝenerale ne, nur tre malofte, kiel ĉe Zamenhof, Grabowski, Kalocsay kaj ĉe malmultaj aliaj.

Aŭskultu nur la koleran eksplodon de „Enciklopedio de Esperanto" (II. volumo, 347. o.) „Malgraŭ la plivastiĝo de la esperantistaro, ankoraŭ persistis en iuj rondoj la ĝenerale malaprobinda kutimo traduki el lingvoj, fremdaj al la tradukantoj. En la fruaj tagoj tiu kutimo estis almenaŭ tolerinda, ĉar kondiĉita de la eksteraj cirkonstancoj, sed oni rajtas bedaŭri, ke ankaŭ post aliiĝo de la cirkonstancoj, kelkaj personoj ne limigis sian laboron al tiu kampo, sur kiu ili estis nedubeble plej fidindaj" .... Kiuj estis la tiamaj eksteraj cirkonstancoj? „La unuaj provoj traduki literaturaĵojn en Esperanton havis plej ofte la karakteron de lernejekzercaro." (Enc. de E. II. 346. p.)

„Tre abunda estis la tradukarta laboro de Zamenhof. Tradukoj estis tiam necesaj por pruvi la vivkapablecon de la lingvo kaj por el fundamentoj evoluigi ĝin" — ni legas en la „Kvar prelegoj". Sed Esperanto jam preskaŭ en sia lulilo plenumis tiun taskon, kiu koncernas la mondliteraturon. „En tiu tempo oni plej ofte tradukis el lingvoj rusa, pola kaj germana: afero klarigebla per tio, ke tiuj estis la gepatraj lingvoj de la pli multaj Esperantistoj ...Kun la plivastiĝado de la Esperanto-movado plivastiĝis kaj plioftiĝis ankaŭ la tradukoj el la naciaj literaturoj." (Enc. de. Esp. II. 346.)

Kaj ni nun atingas la esencon de la tradukarto el la propra lingvo en Esperanton. — W. Somerset *Maugham* skribas ie: „Se vi ne dediĉas vian tutan vivon al tio, vi neniam lernos paroli perfekte la lingvon de alia nacio; vi neniam konos intime ĝiajn popolon kaj literaturon. Ĉar-ili, kaj la literaturo, kiu estas ilia esprimo, estas la rezulto ne nur de la agoj, kiujn ili faras kaj la vortoj, kiujn ili uzas, el kiuj neniuj estas malfacilaj, sed de prapatraj instinktoj, nuancoj de sento, kiujn ili absorbis per sia patrina lakto, kaj naturaj kondutoj, kiujn la eksterlandano neniam povas tute kapti".

J. Hammond *Rosbach* trafe aplikas tiujn vortojn de Maugham precize por Esperanto. Aŭskultu lin: „Ĉi tiuj vortoj de la granda angla aŭtoro klare reliefigas la signifon de Esperantaj antologioj pri la diversaj nacilingvaj literaturoj. En tiaj antologioj homoj mem el la koncerna lando kun la koncernaj ecoj menciitaj de Somerset Maugham, tradukas la literaturon, kiun ili tiel bone kaj kone komprenas, ne en alian nacian lingvon, kiun ili ne absorbis kun la patrina lakto, sed en la simplan, fleksebian, belsonan lingvon internacian." (Memorl. 56.) — Grabowski kaj Kalocsay estas vere fenomenaj tradukistoj el dudek-tridek lingvoj. La tuta Esperantujo sincere dankas kaj la poemaron: „El Parnaso de l' Popoloj" kaj la „Eternan bukedon". Sed ni estas pli dankemaj pro tio, ke Grabowski tradukis la polan epopeon de Miczkiewicz, „Sinjoro Tadeo", kaj Kalocsay la hungaran dramon: „Tragedio de l' homo" de Madách, kaj la perlon de la hungara lingvo: „Johano la brava" de Petőfi.

Sed ni nun elektu unu vere tre malgrandan popolon kaj lingvon, nome la *finnan lingvon*. Tiu ĉi kvarmiliona popolo parolas tian lingvon, kiu tute ne similas al la indoeŭropaj lingvoj, sekve nek al Esperanto. Kaj jen la ĵongla miraklo de tiu ĉi „artefarita retorto-lingvo", kiel oni ofte primokas Esperanton. La akcento en Esperanto estas ĉiam sur la antaŭlasta silabo de la vorto, en la finna kaj aliaj finnugraj lingvoj sur la unua silabo. Tiuj ĉi lingvoj tre ŝatas en poemoj la aliteracion, kiu estas karakteriza trajto de tiu ĉi poezio. Kiu povus plej perfekte, plej koncize „transponadi" la plej specialajn proprajojn, se ne iu nacilingva tradukisto, nome Leppäkoski la finnan epopeon „Kalevala". Mi nun prezentos nur du strofojn el la Enkonduko de Kalevala, unue finnlingve, poste Esperante. Mi atentigas vin pri la akcento kaj aliteracio:

Ensimäinen runo: (1—10.)	**Enkonduko: (1—10)**
Mieleni minun tekevi,	*Menso mia estas ema,*
Aivoni ajettelevi	*Cerbo mia certe celas*
Lähteani laulamahan	*Kanti nun, komenci ruli*
Saa'ani sanelmahan,	*Tiujn ritajn rasajn runojn,*
Lukuvirttä suoltamahan,	*Kiujn la prapatroj pensis,*
Lajivirttä laulamahan:	*Kreis nia nobla gento;*
Sanat suussani sulevat,	*Vortoj en la buŝo bolas,*
Puhe'et putoelevat,	*Versoj sur la lango svarmas,*
Kielelleni kerkiävät,	*Ritmoj interdente rajdas,*
Hampahilleni hajoovat.	*Melodioj moduliĝas.*

Komparante la Esperantan tradukon kun diverslingvaj tradukoj de la sama verko, la rezulto preskaŭ ĉiam pruvas la superecon de Esperanto. Memkompreneble la tradukisto devas esti talenta tradukisto, ne nur simpla kopiisto, fotografisto.

Ni konstatu ankaŭ tion, ke Esperanto estas unu el la plej taŭgaj, — se ne diri la plej taŭga — inter ĉiuj t.n. „pontlingvoj". Nur unu ekzemplon. Kalocsay tradukis la poemon de Petőfi: „Johano la brava" — el la hungara lingvo en Esperanton. Tiun Esperantan tradukon elektis „pontlingvo" ĉina poeto, kaj li tiel bonege sukcesis ankaŭ al la „oreloj" de la hungara registaro, ke la registaro honorigis la ĉinan tradukiston per alta ŝtata ordeno.

La XX—a jarcento estas la jarcento de tutmondaj okazintaĵoj. Jes, ni jam trasuferis du mondmilitojn, ofte minacis nin la mondkatastrofo de la atommilito; ni aranĝas mondekspoziciojn, tre vigla estas la mondmerkato, mondekonomio, mondturismo. Ni jam atakas la universon, la aliajn planedojn, ĉar la nia jam estas tre ŝrumpinta por ni. Ni jam havas iaspecan mondliteraturon, kiun Goethe difinis jene: mondliteraturo estas la tuto de tiuj elstaraj literaturaj verkoj de la homaro, el kiuj komponiĝas organika tuto: kiu enhavas transnaciajn literaturajn valorojn por la tuta homaro. — Esperanto: la nova Sento kaj la nova Lingvo venis ne nur en kelkajn landojn, sed en la mondon, kaj tiu ĉi lingvo vere meritas iĝi lingvo de la mondliteraturo, la dua gepatra lingvo de la homaro, lingvo de la mondo.

D-ro Ferenc JÁKI

EL NIA VIVO KAJ KULTURO

Ferencz Rákóczi la 2-a. Nian frontpaĝon ornamas la portreto de unu el la plej eminentaj hungaraj patriotoj, tiu de Ferenc Rákóczi. Li naskiĝis en 1676, ŝia patrino estis Ilona Zrínyi, unu el la plej grandaj hungaraj virinaj herooj. La hungara nacio tiam suferis pro subpremo de la Habsburga dinastio, la „malaltaj klasoj", la popolo mem suferis krom tio pro la ekspluata laborigo de la bienposedantoj. En 1703 laŭ instigo de ribelantaj servutuloj membro de historie fama familio, Ferenc Rákóczi promesis liberecon por la armilkapta malriĉularo kaj en sia manifesto li alvokis la tutan landon batali kontraŭ la Habsburga subpremo. Rákóczi energie klopodis krei nacian ŝtaton, enkonduki merkantilan ekonomi-politikon kaj organizi regulan nacian armeon. Per sia politika horizonto kaj klereco Rákóczi leviĝis super la aristokratojn de sia epoko. Post alterniĝintaj sukcesoj kaj malvenkoj (en la brila jaro 1707 la Habsburga dinastio en Ónod estis sentronigita) en 1711 finiĝis tiu ĉi glora hungara liberecmilito per demeto de la popolaj armiloj. Rákóczi mem fariĝis elmigrinto, kaj mortis en la turka urbeto Rodosto en 1735. Lia nobla figuro plu vivis kaj vivas eĉ hodiaŭ en la koro de la hungara popolo.

*

Mór Korach 80-jara. *Estimplene kaj tutkore ni salutas profesoron d-ron Mór Korach, la faman hungaran scienculon, membron de la Hungara Scienca Akademio, honoran prezidanton de Hungara Esperanto-Asocio. Nia kara profesoro Korach de pli ol duonjarcento kulturis kaj evoluigis la sciencon, edukis kaj edukas multajn sciencistojn. Ekde sia junaĝo li konsekvence kaj ĉiam fidele batalis por la libereco de la popoloj. Post falo de la revolucioj de 1918—19. li restadis dum jardekoj en Italio, kaj akiris gravan meriton per rezultoplena esplorado de la silikatoj. Liajn vastajn konojn, lian profundan scion la universitatoj, esplorinstitutoj kaj laboratorioj utiligis por la scienco. Post la liberiĝo de sia patrujo profesoro Korach fariĝis direktoro de la Teknika-Kemia Esplorinstituto de la Hungara Scienca Akademio. Li ellaboris inter aliaj la teknikon de la elektra ceramika bruligo kaj la teorion de la tielnomata sandviĉa bruligo. Nia profesoro Korach estas entuziasma, aktiva adepto de Esperanto. Li faris multege por enkonduki Esperanton en la sciencon, kaj per tio forigi la ĉiam pli ampleksan lingvan kaoson. En la nomo de Hungara Vivo kaj de la hungaraj esperantistoj ni deziras al nia tre estimata profesoro Mór Korach longan vivon kaj pluan utilegan agadon. (Du gravaj artikoloj de prof. Mór Korach aperis en nia revuo. Jen ĝiaj titoloj: Kontraŭaĵoj kaj konformaĵoj de la teknikajsciencaj lingvoj, H.V. 1964/1. — Esperanto kiel scienca lingvo, 1967/1.)*

*

Hungara Esperanto-Asocio, Budapest, VIII. Kenyérmező utca 6. anoncas abundan programon por 1968. Okaze de la Budapeŝta Internacia Foiro, 20—21 Majo la Teknika Komisiono de HEA aranĝis internacian fakan rekontiĝon. — En la monato Julio estos kvar E-aranĝaĵoj: 6—13 okazos la V-a Somera E-Universitato en Gyula. 7—17 estos aranĝita la Tutlanda E-ista Renkontiĝo de Junpioniroj en Sikonda. 13—14 okazos Tutlanda Esperanto-Renkontiĝo en Kecskemét, kiun partoprenos ĉ. 400—500 personoj. 20—30 estos la Renkontiĝo de la Naturamika Sekcio de HEA en Pécs kaj Abaliget. Kaj poste sekvos Aŭgusto: 10—20 okazos la Somera Esperanto-Seminario en Szeged. 20—30 estos Renkontiĝo de E-Kampadistoj en Szolnok. Bonvolu interesiĝi, resp. vin anonci.

*

La belegan ĥorverkon „Anĝeloj kaj paŝtistoj" Zoltán Kodály komponis en 1935. Ĝi rememorigas en sia sonado, en aplikado de la duoblaj ĥoroj, respondantaj unu al alia, al kreaĵoj de malnovaj komponistoj de Venezio el la 17a jarcento. Antaŭ iom da tempo ankaŭ tiu ĉi komponaĵo estis surdiskigita fare de la hungara sondisko-fabriko Qualiton. La disko de „Anĝeloj kaj paŝtistoj" en Bruselo estis distingita per ora medalo. La ĥoron gvidas Ilona Andor, kiu apartenis al la proksimaj kunlaborantoj de Kodály. La dua disko ankaŭ nun aperigita prezentas la unuan kaj duan arĉ-kvartetojn de Kodály, laŭ interpreto de la kvarteto Tátrai.

*

Dum la pasintjara teniskonkurso en Hamburg, *en la dua turniro la hungara ĉampiono István Gulyás ludis kiel ŝanculo kontraŭ la ĉeĥoslovaka ĉampiono Kukal. En la kvina, decida ludopartio ĉe stato de kvin al kvin la pli ol dekkvin jarojn pli junan Kukal trafis muskolospasmo en la piedo. La reguloj en tiu ĉi kazo permesas nur laŭ la interkonsento de la kontraŭulo pli ol kvin minutan ripozon kaj kuracistan helpon. Gulyás memvole konsentis pri tio. Post la pli ol dek minuta deviga ripozado la kuraciste restarigita Kukal venkis super la hungara ĉampiono. Nun la 37-jara Gulyás, en civilo arkitekta inĝeniero, ricevis belegan moralan rekonon. Unu el la ĉijara gajninto de la premio internacia „Fair play" (Pura ludo) de UNESCO estis donita al la hungara tenisĉampiono István Gulyás. Ankaŭ ni korege gratulas al la bravega sportulo!*

*

En 1967 vojaĝis eksterlanden denove ĉ. unu miliono da hungaraj ŝtatanoj, dek procentoj de la loĝantaro de nia lando. Samtempe kune kun la travojaĝantoj kvar milionoj da eksterlandanoj vizitis Hungarion, kaj el ili du kaj duono da milionoj estis tiuj, kiuj ankaŭ restadis ĉi tie dum plimalpli longa tempo. Hodiaŭ la hungaraj magistratoj per ĉiu ebla maniero subtenas la turismon kaj fremdultrafikon. La mondirantaj hungaroj de jaro al jaro vizitas ankaŭ multajn okcident-eŭropajn landojn, ili kolektas travivaĵojn kaj spertojn.

*

La spertoj akiritaj en la okcident-eŭropaj landoj *multrilate pliigas la pretendemon, kiu efikas instige al la hungara industrio kaj komerco. Hodiaŭ Hungario jam havas plenaĝulan generacion, kiu pri la kapitalismo akiris konojn hejme nur el rakontadoj kaj legaĵoj. Ĝuste pro tio inter la junuloj oni povas trovi ankaŭ rigidajn aŭ libroodorajn opiniojn kaj ankaŭ diversajn iluziojn. La persona spertado poste forigas aŭ modifas la antaŭjuĝojn kaj helpas formi pli ĝustan vidmanieron en multaj rilatoj.*

*

La ĝeneraldirektoro de la plej granda japana libroeldonejo restadis antaŭ kelkaj monatoj en la hungara ĉefurbo. Li konstatis, ke la hungara leksikono- kaj manlibroeldonado atestas pri altgrada scienca, arta kaj socia interesiĝo de larĝaj popoltavoloj. Fakte, de post 1956 en Hungario aperis pli ol dudek diversaj leksikonoj, enciklopedioj aŭ similaj grandskalaj manlibroj. La serio komenciĝis per eldono de „Nova Hungara Leksikono", kiu estis post la dua mondmilito la unua hungara enciklopedio pretigita kun scienca zorgemo. Ĝiaj ses volumoj klarigas ĉirkaŭ kvardek mil titolvortojn de la sciencoj, artoj ktp. La unua eldono, kiu aperis en kvindek mil ekzempleroj, baldaŭ forvendiĝis. Nun oni eldonis la kvaran volumon de la dua eldono en cent mil ekzempleroj.

La sesvoluma Medicina Leksikono *kontentigas la bezonojn de la fakuloj, la unuvoluma higiena manlibro servas por doni higienajn kaj medicinajn konojn por la kleraj homoj. En grandaj ekzempleroj aperas la artaj, eĉ arthistoriaj leksikonoj. Ekzemple la kvarvoluma universala arta leksikono,*

kaj ankaŭ la Muzikarta Leksikono disvendiĝis en po kvar mil ekzempleroj. Aperas ankaŭ teknikaj, krome naturscienciaj enciklopedioj kaj leksikonoj, kiuj okupas sin pri ekonomiaj kaj eksterkomercaj, eĉ pri entrepreno-mastrumadaj kaj uzinorganizaj konoj.

*

Aperis ankaŭ la hungara biografia leksikono, kies titolo povus esti ankaŭ: „Kiu kio estis ? (Angle: „Who was who ?") Ĝin sekvos baldaŭ la biografia leksikono enhavanta indikojn pri vivantaj personoj. Ĝi estos la unua internacia biografia, leksikono, eldonita en Hungario. Ĝi konformas al la angla leksikono „Who's who ? Kun la leksikonoj, manlibroj konatiĝas ankaŭ tiuj multaj dek miloj da plenaĝuloj, kiuj lernante post sia labortempo, kreskigas siajn universalajn konojn kaj fakan instruitecon.

*

La familio en ventego de ŝanĝoj diversaj *montriĝas multe pli stabila, ol preskaŭ ĉiuj aliaj sociaj institucioj. Jen estas kelkaj indikoj de la demografo d-ro Egon Szabady: En ĉirkaŭ 55 procentoj de la hodiaŭaj familioj gepatroj kaj gefiloj vivas kune; ĉ. pluaj 30 procentoj estas geedzoj vivantaj sen gefiloj, do kies gefiloj jam forlasis la familion aŭ la menciitaj geedzoj ĝis nun estas seninfanaj. La restantaj 15 procentoj ĝenerale enhavas patrinon aŭ patron kaj unu infanon, ili do estas „fragment-familioj"*.

*

Du aŭ tri lukrantoj troviĝas hodiaŭ en plimulto de la familioj. Tio estas fundamenta ŝanĝiĝo rilate al la pasinto. En 1949 en pli ol tri kvinonoj de la familioj nur unu persono havis memstaran enspezon. En niaj tempoj la tipo de la hungara familio estas: lukranta edzo, lukranta edzino kaj unu aŭ du gefiloj. La edzo kaj la edzino el vidpunkto de sia profesio kaj de sia lerneja kvalifikiteco estas klaseblaj proksimume en identan kategorion.

*

El la relative alta eksedziĝa nombro *kelkaj personoj kutimas konkludi je tio, ke la familio estas disfalanta institucio, kiu jam ne konvenas al la pretendoj de la moderna homo. Sed la emfazantoj de tiu ĉi opinio forgesas pri tio, ke la pli granda parto de la eksedziĝintoj denove edziĝas, respektive edziniĝas. Tio siĝnifas, ke tiuj homoj trompiĝis ne pri la institucio de la geedzeco, sed sian propran geedzecon ne trovis konvena — konstatis d-ro Szabady.*

*

Laŭ disponaĵo de la hungara ministraro ĝis 1970 en la industrio la semajna 48-hora labortempo malkreskos al 44 horoj. Tiu ĉi malpliigo ne mallongigos la tage okhoran laboron, sed ebligos la kvintagan laborsemajnon, kun libera sabato. En kelkaj laborsferoj, malutilaj por la nervoj, por la sano — kia estas la kemiindustrio, la metalurgio, la mineksplaato, oni laboras jam de post pli longa tempo tage kun seshora labortempo. En pluraj uzinoj ekde komenco de Januaro, oni enkondukis la kvintagan laborsemajnon.

*

El vidpunkto de la solecaj geviroj *estas realigenda socia pretendo la estiĝo de diskreta geedziĝopera institucio. Ĝi agadus ne kiel negoca entrepreno, sed kun la necesa humaneco, faksperto kaj altgrada takto. Hodiaŭ peziĝas vere socia premo sur la kompetentulojn en ties intereso, ke — por helpi la solecajn homojn kiel eble plej baldaŭ — en Hungario kaj en ĉiuj landoj ekfunkciu la „geedziĝa kaj familia servado". Multaj homoj akcentas ankaŭ tion, ke oni devas flankenmeti ĉiun ĝisnunan hipokritecon.*

*

La prizorgado de la gravedulinoj en Hungario estas tute senpaga. La novnaskito ĉe sia naskiĝo ricevas de la ŝtato donace asignilon por 400-forinta suĉinfano-ekipaĵo, krome la patrino apud la kvinmonata pagita nasko-libertempo ricevas ankaŭ 600-700 forintan nasko-subtenon. Eĉ, de la pasintjara Januaro, la patrinoj post paso de la pagita libertempo kun monate 600-forinta ŝtata infanprizorga subteno, povas resti hejme ĝis la du kaj duonjara aĝo de sia infano. Ilia laborrilato restos kontinua ankaŭ dum tiu tempo. Sed, se iu ne deziras ricevi la infanprizorgan subtenon, tiam staras je ŝia dispono la reto de la ŝtataj, respektive uzinaj suĉinfanvartejoj.

*

La kontribuaĵoj por la suĉinfanvartejoj *pagitaj de la gepatroj ne kovras eĉ la kostojn de la funkciigo, pro tio la provizadon de la infanoj certigas unuavice la ŝtata, respektive la uzina, do socia kontribuaĵo. La gepatroj, depende de sia kuna salajro kaj de la nombro de la infanoj, en proporcio de siaj enspezoj devas pagi la kontribuaĵojn por la suĉinfanvartejo. Tio signifas en la praktiko ekzemple tion, ke duinfana familio, kies tuta enspezo estas monate 3500 forintoj, pagas tage ses forintojn, do la prezon de du kilogramoj da pano, kiel suĉinfanvartejan kontribuaĵon.*

*

La ŝtato donas familian helpon en sumo depende de la nombro de la infanoj al ĉiu familio. Por la duinfanaj familioj tio signifas monate 300 forintojn, ekde la tria infano po infano 170 forintojn. Por unusola infano oni pagas familian subtenon ĝenerale nur al la sola vivantaj patrinoj. Ĉiu infano ricevas senpagan kuracistan prizorgon, inkluzive ankaŭ la hospitalan kaj fakkuracistan sanigadon kaj la imun-vakcinojn, kies skalo etendiĝas de la BCG vakcino kontraŭ tuberkulozo ĝis la Sabin-gutoj kontraŭ infanparalizo.

*

Malgraŭ la multspeca subteno de la familioj kun infanoj — *inter la vivcirkonstancoj de la homoj kun sama enspezo hodiaŭ signifas gravan diferencon, ĉu ili havas infanojn kaj kiom. Pro tio en Hungario oni klopodas plu malpliigi tiujn diferencojn. Ĉiam pli multaj asertas, ke la zorgado pri la nova generacio en socialisma lando estas tasko de la tuta socio. Tial de jaro al jaro oni volas plifaciligi la edukadon por la gepatroj.*

*

La katastrofa tertremo en Sicilio kaŭzis profundan kunsenton en la hungara socio. La simpatio esprimiĝis ankaŭ en diversaj materialaj subtenoj. Krom la Hungara Ruĝa Kruco ĉefe la hungaraj sindikatoj kunlaboris en la helpagado. Niaj sindikatoj per aparta flugmaŝino sendis al Sicilio nutraĵojn kaj vestaĵojn en valoro de duonmiliono da forintoj. Kiel Károly Kiss, vicprezidanto de la Sindikata Ĉefestraro diris, la laborantoj de la uzinoj kaj oficejoj de tago al tago akompanis kun granda atento la informojn pri la damaĝoj pro la natura frapego, kaj laŭ sia kapablo ili klopodas mildigi la malfacilan situacion de la senhejmigitaj kaj mizeron suferantaj loĝantoj de la insulo Sicilio.

*

„Ensemblo de liberaj grekaj artistoj" — *kiuj sukcesis ankoraŭ ĝustatempe fuĝi el sia patrujo —, prezentis sian programon en Budapeŝto kaj en la hungara provinco. Kiel la gvidanto de la ensemblo, Gerasimos Stavrou diris: „Nia celo estas, ke la kreaĵojn de la moderna greka arto ni prezentu al la publiko, tiun arton, kiun la diktaturo minacas per neniigo". Ankaŭ la hungara publiko akceptis la grekajn artistojn kun vera simpatio, ĉar pere de ilia arto ekparolas la tuta greka popolo, kaj krias sian doloron kaj esperon en la mondon.*

*

Esperanto Restoracio malfermiĝis en Budapeŝto la 19-an de Januaro 1968. La Gastronomia Entrepreno de la VIII-a distrikto de la hungara ĉefurbo plenumis la deziron de Hungara Esperanto-Asocio, kaj establis tiun ĉi restora-

cion en la strato Népszínház n-ro 30., tuj ĉe la Placo Köztársaság (respubliko), proksime al la ejo de HEA kaj al la Orienta stacidomo. La celo estis krei por la eksterlandaj kaj hungaraj esparantistoj restoracion, kie en agrabla atmosfero ili povas renkontiĝi, aranĝi komunan tagmanĝon kaj vespermanĝon. Estas interese, ke la taga menukarto estas skribata krom la hungara ankaŭ en Esperanta lingvo. La ĉefo de la restoracio kaj la ĉefkuiristo parolas Esperanton, aliaj oficantoj jam komencis la lernadon. La estigo de tiu ĉi Esperanto Restoracio — kies reklamliteroj vespere estas videblaj per neon-lumigado —, apartenas al la meritoj ĉefe de Antal Koós, sekretario de HEA kaj de Imre Szenes, kunlaboranto de la ĵurnalo Népszava. La festparolon ĉe la malfermo faris d-ro István Bácskai, vicprezidanto de HEA. La hungara televido faris dissendon pri la malfermo. Ni alvokas ĉiujn niajn legantojn, vizitu la Esperanto Restoracion en Budapeŝto, kiu afable akceptas ĉiujn siajn gastojn.

*

Mortis d-ro Tivadar Soros (Schwartz) *la 22-an de Februaro en New York. Li estis advokato kaj dum la unua mondmilito fariĝis militkaptito en Siberio. Pri tiuj siaj amaraj jaroj li verkis la romaneton „Modernaj Robinzonoj". En 1922 li fondis la revuon Literatura Mondo, „ĝis nun la plej gravan beletran revuon en Esperanto". Soros estis ĝia eldonisto ĝis 1926. Alia verko de Soros aperis en eldono de Stafeto en 1965 sub titolo „Maskerado ĉirkaŭ la morto" („Nazi-mondo en Hungario"). Tiu ĉi verko rakontas la travivaĵojn, suferadojn kaj mortotimojn de Soros kaj ĝenerale de la persekutitaj judoj en subjektiva maniero. Kvankam la libro havas ankaŭ diskuteblajn detalojn, kaj la ideologio de la aŭtoro ne identas kun la nia, ĝi restos atentiga kaj rememoriga verko pri tiu tempo, kiam en Hungario (kaj aliloke) murdis la homojn po cent miloj la naziistoj kaj iliaj hungaraj kunkulpuloj.*

*

Intervjuo kun la mondfama verkisto Dürrenmatt aperis en la hungara semajna gazeto „Film Szinház Muzsika) (Filmo Teatro Muziko). Ni citas el la gravaj konstatoj, kiuj devas interesi ankaŭ niajn legantojn: „Kio koncernas la konkeron de la kosmo, tio nature ankaŭ min interesas. Sed el vidpunkto de la mondhistorio tamen ne tio estas la plej grava evento. La solvendaj problemoj troviĝas ĉi tie sur la tero: la malriĉeco, la civilizacio, la malmute evoluantaj landoj. Estas multe da farotaĵo sur tiu ĉi tero. Kaj pleje ni bezonas instruistojn. Tiu hipotezo, ke la konkero de la Luno povus solvi la zorgojn de la homaro. estas simple danĝera afero. La mondo, de kiam ni memoras, ne vidis tiajn krizojn, kiel hodiaŭ. La jaro de la teknikaj mirakloj 1967, estis samtempe jaro de la plej grandaj homaj dramoj. Kaj la fundamento fariĝos ĉiam pli rompiĝema. Post kelkaj jaroj nur en Usono oni devos zorgi pri laborebloj por 15 milionoj da homoj. La civilizitaj landoj hodiaŭ estas nur insuletoj. La mondo estas malriĉa. Pli ol duono de la homaro malsatas, kaj kiom da landoj, tiomspeca estas la evoluado. Kreskas la danĝero de la eksplodo. Oni devas krei tian socion, kiu estas kapabla movi, antaŭporti la amasojn . . . Havas en si novan streĉitecon la problematiko de la junularo. Antaŭe la patro ordonis, la familiaj ligoj estis pli striktaj. Hodiaŭ ordonas la junuloj ktp." La eldiroj de Dürrenmatt certe ne estas speco de la „hura-optimismo". Tamen ni bone pripensu ĉion, kion eminentaj pensuloj diras pri estonto de la homaro, kaj dume plej efike kaj serioze ni batalu por la stabila paco.

*

Pupoj kaj legantoj. *Konata hungara fabelistino, Margit Altay, iam en siatempaj gazetoj rakontis al knabinoj kaj prezentis ĉarmajn, iom eĉ seriozajn okazintaĵojn. La tiamaj infanoj, nun jam avinoj, rekonis en tiuj rakontoj sin mem. El tiu generacio multajn la vivo alportis malproksimen de la amata patrujo. Sed ili ne forgesis la viglajn kolorojn de sia infanaĝo. Okazis, ke ie en Kanado dum teotrinkado kune sidis amike kaj iom revante tri-kvar hungaraj virinoj. Iu menciis la nomon de Margit Altay. Tiam ĝermis stranga ideo: ili ne nur skribos al ŝi, sed sendos al ŝi originalajn kanadajn ludpupojn. Kaj ĉar la verkistino — jam maljuna — korege dankis, ili daŭrigis la sendadon de aliaj ekzotikaj pupoj. Ili eĉ instigis amikinojn, parencojn en diversaj mondpartoj al sama agado. Tiel venis aro da pupoj el diversaj landoj: sudamerika bela hispana pupo, blonda Solvejg el Skandinavio, japana gejŝo, oranĝportanta knabo el Israelo, nigruleto el Afriko kaj multaj aliaj. Kun la pupoj venis leteroj, priskriboj de virinaj sortoj kaj Margit Altay scias pri ĉiu ian historion de fora virino, romanon, sorton malgajan kaj strangan, ĝojan kaj esperigan . . . Iu jam estas eksedzino, la edzo forlasis ŝin, alia instruas ie en Azio . . . ŝi eble foje rakontos la romanojn de tiuj multaj pupoj, kiuj plenigas jam tutan vitroŝrankon. Vera internacia, amika, unuanima societo!* (P. B.)

Korespondi deziras

„Tre juna pola E-isto Leĥ Pilch, *kor. kun ĉiuj pri ĉio." VROCLAVO, I. Liceo Ĝ., ul. Poniatovski — 9. Pollando.*

20-jara studentino Gita Levina *kor. pri ĉiuj temoj. Ul. Tolstogo 24/11, kv. 3. MINSK — 1. Sovetunio.*

18-jara Merek Glogiev, *BIALYSTOK, ul. Sienkiewicza 26. m. 65. Pollando, kor. kun okcidentaj landoj. Mi int. BK, gramofondiskojn kaj muzikverkojn.*

18-jara ekonomia studento kor. pri ĉiuj temoj; int. BK, revuojn, gram. diskojn. Min interesas la pop-muziko. Oleg Nazarenko, *Volgogradskaja 10. b. — 13, TAŜKENT, 107, USSR.*

Emer. oficistino Maria Grünwaldova, NOVY BOR II—122(P5)33. okr. Ĉeska Lipu, ĈSSR. kor. k. c. l.

18-jara Jerzy Dryja, KALISZ, Storszica 28(a)16. Pollando, kor. pri lingvistiko, geografio kaj vojaĝoj, kol. BM, PM. Mi konas E-n, la rusan kaj anglan lingvojn.

Muzikinstr. pri fortepiano, akordiono kaj bajono Romano Grinŝpan, *Sovetunio, Uzbekistan, TAŜKENT, 143. Centr. Lunaĉarskovo, ul. Abaja 4. kor. pri ĉiuj temoj; int E-librojn kaj gazetojn kontraŭ rusaj libroj, revuoj, sondiskoj, PM ktp. Eblas instruado al rusa lingvo.*

10-jara Janúsz Szerepanovszki, *lernanto de Teknikumo Industria, Vilków ul. 56. pov. GLOGÓV, Pollando, kor. pri E-movado, literaturo, muziko, ktp., kol. BM.*

La Ŝtata Scienca Biblioteko en Lvov-Ukrainio preparas bibliografion de la verkoj de la fama poeto Taras Ŝevĉenko, tradukitajn en lingvojn itala, hispana, kataluna, portugala, kaj E. Helpu per alsendo de informoj: kiaj verkoj de Ŝ. estas trad. en tiujn lingvojn. USSR, LVOV, Ukrainio, str. Kostjuŝko 217. M. Gresyko.

Verda Stelo E-Grupo kor. kun gejunuloj el la tuta mondo. BERHIDA, Kulturdomo, Hungario.

Esperanto-Gramofondisko n-ro 5866 „Balkanton" kun modernaj danckantoj („Bonan nokton", „Steletoj", ktp.) de la komponisto Misa Zdravev mendeblaj ĉe Hémus (Exp-Imp.) 11 Place Slaveikon, SOFIA.

La Junulara Esperanto-Rondo de Szczecin gvidas ses E-grupojn en la plena semajna horaro. La Rondo korespondas kun hungaraj infanoj en Budapest. Sopron, Mickolc, Nagycenk, Szirmabesenyő, kaj serĉas korespondantojn en aliaj landoj. Palac Młodziezy, SZCZECIN, Pollando.

25-jara Nikolaj Starodubcev, *do vostrebovanija, DONJECK—47, Ukr. USSR. int. BK.*

Int. il. BK (kiel almetaĵoj al leteroj): Maria Kozlowska, *dentkuracistino, BYTOM, ul. Kopernika 16a. Pollando.*

28-jara kemiisto kor. kun ĉiuj landoj, int. BK kaj alumetetikedojn. Makarov Vladimiri Ivanoviĉ. MOŜKVO B—66, Novo-Rjazanskaja 36. kv. 24.

42-jara agregaciulo de literaturo kaj historio, Alojzo Tornay, *Gimnazio, AJKA, Hungario, kor. ĉefe kun kolegoj.*

Frigyes KARINTHY

EN LA MONDON VENIS NOVA SENTO

(Notoj al la Esperanto-kongreso)

Dum du semajnoj en Budapeŝto restadis mil kvincent homoj el ĉiu angulo de la tero.

Inter ili estis japanoj kaj brazilanoj, kaj estis, kiuj venis el Aŭstralio kaj Sud-Ameriko. Multaj nacioj; kiel oficiale oni konstatis: gefiloj de landoj aŭ ŝtatoj parolantaj sesdek sep diversajn lingvojn.

Tiuj mil kvincent homoj portis en la butontruo malgrandan kuprotabuleton, kiel insignon; sur la insigno videblas verda stelo.

Kaj en tramo, sur strato, en restoracio kaj publikaj prelegejoj, se du tiaj verdastelaj homoj ekvidis unu la alian, ili premis la manon reciproke, diris „saluton" aŭ „bonan tagon" kaj komencis konversacii tre bonhumore en tre alloga, oleece ruliĝanta, italece kantanta birdolingvo.

Kun la propraj okuloj mi vidis jenojn:

Italan kanonikon babili, rideti, diskuti kun Galicia pola judo, du minutojn post tio, ke ili renkontiĝis la unuan fojon de sia vivo.

Japanan fraŭlinon mi vidis en vigla diskuto kun norvega komercisto pri la senco de iu novelo de iu hungara verkisto, kiun unu el ili legis Esperante en Tokio, la alia norvege en Stockholmo, tradukitan el Esperanto.

Fine kamparan-junulon el Mezőkövesd, dum li en akompano de ceremoniaj gestoj ion klarigas al brazila universitata profesoro, kiu aprobe balancas la kapon, poste faras scivolemajn demandojn kaj diligente notadas en sia verdastela notlibro.

Kaj poste mi vidis sur la podio de la Muzikakademio, en griza vestaĵo, dekokjaran junulon, antaŭ la fortepiano.

Nederlanda knabo. Sur lia kortuŝe, bela, entuziasma, ekzaltinta vizaĝo montriĝis ia knabineca, mola rideto, dum liaj fingroj sur la klavoj faris sian sorĉistinan dancon — kia stranga, rideto! Tiuj ridetas ĉi-maniere, por kiuj la interna mondo de l' animo estas tro bela por elteni la krikoloran panoramon de la ekstera mondo: kiu tiel ridetas, ordinare fermas dume la okulojn.

Tiu ĉi junulo neniam ilin malfermis: ekde sia naskiĝo li estas blinda. Li venis kun la internacia societo de la esperantistaj blinduloj. Ili parolis Esperante, ili legis Braille-sisteman fingroskribaĵon skribitan en Esperanto.

Poste mi ankaŭ paroladis kun tiu ĉi junulo. (Angle, ĉar Esperanton — kvankam mi ĝin komprenas sufiĉe bone, — bedaŭrinde ankoraŭ mi ne parolas akcepteble.) Per la sama rideto miranta, atentanta al internaj voĉoj venantaj el alia mondo li respondadis al miaj simplaj demandoj — el la alto de ia neforskuebla trankvilo kaj paco, kiun ne perturbas vidataj vizioj.

Kaj adiaŭinte lin, dum mi foriris en la koridoro, hontante pri ĉiu kolero, pasio kaj blasfemo, per kiuj iam mi ribeladis kontraŭ la vivo kaj sufero, ĉar mi vidis el ĝi tro multe, — samtempe subite mi komprenis ankaŭ tion, kial por tiu ĉi trankvile ridetanta junulo, se temas pri parolado kun civitano de fremda lingvo, estas pli simpatia la artefarita lingvo, pretiĝinta kiel helpilo apud la lumiga meĉo de la indulgo kaj bona volo, ol certa organika, vivanta parol-sistemo, kiun batalantaj kaj konkerantaj popoloj ŝvitis el si dum jarcentoj, por ĝin altrudi al la venkitaj kaj subjugitaj alilingvanoj — ol vivantaj lingvoj, kun buntaj, variaj spuroj, memoraĵoj kaj rudimentoj de la vundoj, oblikviĝoj kaj tordiĝoj akiritaj en bataloj.

Ĉar en ĉiu vivanta lingvo estas io ofenda kaj defia kaj minaca por la alilingvano. Vane akiras la mondon la angla lingvo — la konkero restas konkero ĝisfine, ni devas venki kontraŭstaron kaj malkontenton, ĉiuokaze, kiam ni ĝin uzas anstataŭ nia propra lingvo: ne tial, ĉar ĝi estas fremda

lingvo, sed tial, ĉar ĝi estas lingvo de fremda popolo.

Al la ideo de la lingvo Esperanto ne ligiĝas ideo kaj memoro de popolo militema, batalanta por siaj interesoj. Ĝi ne batalas kontraŭ nacioj, kontraŭ lingvoj, ĝi ne volas enfandi, ŝanĝi, forbalai, neniigi, silentigi iun vivantan lingvon. Ĝi volas ekzisti sen tio, ke ĝi negus ekziston alian. Ĝi havas nenian celon alian ol kiun ĝi anoncas pri si mem: ke ĝi faru ordon en la Babelo de la mondo. Ĉiu parolu sian propran lingvon kaj krom ĝi ankoraŭ unu, tian kiun ankaŭ ĉiu alia homo komprenas en la tuta mondo. Mi havu unu lingvon por mia patrino, por miaj gefratoj kaj mia familio, kaj unu alian por povi paroli ankaŭ kun la najbara familio, kie ajn mi ĝin trovas, ĝi estu nek ilia lingvo, nek la nia. Tria lingvo, kiun kreis la soifa sopiro kaj espero, ke mirante kaj ĝojante ni nin rekonu, homoj, unu la alian, ni rekonu nin similaj unu al la alia, en paco, sen batalo, sen perforto.

Mi ne diras alion: imagu, kion povas signifi por denaska blindulo, se oni parolas pri batalo kaj milito. Ke la homoj kutimas kvereli kaj interbatali, ili murdas unu la alian, ekde tiu minuto, ke iliaj bebo-okuloj malfermiĝis. Ĉu do, pensante pri tiu ĉi afero por li nekomprenebla, ni ne devas fine senti, ke ni estas propre kriplaj, kompare al li?

Kaj se mi pensas nur pri tio ke povas ekzisti ia Lumo, rilate al kiu ni ĉiuj estas blindaj en tiu ĉi mondo — mi devas rideti, imagante, kiel haltus, hontante, ĉiuj batalantaj kaj agitantaj kaj diskutantaj kaj argumentantaj gestoj en tiu momento, kiam la fanfarona Homo iun tagon konsciiĝus je tiu lumo.

Ni haltus kaj hontante ni rigardus unu la alian, kun armilo ĵus pikanta kaj haltinta en la mano — kaj kun la haltinta trulo, per kiu ni komencis konstrui babelan turon, vere, antaŭ sesmil jaroj, kiam Dio perturbis nian lingvon — ne el kolero kaj ĵaluzo, ĉar ni volas atingi en liajn landojn: nur por averti, ke antaŭe ni provu kompreni unu la alian, antaŭ ol ni volus solvi la sekretojn de la Kreado, antaŭ ol ni volus lin mem kompreni.

Mi diris al iu homo:

— Kial vi klarigadas, kial vi pruvadas mane-piede? Ke vi ne komprenas — kio estas la kaŭzo de la kontraŭstaro kaj deteniĝemo, kiun (strange, ĝuste en la rondo de la spirita aristokratio, en la rondoj de la religio de la *vorto)* ofte spertas la esperantisto. Estas ja evidente, pli klare ol la suno, ke Esperanto estas bona afero, ĝusta afero, racia kaj bela afero. Ĝi kunigas la mondon, sen ĵaluzo. Ĝi estas bone konvena por konversacio, internacia interrilatiĝo, aŭ kiel diplomatia, scienca kaj komerca faklingvo. Kion ĝi signifas en la beletristiko, pri tio, rapide du indikojn — la unua, ke en 1910 en Parizo oni faris provon. Francan tekston ses nacilingvanoj kaj unu esperantisto tradukis en la propran lingvon, poste francoj retradukis la sep tradukojn, — nu, la aŭtoro de la teksto, kiu ricevis prete la sep tradukojn, elektis senhezite la tekston tradukitan en Esperanton kaj retradukitan el Esperanto kiel la plej fidelan, plej similan al la originalo. La alia estas mia propra kazo: du miaj libroj aperis Esperante kaj multegajn kritikojn mi ricevis el ĉiu parto de la mondo, almenaŭ en tridek lingvoj, ankaŭ en tia gazeto, kies recenzinto legis tekston tradukitan el Esperanto.

— Mi diras al vi, kio estas la kaŭzo de la malinklino. Esperanto estas tro bona kaj ĝusta kaj racia. Amiko, la agadojn kaj decidojn de la homoj regas ne la prudento, sed la fantazio, kiun en ordinara lingvo oni nomas modo. Ekzistas stupidaj kaj malraciaj kaj malĝustaj, eĉ malbelaj aferoj, kiuj disvastiĝas en la tuta mondo, ĉiu akceptas kaj imitas ilin, simple pro tio, ke la ceteraj ĝin faras kaj la plej forta homa instinkto eĉ nun estas tiu, kiun ni heredis de tiu certa nia praulo. La portado de la dura kolumo kaj de la kravato estas unu el plej stupidaj kaj malraciaj aferoj — tamen, ĉi-momente pli multaj portas sur la terglobo kravaton kaj duran kolumon, ol kiom parolas Esperante. Ankaŭ mi portas ilin, mi kiu tion scias.

— Esperanto estas io tro perfekta, jen ĝia malforta flanko. Se vi volas, ke ĝi enmodiĝu, ne fanfaronu pri tio, ke Tolstoj kaj Anatole France kaj la plej grandaj spiritoj rekonis ĝian rajtecon. Prefere heroldu, ke la princo de Wales kaj Mistinguette kaj Buster Keaton parolas Esperante kaj tiel ili ekparolos en la parolanta filmo. Okaze de la kongreso solan vere efikan kaj ĝustan reklamon mi legis — intervjuon, kun la aktorino Ilona Titkos, kiun oni demandis, kio estas ŝia opinio pri Esperanto.

— Koncerne min, mi estas tiel malmodesta, ke mi kredas, ke mia modesta opinio ne multe utilos al vi: mia opinio estas ja opinio trapensita kaj kompetenta. Do nur sekrete, por privata uzo, mi ĝin komunikas al vi: mia opinio estas, se estis kaj estas lando ĉi-momente sub la suno, kies unuaranga intereso, eble garantio kaj vivsavo estas, ke Esperanto triumfe konkeru la mondon, ĝuste tiu ĉi lando estas la nia, kara amiko, — ni devus estimi en Zamenhof la savantan Lohengrinon de nia enprizonigita belega lingvo, de nia grandioza Genio enprizonigita en nian lingvon — kaj en la Verda Stelo tiun kolombon, kiu sendas al ni fajrajn langojn, kiel la kolombo pentekosta.

Tradukis: *L. Tárkony*

Frederiko KARINTHY

LA CIRKO

Evidente estis tiel, ke mi per ardanta koro deziris viziti la cirkon, sed, eble mi same deziregis ankaŭ la violonon. Poste okazis tiel, ke mi jam ricevis la violonon, sed oni ne kondukis min al la cirko. Tial estiĝis, ke mi foje-foje revadis pri la cirko, — foje mi eĉ vidis ĝin de malproksime, de malantaŭ la montetoj, kaj ŝajnis al mi, ke iu prenas mian manon kaj kondukas min. Alifoje mi subite staris meze de fremda grandurbo, sed ĝi estis la sama cirko, la sama enirejo: duflanka vestiblo. Ĉifoje jam okazis tiel, ke mi ŝajnis havi eĉ bileton, mi jam povintus eniri, sed tamen nebuliĝis la sonĝo kaj mi denove ne povis eniri.

Sed lastfoje mi jam sukcesis ĝin trasonĝi. Mi staris tie, malantaŭ la kaso, ĉe la enirejo kaj apud mi staris moviĝema, barba, lameta homo: la impresario. Li flankentiris la buntan kurtenon de la enirejo per unu mano kaj laŭtege vortgalopis:

— Ĉi tien, ĉi tien vi bonvolu! Tuj ĝi komenciĝos! Bonvolu, bonvolu!

Kaj la homoj svarmis, — multegaj homoj, bunta popolo. Servistinoj, soldatoj, modĉapelaj sinjorinoj, bonrazitaj sinjoroj. Ili tumultis interpuŝiĝe, ridadis kaj laŭte babiladis.

Mi tuj sentis, ke la impresario tuj ekvidos min. Li vere ekvidis min kaj kaptinte mian brakon, indigne li diris:

— Bonvolu, bonvolu! Ĉu vi havas bileton? Se jes, bonvolu! Se ne, tiam forportu vin!

Mia koro ektime kunpremiĝis, mi ekbalbutis, ke bileto malestas, sed mi ja ne volas al la spektejo, sed mia violono . . . kaj tremante mi montradis mian violonon, kiun mi — nature, — premtenis sub mia akselo.

Li kliniĝis al mia buŝo kaj kolere atendis, dum mi elbalbutis, ke mi ne havas bileton, sed mi komponis kanton. Mi mem . . . Por mia violono . . . Kaj se li min lasos eniri, mi ludos ĝin al la publiko.

Tiam li komencis ridegi, tiom laŭte, ke mi povis vidi en lia buŝo, kiel en tunelego, la gorĝon, Poste li rigide diris laŭvorte:

— Junkamarad frenezeta, via koro tumultega.

Mi trovis ĉi tion tre sprita poemo kaj la impresarion videble trafis agrable mia spontana altestimo. Li amikece frapetadis mian ŝultron, kaj diris, ke mi atendu, probable eblos fari ion. Ni priparolos la aferon.

Poste li envenis al la malluma koridoro, kie mi frostotreme staris kaj li, per degna bonintenco diris, ke la violonado tiel, en si mem, estas entute nur paralelepipedono. *Tuj mi ekkomprenis ties signifon: li ne fidas je mia sukceso. Mi komencis ĵuradi, sed li serioziĝis kaj komunikis, ke ni eble povas ĝin provi, sed antaŭe ni devas ĝin anonci al la soldatara superkomisiono, kie mi ricevos stampon, kiel imperiestrareĝa* garbonisdo. *Sed dume, ĝis tio efektiviĝos, li montros al mi la cirkon, fone la aktorojn, bestojn, do ĉion, por ke mi havu imagon pri la problemo: kio plaĉas al la publiko?*

Mia koro forte batis pro la feliĉa ekscitiĝo pri tio, ke mi vere sukcesis enveni, sed tamen mi timis. Pene mi premtenis sub mia akselo la violonon. Li kondukis min inter multegaj kurtenoj, sur kiuj estis vivecaj pentraĵoj. Alte supre laboris ruĝvestitaj homoj. Mi esperis ekvidi ankaŭ aktorojn aŭ rajdistinojn, sed vane. Sekvis larĝa, longa ŝtuparo. Poste ni trairis velurtapetan ĉambron. Hazarde mi malfermis iun pordon, tra kiu entorentis al mi flagra bruo, kriado, kaj mi ekvidis amasiĝi multegajn homkapojn. La impresario alkriis min, ke mi rapide fermu la pordon, ĉar tiuj homoj estas la publiko mem, ili atendas la spektaklon kaj ili ne rajtas ĉi tien enrigardi.

Poste li malfermis ferpordeton: sube etendiĝis giganta, duoncirkla halego. Meze de ĉi tiu pompa, palmarbara, fontanhava halego, iu belvizaĝa viro dentgrincante kaj kun sovaĝaj okuloj sufokadis virinon. La virino eligis pezajn, stertorajn voĉojn. Terura vidaĵo ĝi estis! Mi komencis laŭte kriadi kaj kolere mi postulis, ke oni eltiru ŝin el liaj manoj. Sed la direktoro ekkaptis mian brakon:

— Stultulo! — li diris. — ĉi tiuj estas miaj aktoroj! La tuta sceno estas komedio! Kaj cetere, ili ne estas veraj homoj, ili estas el vakso!

Pli atente rigardante jam ankaŭ mi vidis, ke la vizaĝo de la virino estas vere kontraŭnatura kaj ŝiaj okuloj estas el vitro.

Mi hontis la aferon kaj ekparolis pri aliaĵoj, sed mia koro forte batadis. Nun la direktoro gvidis min en grandan, senordan ĉambron, kie en benkoj sidis buntvestitaj, ŝminkitaj geknaboj, kiel en lernejo. Ankaŭ mi estis sidigita en benkon kaj la direktoro vice vokis al la katedro la lernantojn por pridemandi ilin.

Unu el ili alvenis kapaltere, manpaŝante kaj lian kapon foje-foje frapis al la tero, Ĉi tiu devis ripeti la gimnastikon. Poste li elvokis iun altan viron, kiu elprenis tranĉilon kaj tranĉis sian bruston. El la vundo verŝiĝis sango kaj pulmo. La viro laŭte veadis kaj falis sur la teron. La direktoro aprobe kapjesis:

— Tiel estos bone, — li diris. — Ĉi tio nepre plaĉos.

La memmortigisto reiris al la benko, elprenis kudrilon kaj fadenon kaj kunkudris la bruston. Tiam mi vidis, ke jam multaj similaj cikatraĵoj strias sur lia brusto.

Venis aliuloj, kiuj produktis aliajn spektaklaĵojn. Troviĝis ventroparolistoj, kiuj imitis la voĉojn de homoj kaj bestoj tiom precize, ke mi apenaŭ kredis al miaj oreloj. Unu el ili parolis infanvoĉe, sed tiel precize, ke miaj okuloj larmiĝis, ĉar li imitis la voĉon de mortanta infano. Sed rigardante al lia vizaĝo, mire mi konstatis, ke liaj okuloj kaj buŝo

estas senmovaj. La alia imitis plorantan kaj blasfemantan virinon. Venis aliaj virinimitistoj. Eksonis raŭka, ridanta kverado kaj en la mallumo flagris minacaj okuloj.

La direktoro nun rigardis en libron kaj diris mian nomon. Mi ekstaris. Li fiksrigardis min kaj rapide demandis:

— Kion vi scias?

Mi montris la violonon kaj denove mi balbutis ion pri melodio, kiun mi komponis. Rido trakuris la ĉambregon. La direktoro kolere ekfrapis la tablon:

— Eĉ nun vi molestas min per tiu violono! — li diris. — Kiaspeca elmondiĝinta brokantaĵo!

Mi intencis diri, ke la melodio, kiun mi komponis, estas iaspeca tre speciala kreitaĵo kaj mi volus ĝin prezenti, se ili permesas. Sed li elvokis knabon kaj gvidigis min per li, por ke li montru al mi la muzikinstrumentojn.

Mi estis gvidata al alia ĉambro. Ĉi tie staris gigantaj maŝinoj kaj ilegoj. Ĉiu el ili estis muzikinstrumento. Troviĝis gigantaj trumpetoj, funkciigataj per blovmaŝinoj. Se oni premis butonon, tondregis el la trumpet-gorĝoj. Trianguloj, tiom grandaj, kiel ĉambro, kiujn frapis vapormartelegoj. Sur tamburgiganto rondiradis elefantoj kaj tamburis per siaj piedoj. Troviĝis mirakla orgeno, kiun funkciigis elektra maŝino, kiu samtempe funkciigis ankaŭ tridek fortepianojn kaj mil ŝtalfajfilojn. La plej alta fajfilo havis la grandecon de fabrika kamentubo. La kapelestro staris sur alta ponto. Se li disetendis la brakojn, ekhurlis unusola akordo kaj estiĝis uragano, — mi ektimis, ke ĝi tuj forblovegos min. Antaŭ la muzikistoj estis klavara tablo, simila al tiuj de la kompostmaŝinoj. La muzikistoj laboris kun okulvitroj, senĉese rigardante la muziknotojn.

Kapturniĝe kaj kun zumantaj oreloj, mi reiĝis al alia sekcio, kie min jam atendis la direktoro. Mi raportis, ke mi vidis la instrumentojn, sed mi ne konas ilin kaj mi ne povas muziki per tiuj. Li ŝultrolevante diris, ke li tre bedaŭras, sed tiuokaze la afero estas fuĝente.

Tiam mi staris antaŭ du kurtenaj pordoj, kiuj kondukis al la teatro. La aktoroj, en milspecaj maskoj, enrapidis tra la unua pordo kaj, dum ĉiu kurtenmoviĝo, tra la fendo elradiis multkolora lumfasko. Mi intencis eniri, sed la direktoro diris, ke, se mi ankoraŭ scias nenion, pli konvene estus unue rigardi la kadavrokameron.

Ni eniris tra la alia pordo. Malluma koridoro gvidis al la kelo. Etlumaj gasflamoj susuris je grandaj distancoj. Ambaŭflanke, en nebula kaj densa mallumo troviĝis niĉoj. Blankmantelaj, malpurvizaĝaj servistoj iradis internen-eksteren. Min ekkaptis teruro kaj mi ne kuraĝis enrigardi. Ĉe la fino de la koridoro la direktoro haltis kaj paroladis kun iu.

Mi ŝtele ĉirkaŭrigardis: — apud la muro staris longaj, ladkovritaj tabloj, sur kiuj kuŝis senvestaj kadavroj: maljunuloj, infanoj. Poste mi vidis malnovajn, preparitajn korpopartojn. Peza, sufoka formalin-odoro inundis el la profundo. Mi vidis, ke eĉ alia, tute malluma koridoro iras pli malsupren.

La direktoro parolis pri mi. Ŝajnis, ke li rekomendis min al la kuracisto, por ke mi povu resti tie. La kuracisto rigardis al la malluma koridoro.

Tiam mi komencis petegi, por ke mi ne devu resti ĉi tie. Mi promesis prefere ellerni ion, per kio mi povos rolludi, se mi alimaniere ne povas. Ili kapneis kaj la kuracisto deklaris, ke mi povos akiri sukceson nur per akrobatismo, ĉar la publiko jam estas senpacienca.

Nun mi estis kondukata en altan, subtegmentsimilan ejon. Tra malgrandaj bovokuloj mi vidis la urbon, tute profunde sub mi. Al la muroj apogiĝis vico de mallarĝaj, longaj eskaloj. Ŝnuregoj, gimnastikiloj kaj retoj kuŝis diversloke. Sur la eskaloj laboris akrobataj knaboj.

Oni starigis eskalon antaŭ min, por ke mi suprengrimpu. Kiam mi estis sur la pinto, oni elŝovis la eskalon tra la fenestro super la straton. Mi spasme klopodis teni min fikse kaj, kiam mi rigardis malsupren, mi vidis la tutan urbon. La sube svarmantaj homoj ŝajnis kiel formikoj. Tiam mi ekkrietis kaj perdis mian konscion.

Sed mi denove estis tie kaj tra semajnoj, monatoj mi lernis kaj ekzercis. Mi grimpis supren-malsupren sur la eskalo. Poste mi jam sukcesis stari sur la pinto de la eskalo, kaj tiam oni suprendonis al mi seĝon. Mi singarde, ekvilibrante starigis la seĝon sur la eskalon kaj mi paŝis sur la seĝon. Poste mi faris la saman per du, kaj tri seĝoj. Kaj sekvis longa tempo.

Post longa tempo, fine, mi povis iri al la scenejo. Sed tiam mia vizaĝo jam estis mallarĝa kaj sulkoplena kaj estis ŝminkita, simile al tiuj, kiujn mi vidis unuafoje.

Nun jam ŝajnis, ke mi estas ĉi tie jam de multajmultaj jaroj kaj mi jam konas ĉiujn partojn de la cirko. Mian korpon tegis rozkolora trikotveŝto kaj mi lace vagadis inter la obskuraj flankkurtenoj. Ŝvitantaj servistoj kuradis kaj portadis la pezegajn tapiŝojn. Susuris obtuza, senĉesa zumado kaj mi estis laca por ekscii ties kaŭzon. Subite ekis akra, malsana lumo, antaŭ miaj okuloj diskuris ambaŭflanken la veluraj kurtenoj. Trans la kurtenoj kunpremiĝe amasis maro da homaj kapoj, — eksonis abrupta aplaŭdo kaj poste atendega, susura silento.

Mi staris tie, sur la tapiŝo de la vasta kaj brilluma scenejo.

Nun mi kuris al la mezo per senbruaj paŝoj. La lumfasko de la reflektoro sekvis min. Mi riverencadis per serpentaj gestoj al la loĝioj. Poste mi ekkaptis la eskalon kaj rapide, senbrue, — tiom facile, ke mi ne sentis mian korpon, — mi suprengrimpis al kvaretaĝa alto. Tie, sur unusola, maldika ŝtupo mi singarde, ekvilibrante balanciĝis dum kelkaj momentoj. Tiam, — per longa bastono, — oni suprenŝovis al mi ferpiedan tablon. Mi ekkaptis ĝin kaj per ĝiaj du piedoj facile fiksis ĝin al la supera ŝtupo de la eskalo. Poste mi grimpis sur la tablon kaj stariĝis sur ĝin, dume mi senĉese min balancis. Nun sekvis tri seĝoj, unu super la alia. Mi aŭdis kontentan murmuron de la publiko kaj mi grimpis sur la konstruitaĵon. La lasta seĝo staris kapaltere. Sur unu ĝian

piedon, kiu balancante rotaciis, kun retenata spiro mi starigis la pinton de giganta kubo. La tuta konstruitaĵo tiel facile tremetis sub mi, ke mi sentis: mia korbatado tremante trakuras ĝis la plej malsupra ŝtupo de la eskalo. Fine sekvis la masto. Minutojn daŭris, ĝis mi povis ĝin fiksi al la supra pinto de la kubego. Poste mi lante suprengrimpis la maston. Sur la pinto mi haltis kaj ekripozis. La ŝvito deglitis sur mia vizaĝo varmege, malrapide. Ĉiuj miaj muskoloj streĉiĝis kaj tremis, kiel la pafarko. Mi atendis, ĝis la ŝanceliĝo de la konstruitaĵo haltos.

Kaj tiam, en morta silento mi rektiĝis. Mi elbutonumis mian trikotveŝton kaj eltiris la violonon.

Per tremantaj manoj mi surmetis la arĉon . . . Nun, per unu piedo palpadante, mi malprenis la maston, — mi kliniĝis antaŭen . . . kelkminute mi ekvilibris . . . kaj eluzante la silenton de la teruro, kiu sube malfermis la buŝojn kaj premtordis la korojn, . . . lante, tremante, mi ekludis la melodion, kiun mi delonge aŭdis foje sonori kaj plorsingulti en mia koro . . .

Trad: *Sándor Szathmári*

Frederiko Karinthy

Frederiko Karinthy (1888—1938), la plej granda hungara filozofo-satiristo estis fervora amiko de Esperanto. Li estis prezidanto de nia centra organizo. Pluraj liaj verkoj estis esperantigitaj („Morgaŭ matene", „Norda vento", „Faremido", ktp.) Per siaj prelegoj, artikoloj ĉiam li apogis nian movadon.

Ĉi tiu lia novelo verkiĝis antaŭ la unua mondmilito kaj ĝi priskribas sonĝon. Tial troviĝas la groteskaj situacioj kaj bizaraj frazoj. („Junkamarad frenezeta . . .", „paralelepipedono", „garbonisdo", „fuĝente".)

La senco aludas la sperton, kion W. Auld esprimis tiel: „satiro ne estas ĉies furaĝo". La vasta publiko ekvidis en liaj satiroj nur supraĵajn ŝercojn, facilajn humuraĵojn, sed ne la filozofian kernon. Oni devas plenumi la deziron de la vasta publiko: prezenti cirkajn spektaklojn, trivialajn ŝercojn kaj en tiuj ĵonglaĵoj enŝteli la veran, valoran filozofian enhavon.

Karinthy ricevis la epiteton: „la ridanta filozofo" kaj *La cirko* estas mia plej ŝatata novelo el liaj verkoj, ĉar ankaŭ mi havis la saman sorton: miaj recenzistoj konstatis, ke *Maŝinmondo* estas scienca fikcio kaj diskutis, ĉu maŝinoj entute povos havi memstaran pensadon, aŭ ne. Ili konstatis, ke *Vincenzo* estas historia rakonto. Ili vidis nur la cirkan spektaklon sed — escepte kelkajn adeptojn, kiel W. Auld, M. Boulton, ktp. — neniu havis orelojn por la melodio de la kaŝiĝanta filozofia kerno.

La tradukinto.

SINOFERA MORTO DE LEGANTO DE HUNGARA VIVO

S-ano Jui Ĉunoŝin kun esperantistino (Jokohamo, 30. VI. 67.)

Kun dolora kortuŝo ni eksciis, ke nia japana leganto Cunoŝin Jui oferis sin kiel martiro por protesti kontraŭ la helpa agado de la japana registaro al Usono por la bombardado de Nordvjetnamio. Li bruligis sin antaŭ la loĝejo de ĉefministro Sato kaj mortis post 11 horoj pro la brulvundegoj. Tiu ĉi veterana, 73 jara esperantisto estis tre aktiva pacbatalanto kaj dum jaroj amike korespondis kun la hungara MEM-sekcio. Kiel bonkora, ĉiam afabla kaj oferema homo, li sendis kelkfoje Esperantajn kajerojn pri la atombombado de Hisroŝima, pri la atommalsanoj kaj ties kuracadoj kaj ankaŭ kelkajn lumbildojn pri la samaj temoj, montritaj en Budapeŝtaj Esperantoklubkunvenoj. Okaze UK en Tokio li eldonis ilustritan libreton „Japanujo hieraŭ kaj hodiaŭ" kaj sendis belajn kolordiapozitivojn pri Tokio kaj japanaj pejzaĝoj. En lia traduko aperis en 1959 en la hungara numero de Paco la poemo de 16-jara japano „Sub la ĉielo de Hiroŝima" verkita tuj post la granda katastrofo. Jam en 1962 en japana eldono de Paco aperis sur ties unua paĝo lia fortvoka apelacio por ĉesigi la atombomb-eksplodojn kaj krei pacon inter la popoloj. Tiu serioza elektra inĝeniero per sia konsterniga morto volis veki la konsciencon de sia lando kaj de la tuta homaro kontraŭ ĉia malinda atako mortiganta kaj detruanta aliajn landojn.

(P. B.)

— Ĉu vi vidas tiun grandan nigran hundon? — demandis la maljuna doktoro montrante per sia nigra promenbastono grandegan hundon, kiu kuradis tien-reen sur la marbordo.

— Nu, kaj kion vi volas?

— Hodiaŭ iu mortos. Tiu ĉi estas la hundo de la morto.

Mi konsterniĝis, kaj rigardis la maljunan sinjoron kun miro maltrankvila.

— Kara mia doktoro, ĉu vi scias, ke vi parolas tre kurioze?

— Eblas! Tamen mi faris malbone, kiam mi atentigis vin.

— Mi ne estas superstiĉa.

— Tio ne estas superstiĉo, mi petas. Mi observas tiun hundon de dekdu jaroj. Kiam mi vidis ĝin unue, ĝi estis tuj suspektinda. Neniu sciis kiel ĝi alvenis ĉi tien, kiu estas ĝia mastro? Ĝi venis simple, kaj la saman tagon mortis la juna edzino de la bankdirektoro. Tio povis okazi ankaŭ pro hazardo, sed la sekvantan tagon la hundo malaperis. Ĉirkaŭ post dek tagoj ĝi aperis denove sur la sama loko, kie nun vi povas vidi. Ĝi kuradis ekscitite tien-reen, haltis kelkfoje, turnis sin al la maro kaj tirbojis amare. Longe mi rigardis ĝin, kaj min torturis timo terura. Kiam mi hejmenvenis el mia promeno, oni sciigis min, ke la maljuna generalo, kiu alvenis matene, subite mortis. De tiu tempo mi vidas interrilaton inter la nigra hundo kaj la morto. De dekdu jaroj, kiam tiu hundo aperis ĉi tie, ĉiam iu mortis.

— Nekredeble!

— Prefere terure!

— Bone, do estu terure ... sed se diri la veron, tamen mi ne povas kredi tiun ĉi hundhistorion.

La doktoro mire rigardis min:

— Ĉu vi ne kredas tion? Eĉ se mi diras?

— Kara doktoro, se vi dirus, ke mi eventuale pro malsana pulmo mortos post kvar tagoj, mi kredus al vi. Sed se vi diras, ke hodiaŭ post duonhoro iu mortos, ĉar nigra hundo kuradas sur la marbordo ...

— Bone, bone, ridu nur!

En tiu momento la hundo haltis kaj komencis tirboji. Ĝi retiris sian vilan voston, levis la kapon alten kaj tirbojis tiel amare, ke mi komencis timi. Mi iĝis pala, ĉar la doktoro rigardis min triumfe.

— Nu ĉu ne?

— Kion ĉu ne? — mi eksaltis furioze. Mi tre hontis pro mia malforto. Kion signifas tiu terura tirbojo? Nenion, nenion, nenion!

— Sed tamen vi ektimis!

— Ĉu mi ektimis? Ne! Estis nur malagrable por mi kvazaŭ neatendita turno de fino de iu fantomhistorio.

Mi adiaŭis la doktoron kaj rapidis al la hundo. La doktoro kriis post mi:

— Kion vi volas?

— Mi rigardos tiun hundon ankaŭ pli proksime — mi diris.

La doktoro diris nenion, rigardis sian horloĝon kaj reiris al la banejo. Mi iris kun decidaj kaj rapidaj paŝoj al la hundo nekonfesante, ke mia koro batas maltrankvile. La vortoj de la

doktoro incitis min. La hundo rigardis min kvazaŭ demande, kaj scivoleme, kaj atendis, ke mi staru apud ĝi.

— Caesar! — mi diris trafe-maltrafe, karesante ĝian kapon.

La hundo, kvazaŭ ĝi estus kompreninta tiun nomon, ekstaris kaj flatis al mi. Mi frapadis ĝian dorson, kaj komencis ludi kun ĝi sur la ŝtonetplena marbordo. Caesar saltadis je mi, lekadis mian manon, ĝi estis tre dankema. Kiam mi fariĝis laca pro la granda ludado kaj ekkuŝis sur la bordon, ankaŭ Caesar etendiĝis komforte apud mi. Mi laŭte ekkriis:

Tamen interese estas! Caesar estas la hundo de la morto ...

Ankaŭ Caesar, kvazaŭ estus kompreninta pri kio temas, havis grandan ĝojon. Ĝi kuradis tien-reen, transsaltis min, transkapiĝadis, estis tiel facilanima, ke foje ĝi falis en la maron. Naĝante al la bordo, ĝi serĉis la plej sunbrilan lokon por ekkuŝi, kaj ĝi fermis la okulojn.

Tiam mi subite ekvidis blankan makulon sur la ventro de la nigra hundo. Grandega blanka makulo! Post pli atenta pririgardo, haltis la sango en mia vejno. La makulo havis la formon de mortkapo.

Do tamen estas vere? Ĉu Caesar estas la hundo de la morto? Kaj nun ĝi kuŝas ĉi tie senmove kaj kviete dormas. Mi iĝis tre maltrankvila. Mi estus volinta forpeli la penson, kiu venis en mian kapon, ia afero tre malsaĝa kaj malbela. Sed vane, ĉiam ĝi revenis pli ordone kaj pli forte. Kio okazus, se mi mortigus la hundon? Kio okazus?

La sango fluis en mian kapon, la kapo zumegis, la mondo rondiris kun mi. Super mia kapo mi vidis la maron kun buntaj fiŝbarkoj, kaj malsupre la bluan ĉielon, la oran sunon. Mi havis febron, frostotremon ... Mi ĉirkaŭrigardis, neniun mi vidis. Nur ni estas duope: mi kaj la hundo de la morto. Mi metis la manon en la poŝon malrapide, singarde, senbrue. La sunradio brilis sur la tubo de mia revolvero. Caesar dormis profunde, eĉ kelkfoje ĝi ronkis, ĝi kaptis muŝon en sia dormo. Mi levis la revolveron, sed mia mano terure tremis kaj antaŭ miaj okuloj la koloroj kunfluis. Mi vidis plu nek maron, nek ĉielon, nek Caesaron, nur senliman nigran mallumon, en ĝia mezo ridaĉantan mortkapon ... Mi fajris per la revolvero.

Rekonsciiĝante el la narkotiteco mi estis sola. Caesar malaperis. Mi premadis forte la revolveron. Apenaŭ mi povis rememori pri tio, kio okazis.

Malrapide, profundiĝinte en pensoj kaj tre lace mi repromenis en la banejon. Mi havis kapdoloron, kvazaŭ oni estus min batadinta per feraj marteloj kaj mi sentis ĉirkaŭ mia koro suferigan pikon. Mi supreniris en mian ĉambron kaj sendis voki la doktoron.

— La doktoro? — demandis la blankkufa ĉambristino kaj ŝi rigardis min strange.

— Jes, la doktoro ... mi petas, ke li venu!

— Do, ĉu vi ne scias, ke li mortis?

Mia kapo turniĝis. La ĉambristino sidigis min sur la kanapon, portis akvon kaj diris:

— Jes, ... hodiaŭ antaŭtagmeze... kiam li revenis el la promeno, li svenis en la parko ... dum unu momento li havis finon ...

Tradukis: *Lenke KUN*

Mihaelo GERGELY

Babela aventuro

Ĉu vi observis jam la vojaĝantan homon? Se jes, certe vi spertis surprize, ke en la vojaĝanta homo je la minuto de ekiro komenciĝas admirinda metamorfozo. Kaj fine — ofte tiel okazas — staras antaŭ ni tute alia estaĵo kun nekutimaj ecoj, kun speciala psiko. Mi mencias, nur por ekzemplo, kelkajn el la novaj trajtoj de la vojaĝanto: senmezura laŭtemo kaj vanteco, seninhibicio, nesatigebleco kaj tiel plu. Do, ni ofte povas sperti, ke antaŭ niaj okuloj estiĝis ia varianto de la speciala homa subspeco, kun speciala biontologio.

Okazis iam, kiam mi veturis al eksterlando kun iu turista grupo, ke en unu el niaj vojkamaradoj — pri li temos la rakonto — videble koncentriĝis la menciitaj konsternaj novaj trajtoj. Precipe akcentinda estas lia senlima entuziasmo por la virinoj. Nia juna, atleto-statura kamarado pro sia senbrida sopiro, en ĉiu urbo — kie ni pasigis du-tri tagojn — volis ĉiujn belajn knabinojn karesi, brakumi eĉ kisi, kaj tiel plu. Sed tiu ĉi vere ekscita, magneta juna kunvojaĝanto havis ian mankon — laŭ mia opinio — rilate al la virinoj. Nome, nia Don Juano krom sia dolĉa, hungara gepatra lingvo eĉ unu vorteton ne parolis en la lingvo de la ekdeziritaj knabinoj. La turisto estas parenco de la soldato: mankas la tempo. Pro tio, nur per husara atako li povas esperi iom da sukceso. Je feliĉo — aŭ malfeliĉo? — de nia vojkamarado troviĝis en nia grupo pluraj aliaj, kiuj parolis la lingvon de la deziratai knabinoj. Do, nia junulo prenis el ili la unuan, sidigis lin sur alian flankon de la bela junulino, kaj tuj diktis komplimenton, komencinte la deciditan konkeron.

— Diru al ŝi, ke ŝi estas ege bela, kaj multe ekplaĉis al mi!

La interpretisto tradukis precize, la belulino respondis, nia kavaliro jam flugigis la novan komplimentan petardon, sekvis fidela traduko, ĉarma respondo. Ĉiam pli longa estiĝis la traduko kaj la respondo. Tiel daŭris jam senpaŭze dum longa tempo, spicite kun kara eta ridado — ĝis finfine la incitita kavaliro interrompis ĝin senpacience: — Kion ŝi diris? Traduku! Traduku!

Nu, mi pensas, ne necesas detale pentri la situacion, jam ankaŭ vi divenas la daŭrigon. Jes, post la nigra kafo, vino, danco kaj la stranga babilado, la belulino ekiris por promenadi, interkisadi, kaj tiel plu — kun la interpretisto.

Don Juano ludis la rolon, ke lin absolute ne interesas la neatendita turniĝo. Eĉ, al li tute ne plaĉis la virinaĉo, tial li transdonis ŝin al la interpretisto. Sed tiu sceno fantome ripetiĝis ankaŭ en la dua kaj tria urbo. Nome, la kavalira, sopirema hungaro plaĉis, plaĉis al la virinoj, tamen, fine ĉiu belulino malaperis en la mirindan aŭgustan nokton — kun la nova interpretisto.

Nia Don Juano afekte ludis la pretendeman viron, kaj anstataŭ la „virinaĉoj" ankaŭ li studis la katedralojn, muzeojn, rigardadis la pontojn, fortikaĵojn. Li ludis sian rolon bonhumore, sed tio estis nur glazuro. Ofte li malsereniĝis, meditis, estis konfuzita kaj incitita. Li ne kapablis trovi la kaŭzon de sia hontinda malvenko. Li ne povis eltrovi la plej simplan kaŭzon, nome tiun: ne ĉiam sufiĉas eksluzive la plaĉaspekta juna kaj forta korpo, super certa nivelo estas ankoraŭ io dezirinda. Ekzemple la kapableco ankaŭ por la parolo kun aliaj homoj, por komunikado kaj interŝanĝo de la pensoj. La esprimo de saĝaj, klaraj, spritaj pensoj — ĉar de tie komenciĝas la plej karakteriza homa sfero.

LA ESPERANTISTARO FUNEBRAS FERENC SZILÁGYI

La forpaso de nia kara kaj estimata amiko, d-ro Ferenc Szilágyi kaŭzis egan bedaŭron, tre sinceran doloron kaj senton de la grava perdo ĉie en la mondo, kie oni legas la revuon Norda Prismo, kaj konas lian apostolan agadon por kaj per Esperanto. Ni citas el la artikolo de januara n-ro de „Esperanto":

„Ni perdis talentan verkiston kaj unu el la plej kapablaj publicistoj en nia historio. ... Per siaj tradukoj kaj redaktaj laboroj li alportis al la internacia publiko kulturvalorojn kiel de Hungarujo, tiel ankaŭ de Svedujo ... Tiu kvazaŭ dunacieco sentiĝis ... ankaŭ en lia redaktado, tiel ke oni foje ŝercis, ke „Norda Prismo" estas iagrade ankaŭ hungara prismo ... Jam en 1955 li povis fondi nian plej sukcesan kulturan revuon de post „Literatura Mondo": „Norda Prismo", kaj la ekvilibra varieco kaj alta kvalito, kiujn ĝi dankas al lia redaktado, vivtenis ĝin tra ĉiuj atendeblaj sortoŝanĝoj ... Kiel la samlandano Baghy, Szilágyi estis longe aktiva ankaŭ sur la kampo lingva. Lerninte Esperanton en 1924, li jam en 1932 aperigis sub titolo „La simpla Esperanto", la prototipon de tiu dinamika lernolibro, kiu poste aperis en 7 naciaj lingvoj. Samstila kurso por progresintoj, „Ellernu", sekvis en 1937. Pri liaj publikaj kursoj en Hungarujo kaj Svedujo, por kiuj li jam en 1932 uzis lumbildojn kiel helpilon, Kalocsay iam skribis: „Li donis tiom da nova spico al la Cseh-metodo, ke per tio estiĝis memstara Szilágyi-metodo".

La Esperanto-grupo „Konkordo" en Budapest la 5-an de Februaro aranĝis literaturan vesperon je memoro de Ferenc Szilágyi. La vesperon malfermis Paŭlo Balkányi — kiu en la Januara n-ro de „Hungara Esperantisto" aperigis belan, kortuŝan artikolon pri sia mortinta amiko. La festan paroladon diris alia fidela amiko, Ludoviko Kökény. S-ino prof. Ilona Kárász, Kolomano Nyitrai prezentis el verkoj de Szilágyi prozaĵojn kaj poemojn.

MEMORE AL FERENC SZILÁGYI

Estingiĝis meĉ' en nordo,
disluminte kun fidel'
malgraŭ blovoj de la sorto,
tra la jaroj sen ŝancel',
de Danub' ĝis sveda bordo:
sankta flamo en kapel'.
Korojn multajn ĝia lum'
gvidis milde al plenum'.

Nun blindiĝis la okuloj,
tro subitas la obskur';
pro l' eternaj temp-postuloj
ĉesis granda aventur'.

En lontanaj mondanguloj
limgardantoj de l' kultur'
mutas en funebra trist',
mortis kara fabelist'.

Mortis homo, kiu kredis:
Esperanto venkis jam!
„Per, ne por" li etikedis,
agis mem laŭ ĉi proklam';
tiun kredon ni heredis,
kaj memoros lin kun am';
lumu ni en fortostreĉ' —
estingiĝis brava meĉ'.

WILLIAM AULD

Nigraj Okuloj

Marjorie Boulton: OKULOJ. 177 pagoj, 19×12 cm, broŝurita. Eldonis: Stafeto.

La eldonisto presigis la nomon de la aŭtorino nure per minuskloj, sed mi devas konstati, ke la verko meritus tute majusklan preson.

La nomo de Marjorie Boulton estis ĉiam bonega patrico en nia literaturo, sed tiu ĉi libro signifas novan ŝtupon, pli altan post la ceteraj prozaĵoj.

Foje ŝi nomis min „vendisto de nigra veneno", ĉar „viaj verkoj estas psikologie venenaj", pro kio ŝi ne povas min ŝati kaj estimi.

Tiu „nigra veneno" estas mia pesimismo, la frosta kaj dezerta vivo de la „hin"-oj en Kazohinio.

Miaflanke mi povis ŝin ĉiam nur ŝati kaj altestimi.

Memkompreneble la opinioj unu pri la alia estas nur dokumento pri nia reciproka objektiveco. Ŝia alta arto nepre postulis nur omaĝan estimon.

Kaj tiu mia estimo, — se eble, — eĉ pli altiĝis leginte la „Okuloj"-n, ĉar el tio evidentiĝis, ke — ŝi estas same pesimisto. *El la plej nobla, instruema, humana speco.*

La ĉefa novelo de la libro estas (laŭ mia opinio) Vespera vizitanto: *el fremda planedo veniĝas al la Tero* Alfono. *Estaĵo pli perfekta, pli evoluinta ol ni, kiu tie ekhavis „KAZOmediecan" perceptkapablon. (Pro tiu vorto mi arogas al mi, ke mia nigra veneno jam infektis ankaŭ ŝin. Sed ne nur pro ĉi tio!) Al Alfono ne plaĉas nia „bruegismo". Li konstruas aparaton, kiu povas kreskigi grandegajn orelojn al tiuj, kies bruegismo estas publike danĝera. Unue li kreskigas orelegojn al ebriulo, kiu laŭte kaj malĝentile insultas la homojn, poste al la ministroprezidanto, kiu predikas militan venĝon kontraŭ alia lando, poste al la vicministro. Fine la aŭtoro kaj Alfono devas rifuĝi, for de la milito, sed kien?*

— Ni nun iras al io, — ŝi diras, — kion ni vere ne konas, sed pri kio ni scias nur, ke ĝi estas ege brua.

Jes, ĉio estas kruele brua sur la mondo, nur la hejmo estas relative trankvila, ĉar, se la televido ludas la nacian himnon, oni ne devas ekstari, sed povas sentime oscedi.

Jes, ĉi tiun kazomediecan *konstaton ankaŭ entenas la novelo.*

Laŭ mia, — mi konfesas: ne tute objektiva — opinio, ĉi tiu novelo estas la kerno de la libro. Sed samspece profunde instruplena estas la alia novelo: Tiel, kiel ĝi ne okazis. *Adamo kaj Eva manĝas la pomon kaj Dio ne koleras. Male, Li estas kontenta, ĉar tiu faro pruvas, ke la homo ne estas obeema aŭtomato, sed memstare pensanta spegulbildo de Dio. Li laŭdas la scivolemon, inventemon de la homoj, kio ebligos al ili konstrui por si feliĉplenan, komfortan hejmon sur la Tero.*

Kaj Dio foriras „por krei uranion, iam donontan grandan, sendanĝeran potencon al la eksperimentanta homo."

Kaj jen, ni nun preparas nian feliĉan, komfortan estonton per la „sendanĝera" Dia donaco . . .

Nemalpli amare instruplena estas Fenikso. *Sur malproksima planedo vivas la* rjuiaoj, *en konkordo, bonstato, feliĉo. Iam ili eltrovas la malamon kaj pro tio ili eksplodigas sian planedon. Kelkaj disflugantaj aerolitoj, partetoj de la planedo, flugas al la Tero kaj ĉi tien ili kunportas la ĝermojn de la vivo. Tiel komenciĝis la vivo sur la Tero . . .*

Terura aŭguraĵo pri nia estonto. Akceptu mian kolegan, koregan kaj kuncivitanan manpremon en Pesimlando! En la lando de la bonintenca animkonstruemo!

Kion pri la ceteraj noveloj?

Preter la limo *estas akuzakto kontraŭ la landlimoj, per kiuj la homaro pene klopodas suferigi sian vivon, kiu sen ĉi tiu veneno povus esti abunda, ĝojplena kaj sentima. Kaj jen! Kio estas pli venena? Ĉu la ŝovinista antagonismo, aŭ la ennoveligo de ties veneneco?*

La sekreto de *la* lernejestrino *priskribas strangan situacion. La lernejestrino havas magian kapablon kaj ŝi ne povas ĝin utiligi por la publika bono, por eviti la persekutojn.*

Surpriza estas la *filozofio de la rakonto* La venĝo-komitato. *Majoro Johano Miles, la donĵuana oficiro amindumis kaj trompis ok virinojn, senrespondece puŝante ilin al malfeliĉo. Fine la forlasitaj virinoj venĝas sin: Maria, la virga lernejanino logas lin al rendevuo en soleca domo. Tie la forlasitaj virinoj ekkaptas lin kaj ĵetas en subteran karceron. Maria, la kuracistino deklaras al li la verdikton: li ricevos manĝaĵon, en kiu estos veneno.*

Jes, veneno. Sed ne mortiga. Eĉ ne malsaniga. Multe pli terura: biologia materio, per kies efiko *Miles ŝanĝos sian sekson. Li fariĝos virino!*

Laŭ la aŭtorino ĉi tio estas evidente la plej kruela plago sur la mondo. Feliĉe, la seksoŝanĝo estas nur minaco, por anime turmenti lin, sed la kompatinda majoro tamen freneziĝas pro la timego mem.

Laŭ mia opinio ĉi tiu mondpercepto jam estas troe pesimista kaj mi rapidas konsoli la aŭtorinon: esti virino ne estas plago. Virino povas esti same altestimata, eminenta, valora ano de la kreantaj homoj, kiel la viroj.

Kiel eĉ jena ekzemplo pruvas!

Sándor Szathmári

Ernő FARKAS:

Mia renkontiĝo kun sekretario de Leo Tolstoj

„Mi atente tralegis la lernolibron de la Internacia Lingvo (t. e. Esperanto), kiun vi sendis al mi, kaj mi trovas, ke ĉi tiu lingvo plene kontentigas la bezonojn de internacia Eŭropa lingvo . . . laŭ miaj fortoj mi klopodos disvastigi tiun ĉi lingvon; la plej ĉefa estas laŭ mi: la konvinko pri ĝia nepra neceso."
Leterparto de Tolstoj al ĵurnalisto kaj verkisto V. V. Majnov el 1889.

Estimataj kolegoj A. Sifman kaj N. F. Danovskij, vi interesiĝis pri la iama franca sekretario de L. Tolstoj, en viaj artikoloj, kiuj aperis en la revuoj Literaturnaja Rossija kaj Internacia Ĵurnalisto. Se vi permesos al mi, mi respondos viajn artikolojn en tiu ĉi revuo, ĉar tre verŝajne ĝi interesos ne nur Vin kaj viajn legantojn, sed ankaŭ nian legantaron.

Enkondukante mi povas sciigi vin, ke la sekretario de Leo Tolstoj, s-ro Viktoro Lebrun vivas en la sudfranclanda departemento Bouches-du-Rhône. Eble li skribis ĝuste laŭ mia sugesto al Tolstoj-Muzeo en Jasnaja Poljana; nome vizitante lin, mi kuraĝigis lin skribi tien pri la leteroj de Tolstoj, nekonataj antaŭ la publiko.

Cetere pri nia renkonto jen la detaloj.

En 1965 mi faris longan prelegvojaĝon en Francujo. Inter aliaj mi havis du prelegojn ankaŭ en la urbo Aix-en-Provence. Post mia unua prelego s-ro M. Jullien, ĉeflerneja profesoro, menciis la sekretarion de la mondfama verkisto, aldonante, ke multaj dubas, ke s-ro Lebrun vere estis la sekretario de L. Tolstoj.

— Do estus bone, se ni povus pli klare vidi tiun ĉi aferon — rimarkis mia kolego.

La interesa informo tre ekscitis min kaj laŭ mia peto s-ro Jullien bonvolis veturigi min per sia aŭto al s-ro Lebrun.

Ni zigzagis inter pitoreskaj kaj teneraj arbaraj montet-altaĵetoj, kiujn ofte ŝanĝis vinberujoj. Dumvoje mia afabla gvidanto rakontis jene: „La sekretario vivas kun sia filo en renovigita konstruaĵo de iama tertremfrapita komunumo. Ili vivas solaj en la ruinoj, ĉar la loĝantaro definitive forlasis sian loĝlokon. Ili okupiĝas pri ter- kaj abelkulturado. Cetere s-ro Lebrun estas entuziasma veterana esperantisto, kaj ĝenerale tiam vizitas nian urbon, kiam ankaŭ nia Esperanto-klubo havas kunvenon. Samtempe li faras siajn aĉetojn kaj provizas sin per intelektaj nutraĵoj, prenante multajn librojn el la bibliotekoj." Mian konstante kreskantan interesiĝon pri s-ro Lebrun, mia akompananto subite intencis malvarmigi en la granda somera varmo, atentigante min, ke ni ne povos resti longe ĉe s-ro Lebrun, ĉar holdiaŭ mi havos mian duan prelegon pri Hungarujo, do ni devos ĝustatempe revojaĝi. Poste mia kolego petas min, ke mi provu la rusan parolkapablon de s-ro Lebrun, eĉ mi petu de li ian objektan dokumenton rilate al Tolstoj. Oni povu meti klara fine lian iaman sekretarian funkcion.

Baldaŭ mia akompananto bremsas sian aŭton ĉe unu vojranda aviztabulo, sur kiu ni povas legi la sekvan francan tekston:

A L'UNIFICATION DE L'EFFORT INTELLECTUEL ET MORAL DU GENRE HUMAIN: Il est temps pour l'intellect humain de se réveiller à la réalité: ESPÉRANTO langue DIPLOMATIQUE et AUXILIAIRE UNIQUE pour le monde. Un seul alphabet PHONÉTIQUE UNIQUE pour toutes les langues (comme pour les mathématiques et la musique).

Tout homme doit savoir deux langues: celle de son pays et l'Espéranto!

Kaj malsupre sur la afiŝo oni povas legi: „miel de lavande" t. e. lavendo-mielo kun prezindikoj de diversaj kvantoj da ĝi kun la adreso de Lebrun.

— Nu, ni havas la ĝustan vojon! — rimarkas mia gvidanto.

Post kelkaj minutoj devojaĝante de sur la vojo li haltigas la aŭton inter la ruinoj. Elaŭtiĝante ni rimarkas pli aĝan viron kun densaj grizaj haroj, kiu je nia alproksimiĝo june eksaltas de sur la tero, kie li ripozis kuŝante sub granda juglandarbo. Kun nudaj piedoj en la pantofloj, en velura pantalono, kun refalditaj ĉemizmanikoj li aspektas ĝuste kiel hungara kamparano, aŭ unu el la rusaj muĵikoj, konataj antaŭ mi laŭ la bildoj.

Dum la reciprokaj sinprezentoj malkovriĝas, ke li estas s-ro Lebrun. Mi atente esploras tiun ĉi francon greftitan en rusan muĵikaspekton. El lia simpleco konvinke radiadas al ni liaj intelektaj kaj moralaj fidindeco kaj aplombo. Mi estas jam konvinkita sen dokumentoj, ke s-ro Lebrun vere estis la sekretario de L. Tolstoj. Mi havas la impreson, ke mia opinio pri Lebrun kongruas kun tiu de mia franca amiko. Sed por la neĉeestantaj francoj dubemaj ni bezonos akiri pli konkretajn dokumentojn.

Intertempe s-ro Lebrun sidigas min kun sincera gastamo sur seĝon kun pajloŝpinita sidplato, kiuj ĉirkaŭas fositan puton. Li metas lignotabuletojn sur la parapeton de la puto, tiel li pretigas tablon.

Ni konversacias france. Li parolas laŭ miaj demandoj. Sekve ni ekscias, ke li iĝis sekretario de Tolstoj en 1900, kaj restis tio ĝis lia morto. Nome lia patro kiel fervojkonstrua inĝeniero partoprenis la konstruon de la transsiberia fervojlinio. La patro kunportis ankaŭ sian familion en Siberion. La patrino estis

adoranto de Tolstoj, eĉ ŝi korespondadis kun la fama verkisto. Kiam la verkisto serĉis francan sekretarion por sia plivastigata korespondado, tiam li alvenis al Tolstoj.

Kiam mi komencas paroli pri la verkoj de Tolstoj, videble li iĝas feliĉa, precipe tiam, kiam mi rakontas, ke en Hungarujo la verkoj de Tolstoj estas eksterordinare popularaj kaj ili aperadas en novaj kaj novaj eldonoj.

S-ro Lebrun rimarkante mian Esperanto-insignon. subite ŝanĝas la francajn vortojn en Esperanton. Nia konversacio nun iĝas vere pli amika kaj intima. Baldaŭ li petas nian pardonon, kaj forrapidas al sia ruindomo, de kie li portas teon, boligitan en samovaro, krome citronon, mielon kaj bakaĵon. En la granda varmego estas bonvena la bongusta miela kaj citrona teo.

Kiel antaŭe li ne povis surprizi min, kiam li ŝanĝis la francan parolon en Esperanton, tiel same ankaŭ li ne estas surprizita, kiam nun mi demandas lin ruse:

— Ĉu vi havus hazarde iun manskribitan materialon de Tolstoj?

— Jes, — li respondas modeste. —

Nun ruse li petas nian pardonon kaj afable invitas nin en sian pentrindan ruindomon.

Lia puritana kaj granda liberfajruja kuirejo surprizas nin. Ĝi memorigas pri preskaŭ sama de mia avino.

Unu el ĝiaj anguloj, kun lia skribotablo, servas por li kiel „laborĉambro". Sur la muroj estas librobretoj. Unu breto havas okulfrapan surskribon: Lingvo Internacia — Esperanto-libroj.

Ĉe la breto estas granda portreto de Tolstoj. Apud ĝi citaĵoj de Tolstoj pri Esperanto. Jen unu el ili: „. . .mi povis post ne pli ol du horoj da okupiĝo, se ne skribi, sed tute libere legi en tiu ĉi lingvo (t. e. Esperanto)". El letero de Tolstoj al la distrikta juĝisto, V. L. Kravcov en 1894.

Intertempe Lebrun prenas skribaĵujon kaj montras dudek originalajn leterojn de Tolstoj, ili estas inter travideblaj folioj. Kun profunda estimo ni esploras la ruse kaj france skribitajn leterojn.

— Ĉu vi jam publikigis ilin? — mi demandas.

Lebrun rakontas, ke li nuntempe preparis por presi Esperante, france, ruse kaj itale siajn memorojn pri Tolstoj. Montrante manuskripton li diras:

— Mi intencas aldoni ĉi leterojn en fotokopioj al mia memuaro. — Malfermante la manuskripton mi vidas sur la titolpaĝo:

Viktor LEBRUN

LEO TOLSTOJ

MEMOROJ DE AMIKO kaj IAMA SEKRETARIO

kun dudek leteroj de Tolstoj al la aŭtoro

La verko de Lebrun konsistas el du partoj: La majstro kaj lia adepto — Post kvindek jaroj.

Mi konsilas al li nepre skribi al Tolstoj-Muzeo, ĉar ĉi leteroj ĝis nun nekonataj antaŭ la publiko certe estos literaturaj delikataĵoj precipe por la rusoj. Verŝajne li akceptis mian proponon. Sed eble li ne volis malkovri sian adreson, nun pro tio interesiĝas la literaturistoj kaj ĵurnalistoj el Sovetio pri Lebrun.

Laŭ la deziro de mia estimata gvidanto, kiu ne komprenas la rusan, ni daŭrigas nian konversacion Esperante.

— Kiel vi scipovas eĉ nun la rusan lingvon? — mi demandas plu.

— Kelkfoje mi legadas ruse kaj havas kelkajn francajn lernantojn, kiuj volas lerni ruse.

— Ĉu vi scius eble ion, kion Tolstoj estus parolinta aŭ skribinta Esperante?

— Li komprenis kaj legis Esperante, sed laŭ mia scio li nenion skribis kaj neniam parolis ĉi lingvon. Sendube li tre favore apogis Esperanton, ĉar li firme opiniis ĝin grava ilo de la paco kaj lingva egalrajteco inter la popoloj.

— Verŝajne vi scias, ke inter liaj amikoj estis ankaŭ esperantistoj, kiel ekzemple S. Taneev, konata komponisto. Ĉu hazarde vi ne aŭdis, ke ili estus parolintaj pri Esperanto?

— En lia ruslingva korespondado Tolstoj plurfoje pozitive skribis pri Esperanto. Sed dum la lastaj dek jaroj, kiam mi laboris apud li, ni ne parolis pri Esperanto. Cetere nur nun de Vi mi informiĝis, ke ankaŭ Taneev estis esperantisto. Dum la lastaj jaroj Tolstoj estis tro okupita pri aliaj gravaj aferoj.

— Estimata sinjoro Lebrun, mi tiel scias, ke vi estas esperantisto ekde 1900. Se vi permesus al mi demandi, kiam vi naskiĝis?

— Vere mi estas esperantisto ekde 1900 kaj tre verŝajne mi apartenas al la plej maljunaj veteranoj, ĉar mi naskiĝis en 1882.

— Kion vi faras en via libera tempo en tiu ĉi soleco? — mi konfesigas lin.

— Mi ne enuiĝas; nuntempe mi preparas la bibliografion de Tolstoj. Multobligita parto el ĝi estas jam preta. Se vi akceptus ekzempleron, mi donacus al Vi.

— Vi honorigos min per ĝi — mi diras — kaj mi akceptos ĝin kun granda ĝojo, eĉ mi kuraĝus peti ankaŭ vian portreton memore, se tio estus ebla.

— Volonte, tre volonte, sed mi havas nur malnovan memportreton.

Kiam li transdonas ilin, mi petas ankoraŭ kelkvortan dediĉon. Li afable plenumas mian peton kaj skribas:

Al s-ro Ernő Farkas kun granda honoro, memore de nia tre mallonga renkontiĝo en Puy-Sainte-Reparade

18. 6. 65. V. Lebrun

Mi ĝoje dankas ĉion kaj mi devas sekvi la ekzemplon de mia gvidanto, kiu jam diris adiaŭon kaj urĝas min al la revojaĝo. Eble estas superflue diri, ke mi tre malfacile diras adiaŭon al s-ro Lebrun, ĉar mi fermis lin en mian koron.

Ni amike korespondadas. Lastfoje li sendis sian franclingvan broŝuron pri Tolstoj kaj ankaŭ alian, kiu estas aparta presaĵo en Esperanta traduko de revuartikolo de universitata profesoro Hendrik van Oyen. Lebrun rajtigis min eldoni sian memuaron pri Tolstoj en hungara kaj en Esperanta lingvoj.

V. Toldi Sarolta

MAGYAR LÁSZLÓ

(1818—1864)

Longe kovris mallumo la precizan naskiĝdaton kaj lokon de la fama hungara globiranto kaj Afriko-esploristo László (Ladislao) MAGYAR. Du hungaraj urboj Szabadka kaj Szombathely konkuris por povi diri sia propra naskito la faman vojaĝiston. Koncerne eĉ lian naskiĝdaton montriĝis signifaj diferencoj en la diversaj literaturaj fontoj. Laŭ la plej freŝaj esploroj li naskiĝis en Szombathely la 13-an de Novembro 1818. Lia patrino mortis frue en akuŝlito. Antaŭ sia morto — kiel knabinpatrino — ŝi nomis patro de sia infano la ekonomon de la grandbieno-Festetich en Csáktornya. Emeriko Magyar, la patro de la eta orfo edukis sian filon, kiu lernis eminente kaj pro tio la patro sendis lin enmatrikuliĝi ankaŭ ĉe la Budapeŝta universitato. La filo ne tro havis emon al la agrikultura profesio kaj pro sia aventurema naturo li anoncis sin en la marista lernejo de havenurbo Fiume. Longe li ne donis vivsignon pri si, kaj nur el lia letero, skribita al la patro en 1849, malkovriĝis la ĉefaj stacioj de lia ĝisnuna aventurhava vivo.

La menciita letero skribiĝis en Benguela (Angolo), sed kiamaniere li atingis Afrikon, pri tio ni informiĝas nur el lia biografikaraktera skribaĵo, sendita al lia patro el la hodiaŭa Katanga. En Amerika deĵoro li travojaĝis grandan parton de la mondo, prefere multon li restadis en Hindujo. Du jarojn pli malfrue li estis kiel maristoficiro en servado de Brazilio, poste en la batalo de la argentinanoj kontraŭ Urugvajo, sur flanko de la argentinanoj li militkaptiĝis kaj kune kun pluraj oficirkunuloj oni mortkondamnis lin. Kun franca helpo li senkulpigis sin kaj de tiam li fiksis por si vivcelo la sciencajn malkovrojn, la klarigojn de sekretoj de la ĝisnun nekonataj mondpartoj, ekkonon de la diversaj popolkulturoj. Li faris en 1848 pli grandan vojaĝon en Kongo kaj diligente studis plurajn negrajn lingvojn. Li observis la kontrabandistajn ŝipojn, sed samtempe ankaŭ la vivon kaj kutimojn de la ĉebordaj popoloj. Li scias, ke en la norda angulo de la Kongodelto vivas la „Kabenda"-j negroj, kiuj estas famaj en foraj regionoj pri la kapablo konstrui barkojn, pri ilia kuraĝo kaj lerteco. Dum sia ekspedicio li atingis ankaŭ la urbon Boma, la plej misfaman sklavomerkaton de Sud-Afriko. Kun animskua forto li priskribas la katenitajn,

nudajn, pro malsato kaj soifo turmentitajn viktimojn rolantajn kiel varoj de la homfoirejo.

Ladislao Magyar turnis sin por materiala helpo al la Hungara Scienca Akademio kaj oferis sendi rarajojn „el la lando de la naturo" el sia valora kolektaĵo. Sed la patronado forrestis kaj la esploriston Ladislao Magyar helpis nek ŝtata nek socia subteno. Li restis inter la Afriko-esploristoj de la pasinta jarcento preskaŭ la unika, kiu apogante sin ekskluzive al sia propra forto, penetris en la mezon de Afriko. La sola, pli signifa helpo, kiun li ricevis, estis donacita fare de la „nigra majesto" Truddeita, „Kalabar"-a negra reĝo kiel plena kontentigo, rekompenco por la dujara servado. La reĝo donacis al li tiom de eburoj, leopardfeloj, oro, ke elŝipiĝante en Benguela, havenurbo kaj komerca centro de la portugala Angolo, li ricevis de la portugalaj komercistoj interŝanĝe varojn en valoro de 10.000 frankoj, inter ili ŝtofojn, brandon, pafilojn, vitro- kaj konkofestonojn ktp. La plena pezo de la tuta varkvanto estis proksimume 36 kvintaloj kaj por la liverado oni devis dungi 80 ŝarĝportistojn. Magyar ekiris kun karavano en la landon Bihe por vendi siajn varojn. Kvankam li estis en bona financa situacio, kiu ricevis brankardosimilan fuŝaĵon por portigi sin sur la malfacile ireblaj, dornozaj grimpigaj deklivoj, tamen Ladislao Magyar proprapiede grimpis kune kun la aliaj anoj de la karavano tra tri montoj kondukantaj de Benguela ĝis Bihe. Ĉi tie li loksidiĝis kaj edzinigis filinon de negra princo kaj dote li ricevis 300 batalantojn. Tiam li prepariĝis al granda nordorienta vojaĝo. Kun karavangrupo li enpenetris en la koron de Afriko. Dumvoje li malkovris la plej signifan akvodividejon de la Sud-Afrika tero, pri kiu li detale raportis en sia taglibro. Plurfoje li loksidiĝis kun sia familio kaj akompanantaro, kaj kompilis siajn eventojn en libro sub titolo „Sud-Afrikaj vojaĝoj", kiu poste estis aperinta sub zorgo de la Hungara Scienca Akademio. Ladislao Magyar faris multflankajn observojn en sfero de geografiaj, naturhistoriaj konoj de ĝisnun nekonataj landpartoj. Krom tio li faris statistikajn mezurojn kaj studis politikajn rilatojn de kelkaj popoloj. Li kunportis el Benguela ne nur varojn, sed ankaŭ semojn de diversaj ĝardenplantaĵoj, interalie tiujn de la tabako kaj terpomo. Li mem montris imitindan ekzemplon koncerne la rastradon kaj plantoflegadon. En lando Moropu (hodiaŭ Katanga) li vizitis la malakito-minejojn konatajn laŭ onidiroj. En tiu ĉi tempo (1851) li ankoraŭ ne renkontis pli signifan mineksplaton. Li skribis nur post kelkaj jaroj en siaj notoj, ke proksimume 200 ministoj alvenis el Lisabono por utiligi la riĉan kupro-bazmaterialon.

Ladislao Magyar ankaŭ en la plej kaŝitaj anguloj de Afriko kontaktiĝis kun la ekstera mondo. Liajn leterojn liveris karavano, kiu ĉiujare iris el Bihe al la marbordaj portugalaj bienoj kaj sur tiu vojo atingis la leteroj tra Lisabono la parencojn. La leterojn kaj la sciencajn priskribojn de siaj vojaĝoj li skribis en hungara lingvo kaj ili estis en la sama lingvo eldonitaj. La verkoj de L. Magyar iĝis konataj en tuta Eŭropo. Aŭgusto Pettermann, la gvidanto de la Geografia Instituto „Justis Perthes" en Gotha, redaktoro de la „Geografiaj Sciigoj" kaj kiu havis aŭtoritaton en tuta Eŭropo, plue ankaŭ la Londona geografia asocio aperigis fragmentojn el liaj vojaĝpriskriboj. Murchuson, la prezidanto de la Angla Reĝa Geografia Asocio sendigis eĉ leteron al L. Magyar, en kiu li proponas financan subtenon en la nomo de la asocio kaj kunmetigis al liaj pluaj esploroj

preskaŭ tutan programon. Eĉ tion superis en ĝia signifo la apreco de unu el la plej elstaraj Afriko-fakuloj Desborough Cooley V. pri la esploroj de L. Magyar, akre kritikanta sian sampatrujanon Livinsgtone, kiu pretériris ĉe la piedo de la akvodivida altplataĵo, grandsignifa el vidpunkto de hidrografio de Sud-Afriko, — sed pri kies ekzisto li eĉ ne sciiĝis.

Considere, ke L. Magyar faris siajn esplorojn sur portugalaj teritorioj, la tieaj instancoj — rekoninte la signifon de la malkovroj de L. Magyar — klopodis meti ilin en servon de portugalaj interesoj kaj pro tio proponis al li konvenan rangon kaj financan rekompencon, sed fine ne naskiĝis inter ili kontrakto.

En 1857 aperis en hungara kaj germana lingvoj la libro pri la vojaĝo en Kongo, la priskribo de la spertoj akiritaj en la hodiaŭa Katanga kaj en la lando Ouknyana situanta sudoriente de Benguela. La libron atendis la tuta Eŭropa scienca mondo kun streĉita interesiĝo. La unua volumo de ĉi tiu verko aperis sub prizorgo de Johano Hunfalvy, prezidanto de Hungara Geografia Asocio en la eldono de la Hungara Scienca Akademio.

L. Magyar eksciis aŭtentike nur post 3 jaroj, ke lia verko aperis en lia patrujo. En 1861 alvenis al li la parade eldonita volumo de lia verko


MAGYAR LÁSZLO

DÉLAFRIKAI UTAZÁSAI

1849—57. ÉVEKBEN.

A MAGY. TUDOM. AKADÉMIA MEGBIZÁSÁBÓL

KIADTA

HUNFALVY JÁNOS,

PEST, 1859.

La titolpaĝo de verko de Magyar pri liaj Sud-Afrikaj vojaĝoj en 1849—1857

kune kun pluraj, aliaj donaclibroj ricevitaj de la Akademio. Samtempe li estis sciigata, ke la Hungara Scienca Akademio elektis lin sia korespondmembro.

La planitaj dua kaj tria volumoj de lia verko bedaŭrinde perdiĝis por la scienca mondo. La lastaj jaroj de lia vivo pasis inter materialaj zorgoj kaj multaj pezaj provoj. Li okupiĝis ankaŭ pri sia hejmeniro, sed lia bonhava patro neniam sendis al li la promesitan 1000 florenojn. La lasta letero alvenis en 1862 en lian patrujon, en kiu li sciigas pri terura bovopesto kaj tifoepidemio.

La Hungara Scienca Akademio komencis esplori nur en 1868, kio povis okazi al lia korespondmembro. Fine oni petis per diplomatia vojo informon de la portugala registaro pri Ladislao Magyar. Tiel malkaŝiĝis, ke L. Magyar mortis la 9-an de Novembro 1864. Lian heredaĵon en du kestoj, en kiuj estis libroj kaj skribaĵoj, oni deponis ĉe portugala koloniulo, sed la domo forbrulis kaj la grandsignifaj skribaĵoj de L. Magyar neniiĝis.

Lia vivverko eĉ kripligite estas grandsignifa. Per malkovro de la „blankaj makuloj" sur la mapo de Afriko, per la aŭtentika kaj vidiga priskribo de la naturhistorio kaj etnografio de ĉi tiuj terpartoj, li kontribuis per indikoj de ne mezurebla valoro al la Eŭropa Afriko-esploro.

Tradukis: *d-ro Jozefo Mátéffy*

GVIDLIBRO POR SUPERA EKZAMENO NR-O II.

Du opinioj anstataŭ recenzo

Al s-ano Antal Koós

Kara Samideano!

Bone mi ricevis la „Gvidlibron II", Mi diras tute sincere, ke laŭ mia opinio la Gvidlibro estas nepre bonega kaj admirinda. Nu jes, mi tion atendis, tuj kiam mi rimarkis, kiuj estas la kontribuintoj; malgraŭ tio, la legado tre agrable surprizis min. Se mi rajtas skribi unue pri la literatura parto — kiu tuŝas mian propran temon kaj kompetentecon, kompreneble — ĝi prezentas la plej fidindan gvidadon kaj enkondukon al la literaturo de Esperanto, kiu ĝis nun aperis (kaj aperis unu-du eĉ bonaj). Ĝi ne povas esti tiu „historio de la E-literaturo", kiun ni bezonas kaj atendas, evidente; tamen tiu historio, kiam ĝi aperos, devos tutsimple adaptiĝi al la materialo en la gvidlibro, kiu en racia maniero pritraktas la temon. La individuaj alineoj, kvankam tute mallongaj, jam ne enhavas la kutimajn kliŝesprimojn, kiuj ripetiĝas ĝis sensenco en la kutimaj resumoj, sed donas per malmultaj frazoj absolute trafan karakterizon pri ĉiu aparta aŭtoro, utiligante la ĝisdatajn laborojn sur la kampo de la recenzo kaj kritikado. Kiu trastudis ĉi tiun parton, tiu jam scios orientiĝi pri la valoroj de nia literaturo. Bedaŭrindaj estas nur la iom tro multaj preseraroj, kiuj kelkfoje povus estis ĝenaj por studento.

Ankaŭ la historia parto estas bonega resumo. Se kelkloke ĝi ŝajnas iom tro dogmema pri dubaj punktoj en nia historio, kelkfoje silentas pri menciindaj faktoroj, tio certe ŝuldiĝas al la neceso mallongigi, kaj estas trajto komuna al ĉiuj elementaj studlibroj pri historiaj temoj. Tiun kritiketon ne rigardu kiel ion gravan; mi aludas ĝin nur ĉar ekzistas por la spertulo unu-du — vere nur unu-du — tiaj makuletoj sur la suno de ĝia altvaloro. Kun plej forta rekomendo mi metos ankaŭ tiun parton en la manojn de miaj progresantoj, ĉar ĝi plej klare prezentas superrigardon tra nia 80-jara historio.

Resume, mi trovas la tutan libron nepre admirinda kaj uzinda de ĉiuj seriozaj niaj studentoj. Vi povas esti certa, ke mi plej forte rekomendos ĝin kiam ajn mi havos okazon.

Kun altestimaj samideanaj salutoj via

W. Auld.

Al Sekretario Béla Berceli

Tre ŝatata samideano!

Kun miro kaj admiro mi ricevis donace de vi la 2-an volumon de GVIDLIBRO POR SUPERA EKZAMENO: Historio, Literaturo, kies enhavo min tuj absorbis. Havante malnoblan animon, mi tuj serĉis ĉikanindajn detalojn, sed ĉie, kie mi rigardis, mi trovis nur senbreĉan adekvaton en rara kombino de klero, inteligento kaj stilvervo. Ĉu mirinde, se oni rigardas kia falango portis la tutan entreprenon! La nomoj de D-ro Szerdahelyi ĝis Henriko Vatré — sed, diablo, necesas citi ĉiujn! — kun Pechan, Balkányi, Kökény kaj Kalocsay — prezentas vicon da titanoj certe ĝis nun neniam kunigitaj en tia kompendia verko.

Doni buljonon de granda riĉo en malgranda telero estas ĉiam sorĉa tasko. Ĝi fariĝas ia ekzerco de minimuma artformo; oni sentas, ke oni donas nutron, esencon sen sola superflua silabo! Oni renkontas severajn dilemojn, kion doni, kion rezigni: disciplino, valorpezo regas la tutan operacion. Kaj certe oni sentas kontentiĝon, kiam oni kolektive venkis la problemon de formo kaj enhavo!

Kun la admiro, kiun rikoltas tia eminenta atingo, venas ankaŭ la bedaŭro, ke ĉi tiu verko ne trafluas pli vaste kaj abunde la mondon, sed restas (tute prave, tute laŭcele!) privilegio de la hungara esperantistaro. Nu, mi mem kaj certe ankaŭ aliaj feliĉaj pridonacitoj alilande, ne kontentas kovi kaj frandi ĉi tiun didaktikan ĉefverkon: en Britujo ankaŭ ni havas superan ekzamenon, la licenciatan ekzamenon de BEA, kaj mi certe disponigos la Gvidlibron al kandidatoj al mi konataj, ĉar ion similan ni ne posedas.

Akceptu, kara samideano, mian koran dankon kaj gratulon.

Via,

Reto Rossetti

EĤO—REEĤO

Prof. E. Aisberg, Parizo. *Ni salutas vin, karega Profesoro, prezidanto de „Union Internationale de la Presse Radiotechnique et Electronique", direktoron de tri gravegaj revuoj. Vi komencis vian admirindan karieron en Budapeŝto, kie „Literatura Mondo" eldonis vian popularan verkon „Fine mi komprenas la radion". Kaj tiu ĉi baza verko poste tradukiĝis en dudek du lingvojn. Ni legis en la interesa gazeto „Tamen" vian intervjuon, laŭ kiu viaj verkoj pri la radio, televido kaj tranzistoroj eldoniĝis en la rusa lingvo en 200 mil ekzempleroj.*

Kara Prof. Korach, Budapeŝto. Ni petas vin, bonvolu legi la opinion de via franca kolego Aisberg: „Esperanto estas la sola lingvo, kiu taŭgas por la scienco. Ja oni scias, kiom da stultaĵoj okazas pro la malkorekteco de naciaj sciencaj kaj teknikaj terminaroj. Pri tio oni povus verki longajn artikolojn. Efektive, Esperanto eble ne estas ankoraŭ sufiĉe praktikata, sed ĝi ofertas fundamenton por iu ajn disvolvo de la teknika frazeologio kaj terminaro. Se ni nur *volus*, ni certe *povus* utiligi Esperanton en ĉiuj fakoj. Kaj tiam anstataŭ la pli ol 100 mil revuoj sciencaj kaj teknikaj nun aperantaj, sufiĉus 10 mil por la tuta mondo, sed en Esperanto."

K-do V. Litvinov, Ĥerson, Sovet-Ukrainio. *Vi diras, ke tiel serioza kaj progresema revuo, kiel H. V. — laŭ via opinio — ne devus aperigi artikolon pri la 400-jara datreveno de la hungara reformita eklezio, kvankam, kiel vi mem skribis, „la reformita eklezio estas pli progresema ol aliaj eklezioj". Do ĝuste pro tio, ĉar la reformita (kalvinana) eklezio en Hungario, precipe en la 16-a kaj 17-a jc. havis pozitivan rolon en la liberigaj movadoj kaj ankaŭ en evoluigo de la presarto kaj de la hungara lingvo. Grava motivo estas ankaŭ tio, ke ĉiuj faktoroj, kiuj partoprenas en la porpaca movado, protestas ekz. kontraŭ la Usona agresado en Vjetnamio, inter ili ankaŭ la hungara kalvinana eklezio — estas niaj estimataj federuloj. Estas alia afero, ke pri teologiaj aferoj: pri „haltigo de la Suno" kaj pri aliaj detaloj ni eĉ ne diskutas. Cetere la kliŝigo kaj presigo de la kovrilpaĝo de la „Biblio" de Gáspár Károlyi en Hungara Vivo okazis pro tio, ĉar la eldono de la kompleta hungarlingva Biblio en la 16a jc. estis grava evento en la hungara literaturhistorio. Fine: mi posedas kaj multe studis la mezlernejan historian libron de A. V. Misulin, kiun originale oni eldonis en Sovetunio, kaj en tiu ĉi 236-paĝa libro troviĝas dek kvar paĝoj pri la greka religio kaj mitologio. Sed ĉu mi devas kredi ekz., ke s-ro Zeus regis super la tondrado kaj fulmo?! Tamen — ni dankas vian afablan atentigon.*

Matubara-Hatiro, Kisiwada, Japanujo. Bonvolu permesi, ke ni citu el via letero (18. 2. 1968.): „Kun granda intereso kaj ĝojo mi ĉiam legas Hungaran Vivon. Vere ĝia enhavo estas leginda. Kiel gvidanto de Esperantaj kursoj mi havas principon, ke gvidanto ne nur instruas gramatikan strukturon, sed ankaŭ tion, kio utiligas reciprokan interkompreniĝon de popoloj. Dum la kurso mi ofte prezentas al kursanoj la enhavon aperintan en H. V. Hodiaŭ mi proponas mian deziron, ke iam vi prezentu la karieron kaj meriton de vialanda granda lingvosciencisto Samuelo Gyarmathi, fondinto de finougra lingvoscienco." Ni dankas vian proponon, kaj ni deziras aperigi — laŭ via sugesto — apartan artikolon pri S. Gyarmathi, aŭ eble resuman konatigon pri la finno-ugraj lingvoj.

Marjorie Boulton, Ambleside, Westmorland, Anglujo. *Danke ni ricevis viajn rekonajn, eĉ laŭdajn vortojn pri la „Gvidlibro II." — Ankaŭ ni legis kortuŝe pri forpaso de via fama kato „Montevideo" en aĝo de dekdu jaroj. Via kato ja estas „heroo de du libretoj kaj pluraj poemoj". Kaj ĝuste en via verko „Dekdu Piedetoj" troviĝas ĉarma historieto en proksimo de via hejmo, kie la du rolantoj estis nia kara Paĉjo Baghy kaj — Montevideo. (v. H. V. 1966/4.)*

LA 10a INTERNACIA KONGRESO DE LINGVISTOJ

Ekde la dudekaj jaroj kunvenas la lingvistoj ĉiun kvaran aŭ kvinan jaron por interŝanĝi sian opinion pri aktualaj problemoj socialaj kaj plifortigi siajn personajn amikajn interrilatojn. Post la dua mondmilito okazis jenaj kongresoj: 1947 Parizo, 1952 Londono, 1957 Oslo, 1962 Cambridge, Massachusetts, 1967 Bucureşti.

La poaj kongresoj ne estas same onganizitaj. Ekzemple en la *Pariza kongreso* estis diskutataj ok temoj. Unu el ili estis la interlingvistiko (t. e. la branĉo de la lingvistiko, okupiĝanta pri internaciaj helplingvoj). La raportanto pri interlingvistiko estis fama franca lingvisto André MARTINET, tiutempe profesoro de Columbia University en Novjorko kaj direktoro de Asocio por internacia Helplingvo. — Je la antaŭe dissenditaj raportoj alvenis skribaj respondoj, kaj ankaŭ dum la kunsidoj multaj eldiris sian opinion. Rilate la interlingvistikon, ekzemple, aŭdigis sian voĉon tiaj elstaraj lingvistoj kiel la kolektivo de la Praga Lingvista Rondo, V. Georgijev (Sofio), Bruno Migliorini (Firenze), S. K. Chatterji (Calcutta) kaj Ernst Pulgram (Michigan, Ann Arbor).

La kongreso en Bucureşti estis organizita alimaniere. Ĉi tie pro la granda nombro — pli ol mil kvincent — de la partoprenantoj la prelegojn oni dividis je sekcioj. La sekcioj kunsidis samtempe, paralele. Ses prelegoj estis konsideratai ĉefaj kaj priaŭskultataj en plena kunsido. La sekcioj kaj la temoj de la ĉefaj prelegoj pli-malpli respegulas la nunan problemaron de la lingvistiko.

La 13 sekcioj estis jenaj: 1. teorio de la lingvo; 2. sociolingvistiko; 3. lingvogeografio; 4. historio de la lingvistiko; 5. semantiko; 6. sintakso; 7. lingvo poezia; 8. infana lingvo; 9. psikolingvistiko; 10. stilistiko; 12. lingvopatologio; 13. ceteraj.

La ses ĉefaj prelegoj (kaj iliaj aŭtoroj) estis la sekvaj: Lingvistiko kaj kvanta metodo (Olga Aĥmanova, Sovetio); Kompara metodo kaj nunaj tendencoj en la lingvistiko (Giacomo Devoto, Italio); Lingvistiko kaj la najbaraj sciencoj (Roman Jakobson, Usono); Sinkronio kaj diakronio (Bertil Malmberg, Svedio); Reciproka enpenetro de lingvaj sistemoj (Emil Petrovici, Rumanio); Aktualaj demandoj de aplikita lingvistiko (A. Hood Roberts, Usono).

La broŝurojn kun la teksto de la ĉefaj prelegoj ĉiu partoprenanto ricevis antaŭe; la resumo de la neĉefaj (malgrandaj) prelegoj staris je dispono en dika volumo. — La prelegoj kaj la diskutoj okazis en ses lingvoj oficialaj: angla, franca, germana, itala, rusa kaj hispana; en la praktiko estis preferataj la angla kaj la franca lingvoj.

La partoprenantoj venis el pli ol cent landoj. Per plej nombra delegitaro estis reprezentata kompreneble la lando-gastiganto, la Socialisma Respubliko Rumanio. Grandnombra estis ankaŭ la delegitaro de la sekvaj landoj (en vicordo de ilia nombro): Usono, Sovetio, Ĉeĥoslovaka Socialisma Respubliko, Federacia Respubliko Germanio, Francio, Italio kaj Nederlando. Estis reprezentataj eĉ tiaj landoj, pri kiuj relative malmulte oni sciis en la lingvistiko, kiel Alĝerio, Cejlono, Ĉilio, Filipinoj, Gano, Ĵamaiko, Kameruno, Kenjo, Kubo, Libano, Meksikio, Nigerio, Pakistano, Senegalo, Thajlando, Tunezio, Urugvajo, Venezuelo, Demokrata Respubliko Vjetnamo. Tiu ĉi estis la unua internacia kongreso de lingvistoj, en kiu povis partopreni ĉiu sen ia ajn limitado.

Kvankam la kongreso okazis en najbara kaj amika lando, la hungara delegacio estis bedaŭrinde relative malmultnombra kaj ne sufiĉe „peza". La hungaraj delegitoj ludis tamen gravan rolon; ili prezidis plurajn kunsidojn, prelegis kaj partoprenis plurfoje en la debato. (Krom ili ĉeestis hungaroj el pluraj landoj; antaŭ ĉio la hungaraj lingvistoj en Rumanio, partoprenantaj en preskaŭ plena nombro.)

Niaj rumanaj amikoj bonege organizis la kongreson. Estis ekzemplodonaj la scienca preparo, la organiza tekniko kaj la kompletiga programo (akceptoj, ekskursoj, kulturaj organizaĵoj).

La scienca valoro de la kongreso manifestiĝis antaŭ ĉio en la reciproka informado: diversaj landoj, tendencoj kaj skoloj donis ekzemplon de tio, kiel estas elformebla paca internacia konkuro kaj kunlaboro en la scienco.

Ni esperas, ke la 11a kongreso (Tokio, 1972) daŭrigos la fruktodonan interŝanĝon de ideoj en la amika atmosfero, elformiĝinta en Bucureŝti.

El la hungara I. *Botos.*

Noto de la Red. Kom. Ni ĝoje komunikas la artikolon de György Szépe, talenta hungara lingvisto. La esperantistojn interesas ĉiu grava lingva problemo, ankaŭ ekster Esperanto. Ni ne forgesas, ke la unua hungara adepto de Esperanto, univ. prof. Gábor Bálint (1844—1913) estis lingvisto, la gravaj hungaraj lingvistoj Zsigmond Simonyi kaj József Balassa tre simpatie rilatis al Esperanto. Kaj la plej eminenta nuntempa hungara lingvisto, univ, prof. Géza Bárczi — estas nia tre kara samideano, estrarano de HEA. Krom prof. Bárczi subskribis la proponon por Esperanto al la Unuiĝintaj Nacioj ankaŭ aliaj elstaraj hungaraj lingvistoj: Lajos Lőrincze, populara ŝirmanto de la ĝusteco de nia lingvo, prof László Gáldi akademiano k. a. Ankaŭ la artikolo de la lingvisto István Fodor, aperinta en la revuo „Magyar Nyelvőr" (Hungara Lingvogardisto) (v. H. V. 1967/2) kontribuis por pravo de Esperanto. Ni esperas, ke la 11-a internacia kongreso de lingvistoj en Tokio laŭ konvene preparita materialo denove okupos sin pri la Lingvo Internacia.

CENTRA PROSPEKTARKIVO EN BUDAPEŜTO

Verŝajne multaj — precipe la eksterlandaj partoprenintoj — rememoras pri tiu kvarpaĝa, kolora informilo, kiu aperis okaze de la 51. UK kun la titolo „Kie statas la nuntempa tekniko?"

KIE STATAS LA NUNTEMPA TEKNIKO?
KION PRODUKTAS LA AVANGARDAJ FABRIKOJ DE L'MONDO?
Al tiaj demandoj donas koncizajn respondojn la moderna PROSPEKTARKIVO.

La belaspekta eldonaĵo konatigis, ke la Centra Prospektarkivo de la Instituto por Teknik-Scienca Informado (organo de la Ministerio por Metalurgio kaj Maŝinindustrio) kolektas kaj laŭ trukartsistemo prilaboras la produktaĵ-prospektojn de la industrie evoluintaj landoj. Krome ĝi enhavis alvokon, ke la eksterlandaj fabrikoj kaj komercaj organoj sendu iliajn prospektojn al la Prospektarkivo por ke la hungaraj teknikistoj povu ekkoni ilin.

La alvoko vekis eksterordinaran eĥon. Multaj eksterlandaj entreprenoj alsendis siajn prospektojn, kaj krom tio plimultiĝis la E-lingvaj leteroj de privatuloj kaj oficialaj organoj petantaj informojn pri la agado de la Instituto, precipe pri la Prospektarkivo.

Tial la Instituto estis devigita enkonduki — krom la rusa, angla, germana kaj franca — la oficialan uzon de Esperanto kiel korespondlingvo.

Anschrift: KGM MTTI Prospektusár, Október 6 u. 21, Budapest V, Ungarn. Das Institut korrespondiert in Esperanto.

La Instituto esploras kaj praktike aplikas la novajn sistemojn de la teknika-scienca informado. En kadro de tiu ĉi laboro ĝi iniciatis la prelegon okaze de la 51. UK pri la temo „Esperanto kiel ilo de la elektronika teknika informado". La enhavo de tiu ĉi prelego — priskribanta ankaŭ la tiurilatajn eksperimentojn per komputilo — aperis ankaŭ en la hungarlingva fakgazeto „Könyvtári Figyelő" (Biblioteka Observanto).

"Esperanto, kiel ilo de la elektronika teknika informado"

R e s u m o

Per la uzo de Esperanto kiel internacia komuna lingvo ebligus, ke landogrupoj kune prilaboru la grandvolumenan teknikan-sciencan verkaron, kaj ke estiĝu efika labordistribuo kaj koopero pri dokumentado. Per elektrona komputilo oni povus ĉiumonate produkti temindekson pri la fakliteraturo de pluraj landoj. Ĉiu kooperanta lando prilaborus nur sian propran verkaron, kaj produktus per elektrona komputilo ties temindekson esperantlingvan. Ĉi tiun temindekson oni povus konservi sur magnetrubando kaj sendi per telekso al la aliaj partoprenantoj. Simple estus permaŝine kolaci la esperantlingvajn temindeksojn produktitajn de la malsamaj landoj. Poste la kolacaĵon ĉiu unuopa lando povus permaŝine retraduki el Esperanto al sia propra nacia lingvo, kaj povus eldoni en sia propra lingvo la temindekson de la kompleta fakliteraturo de la tuta kooperanta landaro rapide, malmultakoste, kaj sen uzo de homaj tradukistoj.

Ankaŭ tio helpegus la dokumentadon, se ĉe la komenco de ĉiu artikolo — krom aŭ anstataŭ la nune uzata internacia decimalklasifika numero, kiu montriĝis ne tute taŭga — oni mallonge karakterizus la enhavon de la artikolo per vico de esperantlingvaj temvortoj.

Pri la plej nova, sed ne malpi grava iniciato de la Instituto nun ni ŝatus kiel unuaj raporti.

La Instituto ekkonis la gravan rolon de la internacia lingvo en la teknika vivo. Tial ĝi decidis la kolektadon kaj prilaboradon de la E-lingvaj teknikaj prospektoj kaj katalogoj. La unua paŝo en ĉi direkto estas la alvoko al ĉiuj E-asocioj, ke ili faru ĉion eblan por la aperigo de novaj teknikaj prospektoj en Esperanto, *krome ili klopodu atingi, ke la jam ekzistantaj E-lingvaj teknikaj prospektoj estu sendataj al la Prospektarkivo,* por ke la hungaraj kaj eksterlandaj vizitantoj ĉiam povu tie trovi kaj legi ilin.

Ni esprimas nian rekonon por la grandsignifa iniciato de la Instituto kaj ni volonte proponas nian apogon al la pionira laboro.

(Imre ZOLTÁN)

La ĉioscia princino

Okazis en fora orienta lando. Sur la strato de la miltura, multkolora ĉefurbo aperis heroldoj kun trumpetoj. Ili ekstaris sur la placoj kaj ĉe la stratanguloj. Ili trumpetis, poste deklaris el longa pergamento al la scivola amaso, kiu kolektiĝis ĉirkaŭ ili:

„Aŭskultu kaj aŭdu ĉiuj loĝantoj, precipe la fraŭloj de nia urbo, regno, kaj tuta mondo: Nia superbelega kaj supersaĝa, ĉioscia kaj plej aminda princino Diafana deziras edziniĝi. Ŝi donas siajn manojn al tiu juna viro, kiu povas de ŝi demandi ion, al kio ŝi ne povas respondi!"

La popolo sciis, ke ilia feine belega princino estas tiel saĝa, ke nenio estas kaŝita antaŭ ŝi sur la tero, sub la tero, eĉ en la ĉielo. Tamen alvenis kuraĝuloj, memfiduloj, kiuj svatis por ricevi la belajn manojn de la plej bela princino. Unu post la alia aperis junuloj, bravaj viroj, saĝaj fraŭloj el la ĉefurbo, el la tuta regno, eĉ el aliaj landoj. Unu post la alia ili eniris en la purpurbluan rozkoloran ĉambron de la princino, kiu duone kuŝis sur la kanapo kaj vere ŝajnis feino superbela en diafana vestaĵo. Kiam ni provis ŝtele enrigardi, ŝi ĵus ekdiris melodie, sed firmvoĉe:

— Povas enveni la 276-a!

Enpaŝis juna viro. Ravita li klinis sin antaŭ la princino kaj kuraĝe demandis:

— Ho, plej belega princino, diru al mi, kio estas tio: „Oni ne manĝas ĝin, oni ne trinkas ĝin, tamen ĉiuj homoj trovas ĝin tre bongusta."

Diafana ekridetis. Ŝia rideto estis kvazaŭ violodoro fluganta tra la aero. Ŝi ekparolis:

— Ĉu vi kuraĝas demandi tiel simplan aferon, kiun eĉ la legantoj de la fama libro „Miru, pensu, ridu" bone konas? Ĝi estas, kion vi ne ricevos de mi: l a k i s o.

La junulo ŝanceliĝante paŝis eksteren kaj rezigne mangestis al la 277-a:

— Vana provado!

Sed tiu memfide kaj kun energiaj paŝoj eniris, fiere salutis la princinon kaj tuj ekparolis:

— Ho, Ĉioscia Diafana, diru al mi: Se troviĝus tia montego, kiu estus tiom alta, kiel ĉiuj montegoj de la tero kune, kaj se sur la pinto de tiu ĉi montego starus tiel granda pinarbo, kiel kune ĉiuj pinarboj de la mondo, kaj se sub la monto estus tiel granda marego, kiel ĉiuj maroj kune en la mondo, kaj se tiu supergrandega pinarbego falus de la superaltega montego en la superprofundegan maregon, kiel granda estus la elŝpruciĝo de la akvo post la falego?

La princino ridetis tiel ĉarme, ke ŝiaj dentoj brilis, kiel la plej valoraj perloj. Ŝi ekparolis iom enue kaj moke:

— La elŝpruciĝego estus tiel grandega, kiel estus kune ĉiuj elŝpruciĝoj, se ĉiuj pinarboj de ĉiuj montpintoj samtempe kaj kune falus en ĉiujn marojn de la tero.

Nun envenis sen hezitado la 278-a. Ŝi scivole rigardis al li, kaj la junulo kuraĝe diris:

— Se sur la tero aperis la unua homo antaŭ 500 000 jaroj kaj la tero turniĝas dum 365 tagoj, ĉirkaŭ la suno, kies distanco de la tero estas 384 000 kilo metroj kaj kies temperaturo estas 6 000 gradoj, se ĉiujare sur la teron falas ĉirkaŭ 600 000 tunoj da meteorŝtonoj, kaj se Soveta sputniko trafatingas Venuson — kion mi manĝis hodiaŭ tagmeze?

Diafana restis trankvila. Ŝia ĉarmega vizaĝo ne montris ian ŝanĝon aŭ streĉon, ŝi faris mangeston por montri, ke tio estas nura bagatelo. Kaj poste ŝiaj ĉerizlipoj milde ekmoviĝis. Oni povis klare aŭdi:

Via tagmanĝo estis: brasiksupo kun vermiĉeloj, fritita porkviando kun rizo kaj tomato, paprika gulaŝo kun kukumo, kazeitaj nudeloj, figo kaj banano, fine nigra kafo kun unu sukero.

La juna viro ŝrumpiĝinte kaj duonsveninte forlasis la budoaron saturitan per sorĉaj parfumoj, el kiuj li sentis jam nenion.



Sed nun enpaŝis juna viro kun energiaj trajtoj, kun brilantaj okuloj kaj kun blondaj haroj. Oni tuj povis vidi — tion montris ankaŭ lia eleganta vestaĵo — ke li vojaĝis el fora lando. Diafana kun intereso turnis sian pupetan

orharan kapeton al la enpaŝanto kaj tuj rimarkis, ke en lia butontruo briletas verda stelo.

— Parolu, helvizaĝa, estiminda fremdulo! — sonis, kvazaŭ paradiza birdovoĉo la afabla alparolo de Diafana.

La junulo iom hezitis, ŝajne li tamen ne kuraĝis fari ian malfacilan, embarasigan demandon al tiu ĉiela estaĵo, kiun li tuj ekamis per la ardo de sia tuta koro. Sed li rekonsciiĝis: ĉu vivo aŭ morto?! Li fulmrapide decidis pri io, kaj kuraĝe, preskaŭ petege li demandis:

— Diru do, Diafana, princino de la revoj, ĉioscia kaj ĉielbela trezoro de mia koro pulsanta por vi, diru do: K i e mi trovas sur la tero Esperanto-grupon, en kiu oni parolas ne nacilingve, sed nur en la internacia lingvo Esperanto?

Sur la frunto de la princino ekbrilis sunradio, ŝiaj okuloj ridetis, el ŝia buŝo rozkolora aŭdiĝis bonodora, ĉarma, milda kaj karesa voĉo, sed tamen decida kaj sindona, dum ŝi etendis al li siajn manojn:

— Kara mia, vi estu mia edzo!

Traverkita laŭ orienta fabelo:

Paŭlo Balkányi

La maljuna ŝuisto

Attila JÓZSEF

Al la maljuna ŝuisto Ĉosogi venis knabeto kun ĉapo reŝovita sur siaj pajlokoloraj haroj. Lian jaketon oni altranĉis por granda homo, ne por eta infano. Sub la jako pendadis la pantalono. Kaj la ŝuo! Jes, la ŝuoj. Ilin portis la infano por ripari.

— Bonan tagon! — li diris enpaŝante. La maljuna ŝuisto rigardis tien, nur per siaj okuloj eĉ kapon ne movante.

— Kion vi volas? — li murmuris.

— La patrino sendis min, bonvolu ripari miajn ŝuojn — respondis la infano. — La patrino diris, ke oni devas meti flikaĵojn sur ilin kaj tiam ili ankoraŭ eltenos.

— Kie estas la ŝuo?

— Sur miaj piedoj.

— Ĉu eble mi kudru la flikpecojn al viaj piedoj?

— Ne, tuj mi demetos ilin. Post tiuj vortoj la knabo starante deŝiris la ŝuojn. Ĉosogi forprenis ilin el la manoj de la knabo, sed tuj redonis ilin.

— Ne eblas jam helpi tiujn ŝuojn!

— Sed la patrino diris, ke oni devas surmeti flikaĵon.

— Ne eblas. La ŝuoj ne povus teni la kudradon. La infano ekparolis petegvoĉe:

— Sed la patrino sendis min, kiam ŝi foriris en la kinejon, ke mi portu la ŝuojn al oĉjo Ĉosogi, vi bonvolos ripari ilin, ŝi donis eĉ monon al mi.

— Jeees!? Nu diru do al via patrino, ke oĉjo Ĉosogi sendas la sciigon: — ŝi portu viajn ŝuojn en la kinejon, tie oni riparos ilin.

La infano eĉ pli forte ektimiĝis, li preskaŭ eksploretis.

— Ne por spekti iris mia patrino en la kinejon, sed por purigi tiun.

Ĉosogi silenteme faradis-laboradis. Poste li ekparolis!

— Ĉu vi estas la filo de edzino de tiu Vanicsek?

— Mi estas.

— Ĉu vi havas ankaŭ pli junan frateton?

— Jes, kaj mi havas ankaŭ fratineton.

— Kie estas tiuj ŝuoj? — sonis la demando.

Li rigardis, turnis ilin, premadis, dume kapbalancis. Poste senvorte, senparole li komencis ripari ilin. El uzitaj ledoj li metis egajn flikpecojn sur la dorson kaj plandumon de la ŝuoj. Fine post unu kaj duonhoro oni povis uzi denove la majstroverkon.

— Jen, prenu!

La knabo ĝojis pri la ŝuoj.

— Dankon! — kaj li jam surmetis ilin. Timeme li demandis!

— Kiom mi devas pagi?

— Dudek helerojn.

— Bonvolu, oĉjo Ĉosogi!

En mankuvo de Ĉosogi kuŝis kvindek-helera monero. Ĉosogi rigardis ĝin. Li prenis sian monujon el la tirkesto kaj faligis la moneron en ĝin. Poste nombrante popece li elprenis okdek helerojn kaj premis ilin en la manplaton de la infano!

— Ĉi tie estas la repago.

La infano komencis kalkuli. Fine li ekparolis:

— Oĉjo Ĉosogi, vi repagis pli. Mi donis al vi nur kvindekheleran moneron.

Ĉosogi, la maljuna ŝuisto alkriis la infanon. Kvazaŭ li estus vere koleregiĝinta.

— Prenu la monerojn! Tuj iru for!

La knabeto ektimetis kaj retiriĝis tra la pordo. Sed la maljuna ŝuisto ankoraŭ longe murmuris en si mem, kvazaŭ li vere tre koleriĝus.

El la hungara: *Marta Vári*

NIA HUNDO

Paŭlo BALKÁNYI

Nia hundo estas „Princo",
La plej bona en provinco.

Bone gardas nian domon,
Ne enlasas fremdan homon.

Al vagulo vigle bojas,
Nokte kaŝe ne forvojas.

Se ni krias al ĝi: Kato! —
Tuj saltkuras al la strato.

Kiam iun manĝi vidas,
Apud ties seĝo sidas.

Ekstarante dupiede
Petas pecon fide, plede.

Se ricevas grandan oston,
Forte svingas sian voston.

Kaŭĉukringon forĵetante —
Ĝin reportas elegante.

Kiam voĉas „Haltu!" — sono —
Ĝi obeas al ordono.

Se la mastro krias! „Iru!"
Tuj ekkuras — vi ne miru!

Jen fidela, saĝa hundo,
Ni ĝin amas el kor-fundo!

Ĉiam servas nin sen grinco
Nia brava hundo „Princo"!

RIDETU! RIDU! RIDEGU!

El humuraĵoj de Frigyes Karinthy

Panjo (al sia filo): Terure, kiel multe da benzino mi devis malŝpari pro vi, ĉar ĉiutage vi venas hejmen kun malpura pantalono.

Karlo: Sed kara panjo, ĉu mi lasu la pantalonon en la lernejo?!

*

Kio estas la telegrafo?

— Rigardu ... hm ... Pripensu, vi havas longan malaltstaturan hundon, kies vosto estas ĉi tie en Eŭropo kaj ĝia kapo en Ameriko. Nu, se vi ĉi tie en Eŭropo paŝus sur la voston de la hundo, ĝi bojus en Ameriko. Do tio estas ...

— Mi komprenas. Sed kio estas la sendrata telegrafo?

— Kio? La sama — sen hundo.

*

Kiam Karinthy la unuan fojon vojaĝis al Debrecen por fari tie prelegon, vizitis lin juna kunlaboranto de la loka ĵurnalo, kaj demandis lin:

— Kiajn spertojn vi havas, kiam la unuan fojon vi vizitas Debrecen?

Karinthy respondis jene:

— Kiam mi venis en vian urbon, kun granda interesiĝo mi vidis, ke sur ambaŭ flankoj de la stratoj, de komenco ĝis la fino, staras grandaj domoj ... Kaj inter la domvicoj, jes inter la domvicoj, tre sprite kaj originale troviĝas ĉie granda, malplena loko, certe por la trafiko. Tio estas certe mirinda kaj frapanta.

La ĵurnalisto fervore notis ĉion, eĉ ne komprenante, kion diris Karinthy. Feliĉe la redaktoro estis maldorma, kaj la intervjuo-parodio ne aperis en la ĵurnalo.

LA HUNGARA MUZIKHISTORIO SUR DISKOJ

Pasis apenaŭ duono da jarcento de kiam la arta muzikkulturo de Hungario atingis veran mondnivelon. La nomoj de du geniaj hungaraj muzikistoj-komponistoj kaj muziksciencistoj: BÉLA BARTÓK kaj ZOLTÁN KODÁLY signas jam konvinke ĉi tiun fakton. Estas unuavice ilia merito, ke la vera kaj altnivela hungara muziko estas konata ĉie, kie oni amas la valoran muzikon.

Sed kiel estis eble, ke tiel talenta, eĉ genia komponisto, kiel ekz. Bartók povis ekaperi el la amaso de ne senvaloraj, sed tamen iom provinckarakteraj komponistoj kreantaj iom kaŝitan nacian muzikan kulturon? La respondon donas la hungara muzikhistorio. Kaj tiu ĉi respondo estas ege interesa kaj instrua.

Pro tio estis eksterordinare signifa kaj samtempe tre malfacila laboro fare de la mondfamaj hungaraj muziksciencistoj prof. d-ro Bence Szabolcsi kaj Miklós Forrai — prezenti helpe de fonodiskoj kaj per aŭtentikaj sonantaj ekzemploj la evoluon de la hungara muzikhistorio.

Kompreneble ĉiu muzikhistorio devas krei sian metodon el sia materialo. La hungara muzikhistorio povis ĝis la fino de la pasinta jarcento elformi specialan hungaran muzikan lingvon, sed la muzikkulturo ne povis, spite al siaj grandaj valoroj, alkroĉiĝi al la muzika vivo de la Okcident-Eŭropa civilizacio. Eble ĉi tio estis la ĉefa kaŭzo, ke la hungara muziko estis de la komenco ĝis la nuna tempo tiel proksima al la popolmuziko. La hungara muzikkulturo eĉ hodiaŭ tenas kontakton kun la popolmuziko pli forte ol la plejmulto de la okcidentaj landoj. La hungara popolkanto, la popolmuziko entute ĉiam ĉeestis kaj eĉ nun ĉeestas en la muzikhistoria evoluo de Hungario. Ĉi tiu fakto estas io nova en la Eŭropa altnivela muzikkulturo.

La hungara fonodiskofabriko Qualiton *fiksis la hungaran muzikhistorion sur kvar diskoj. Al la diskoj apartenas valora libro, konsistanta el 150 paĝoj, kiu pritraktas mallonge la historion de la hungara muziko, kaj donas ankaŭ la precizajn detalojn pri la fontoj de la malnova muziko por fakuloj.*

Jam la enkonduko de la serio estas frapanta: ĝi konsistas el eksonigo de tri popolkantoj: ĉina, mari (el Mez-Azio) kaj hungara. Ne necesas esti fakulo por konstati, ke la tri popolkantoj estas identaj, do la hungara ne diferencas de la du aliaj, kvankam ĝi estas konata nur en Hungario. Jen vastaj perspektivoj en la tempo kaj en la spaco. Granda surprizo eĉ por muziksciencisto, kiu okupiĝis ĝis nun nur pri okcidenta muziko.

La aldonita libro, kiu komentarias la muzikajn ekzemplojn, estas skribita en du lingvoj, hungare kaj angle, same dulingvaj estas la tekstoj de la kantoj.

La muzikhistorio de Hungario, pritraktata per la diskoj, etendiĝas ĝis la morto de Francisko Liszt. La priskribo de la evoluo estas dividita je 13 ĉapitroj, ili signifas la periodojn de la muzikhistorio de Hungario. Ni citas la titolojn de la ĉapitroj:

I. La epoko de la popolmigrado kaj de la patrujkonkero. II. Renkonto kun la melodimondo de la okcidenta mezepoko. — III. Renkonto kun la tendencoj de la arta muziko de Eŭropa mezepoko kaj de la renensanco. — IV. Apero de memstara hungara arta muzikstilo — la 16. jarcento. — V. La instrumenta muziko de la 16. jarcento. — VI. La muziko de la hungara baroko. VII. La popularaj religiaj kantoj kaj la arta muziko. — VIII. La Rákóczi-marŝo — la naskiĝo de la Rákóczi-kanto. La muziko de la epoko de la kurucoj. — IX. La muzika kulturo de la aristokratio en la 18. jarcento. — X. La t. n. „soldatvarba"-muziko. — XI. La nacia romantiko en la muziko. — XII. Francisko Erkel. — XIII. Francisko Liszt.

Estas grandega distanco, kiun la prezentitaj muzikekzemploj transpontas, — pli ol jarmilo. La sonantaj ekzemploj kaj ilia vicordo klarigas, kiel atingis la hungara muziko de la nuntempo, precipe tiu de la mondfama Béla Bartók, la popolan muzikkulturon. (Béla Bartók kaj Zoltán Kodály havas la neforgeseblan meriton, ke ili trovis kaj science esploris la pratempan fundamenton de la hungara popolmuziko.)

Estas eble, ke niaj legantoj deziras ekscii pli da detaloj pri la hungara muzikhistoria evoluo. Se tiaj deziroj alvenos al nia redakta komitato, ni volonte aperigus interesajn ĉapitrojn de la hungara muzikhistorio.

Lajos Lesznai

GAJAJ MINUTOJ

El la hungara satira gazeto „Ludas Matyi"

La desegnojn faris: Balázs Piri Balázs, Czobor, István Endrődi, Anna Vasvári

VILAĜAJ ZORGOJ



Mi aŭdas motorbruadon, paĉjo!
Rigardu, ĉu oni ne ŝtelas nian Wartburgon?

ELEKTRONIKA MAŜINSEKRETARIINO



Vere, ĝi estas perfekta, nur pri la plano de la formo mi ne estas kontenta.

Por kio estas bona la cowboy-ĉapelo?

OFEREMO

Mi edzinigis ŝin al mi, ĉar, mi ne volis, ke ankaŭ la lasta el la gejunuloj forlasu la vilaĝon.

Abono de HUNGARA VIVO en eksterlando

Peranto al eksterlando: KULTURA Budapest, 62, P. O. Box 149. — Sumoj de abonprezo por unu jaro, en pluraj ĉefaj valutoj: Usonaj dolaroj = 1,50; Kanadaj dolaroj = 1,50; sterlingaj funtoj = 0—11—0; okc. germanaj markoj = 6,40; svedaj kronoj = 7,80; norvegaj kronoj = 10,70; danaj kronoj = 10,40; italaj liroj = 940,—; belgaj frankoj = 75,—; svisaj frankoj = 6,60; francaj frankoj = 7,50; nederlandaj guldenoj = 5,50.

Perantaj firmoj en la diversaj landoj:

Anglujo
Colle's Holdings Ltd., Denington Estate, London Road, WELLINGBOROUGH
The Danubia Book Co., 78 Shaftesbury Avenue, LONDON W. 1.

AŬSTRIO
Globus (VAZ), Höchstädtplatz 3, A—1200, WIEN I.
Rudolf Novák Gmbh., Köllnerhofgasse 4, A—1011, WIEN I.

AŬSTRALIO
Cosmos Bookshop, 133 Ackland Street, St. Kilda, Vic. A. Keesing, 168—174 Day Street, SYDNEY, N. S. W. 2000

BELGUJO
Agence Messagerie de la Presse, Rue du Persil 14—22, BRUXELLES

BULGARIO
„HEMUS", Pl. Slawejkov 11, SOFIA

ĈEĤOSLOVAKIO
P. N. S. — dovoz tisku, Vinohradska 46, PRAHA 2.
P. N. S. — dovoz tisku, Leningradska 14, BRATISLAVA

DANLANDO
Ejnar Munksgaard, Prags Boulevard 47, COPENHAGEN/S.
Hunnia Books, Norrebrogade 182. I., COPENHAGEN/N.

SUD-AMERIKO
Livraria Brody Ltda., Caixa Postal 6366, SAO PAULO, Brazilo
Livraria D. Landy, Rua 7 de Abril, Caixa Postal 7943, SAO PAULO, Brazilo.
Luis Tarcsay, Calle Iglesia Ed. Villoria Apt. 21—105, C. 24. CARACAS, Venezuela

FINNLANDO
Akateeminen, Kirjakauppa, Keskuskatu 2, HELSINKI

FRANCUJO
Agence Littéraire et Artistique Parisienne, 7 Rue Debelleyme, PARIS 3
Société Balaton 12 Rue de la Grande Bateliére, PARIS 9.

NEDERLANDO
Swets et Zeitlinger, Keizersgracht 487, AMSTERDAM C.

ISRAELO
Hadash, R. Nesz Ciona 4, TEL-AVIV
Lepac Ltd., 15 Rambam, TEL-AVIV
Gondos Sándor, Herzl 16, Bét Hakranot, HAIFA
A. Fischer, R. Strauss 3, JERUSALEM

JAPANUJO
Nauka Ltd., 30—19, Minami-Ikebakukuro 2-chome, Toshima-ku, TOKYO

JUGOSLAVIO
Forum, Vojvode Misica broj 1, NOVI-SAD
Jugoslovenska Knjiga, Terazije 27. BEOGRAD

KANADO
Délibáb Film and Record Studio, 19 Prince Street West, MONTREAL 18. Que.
Pannonia Books, 2 Spadina Road, TORONTO 4, Ont.

ĈINUJO
Watwen Shudian, P. O. B. Nr. 88. PEKING

POLLANDO
P. K. W. Z. Ruch. ul. Wronia 23, WARSZAWA

GERMANA DEMOKRATIA RESPUBLIKO
Zeitungsvertriebsamt, Fruchtstrasse 3—4, 1004, BERLIN

GERMANA FEDERACIA RESPUBLIKO
Griff Verlag, Über der Klause 7, 8 MÜNCHEN 90
Kubon und Sagner, Schliessfach 68, 8 MÜNCHEN 34.
Kunst und Wissen, Postfach 46, Wilhelmstrasse 4, 7 STUTTGART 1.
W. E. Saarbach, Follerstrasse 2, 5 KÖLN 1.

NORVEGIO
A/S Narvesens Litteratur Tjeneste P. O. Box 6140 Etterstad, OSLO

ITALIO
Avv. Andrei Lazar, Via Monte delle Gioie 24, ROMA
S. Co. Lib. Ri., Piazza 33, ROMA

RUMANIO
OSEP, Gara de Nord, BUCURESTI
OSEP, ORADEA

SVISUJO
AZED AG., Dornacherstrasse 60/62, BASEL 4200
Metropolitan Verlag, Binningerstrasse 55, ALLSCHWILLL

SVEDUJO
A. B. Nordiska Bokhandeln, Drottninggatan 7—9, STOCKHOLM 1.
A. B. Sandbergs Bokhandeln, Sturegatan 8, STOCKHOLM 5.

SOVETUNIO
Sojuzpechatj. Import, Prospekt Mira 112-a MOSKVA

USA (Usono)
Center of Hungarian Litterature Inc., 1538 Second Ave., NEW YORK 10028
Corvin Travel and Gift Parcel Service, 1590 Second Ave., NEW YORK 10028
Stechert-Hafner Inc. 31. East 10th St., NEW YORK 10003
Magyar Áruház Könyv- és Lemezosztálya, 11802 Buckeye Road, CLEVELAND

VJETNAMIO
Phong Phat Hanh Bao Chi 17. Dinh Le. HANOI

KOREO
„Chul Bo" PHENJAN
Hungaroj abonu por eksterlandanoj laŭ la avizo sur la 2-a kovrilpaĝo

Hungaroj abonu por eksterlandanoj laŭ la avizo sur la 2-a kovrilpaĝo

Triumfarkoj — el vinbero super la ŝoseo al Budapeŝt de Kecskemét

La turdomoj de la nova kvartalo en Kecskemét